

Rodolfo REVIGLIO

RESTU EN MIA AMO

Por spirita altenlevo
de la geedziĝo
kaj de la Familio

Traduko de Glauco Corrado

Al kiu estas adresita ĉi tiu libro

- * Al la kredantaj geedzoj kaj al iliaj familioj.
- * Al la gefianĉoj, kiuj volas geedziĝi en la kristana kredo kaj deziras fondi familion laŭ la instruoj de Jesuo Kristo.
- * Al la pastroj, al la diakonoj, al la geedzoj, kiuj sin dediĉas al la grupo-familioj kaj al la preparo de la fianĉoj al geedziĝo.
- * Kaj - pere de la supre menciitaj - ankaŭ al tiuj ne-kredantoj kaj dubemuloj, kiuj serioze deziras konatiĝi kun la realaĵo de la kristana geedziĝo.

Ĉi tiu verko celas

- * Traesplori la finan fundamenton, la originantan kernon de la realaĵo geedziĝo-familio, kiu estas en Dio, kio estas Dio!
- * Trairadi tiun itineron prikonsiderante la kulturon de la homo nuntempa kaj la situaciojn, en kiuj sin trovas la familioj.

SINPRAVIGE

Kial ĉi tiuj paĝoj? Ĉu ne jam ekzistas tiom multe da eldonaĵoj pri geedziĝo kaj familio?

La kialoj estas tri. Ilin ĉiujn ni taksas ĉu gravaj ĉu indaj je atento, pro tio, ke hodiaŭ geedziĝo kaj familio akiras apartan aspekton laŭ la komuna opinio, ankaŭ interne de la eklezio.

1. Geedziĝo kaj familio estas - laŭ la plano de Dio kreanto kaj de Kristo savanto - *realaĵo, kiu konsekras la vivojn kaj la estaĵojn* de la geedzoj kaj de la filoj.

Erare estus pensi, ke je Dio kaj al la gefratoj konsekriĝas nur pastroj kaj religiuloj.

Ankaŭ se en la religia kaj pastra vivoj la konsekriĝo al Dio kaj al la animoj montras kelkajn aspektojn privilegiajn rilate la geedziĝan vokiĝon, oni devas tamen agnoski kaj subteni *la grandegan konsekriĝan gravecon de la kristana geedziĝo*.

2. Kiel la religia konsekriĝo sin elmontras en la observado de la evangeliaj konsiloj al malriĉeco-ĉasteco-obeado, samtiel ankaŭ *la geedziĝa kaj al-familia vokiĝo* povas kaj devas sin elmontri en iu sia aparta formo de celo al malriĉeco, al ĉasteco kaj al obo.

Kelkaj sufiĉe klaraj paĝoj de ĉi tiu pristudo ilustras la supran aserton.

3. Laŭ la nuna religi-instrua tendenco, oni kutime prezentas al la gefianĉoj (kiam ili vizitadas la antaŭgeedziĝajn kursojn) la *naturajn* facetojn de la valoroj de la geedziĝo, kio povas esti akceptita kaj kunkonsentita ankaŭ de ne-kredantoj, kaj al ili oni aldonas la propran rolon de la kristana geedziĝo. Oni aliflanke diras, kaj oni pravas, ke ankaŭ geedziĝo inter ne-kredantoj ekestigas valoraĵon.

Agnoskendas kaj asertendas, tamen, ke la sakramenta valoro de la kristana geedziĝo estas ege pli multe ol io, kio *aldoniĝas* al la natur-tipa geedziĝo. Ĝi, nome, estas *realaĵo nova*, profunde bazita sur Jesuo

Kristo, *homo nova*.

Ankaŭ se multaj geedzoj ne plene sukcesas ĉi tion kompreni, la vera, perfekta geedziĝo -laŭ la Dia plano -estas ja tiu, kiu sin bazas sur la kun-unuiĝo inter Kristo kaj la eklezio, nome la kristana geedziĝo.

Sekve, al la kristanoj, kiuj deziras la geedziĝo-sakramenton (t.e., kiuj petas en-kirke geedziĝi) oni ĉiam devas proponi - kaj tio estas serioza devo de la anim-paŝtistoj - la plenan enhavon de la kristana geedziĝo, kiu estas tiom riĉa kaj mirinda, kaj estas tia, kian eleksamenadis kaj transdonis la primeditado de la pastroj, de la teologoj kaj de la majstroj de la spirito - kaj, ne lastaj, la sennombraj paroj de kristanaj geedzoj - dum dudek jarcentoj da kristanismo.

Kial tiom multaj geedzoj, kiuj tamen sin bone pretigis por la geedziĝo, post la nupta celebrado reenanonimiĝas inter la ne-praktikantoj?

Eble al ili oni ne prezentis, plene kaj vere, la tutan riĉecon de la geedziĝo; kaj al la geedziĝo ili ne estis adresitaj tra periodo de provo kaj de sperto sufiĉe longaj kaj motivitaj.

Se al ili oni prezentas ĉi tian enhavon laŭ la postulataj klareco kaj integreco, samtempe kulpacienca laŭgradigo, la gefianĉoj kaj la geedzoj *fatale eniros krizon*.

Sed tio estas bona! Pro tio, ke se oni ne enkriziĝas, oni povas dubi, ke la mesaĝon de la kredo kaj de la graco de Jesuo oni komprenis, akceptis, elasimilis!

Oni devas kuraĝi, kaj prezenti la veron, la plenan veron. Ni ne rajtas limigi la kredon nur al tio, kio estas simple akceptebla kaj komprenebla.

LA DEIRPUNKTO

Kutime, oni programadas kaj planas *komencante de ni mem*.

Kiam du junuloj, ĉar ili amas sin reciproke, decidas ekkunvivi kaj ekstarigi novan familion, ili faras *sian* planon. Ili deiras de *siaj* problemoj, de *siaj propraj* deziroj.

Ni, kontraŭe, estas konvinkitaj, ke por justa elkompreno de la kristana mistero kaj, per tiu, por la ekkompreno de la sakramento geedziĝa, ili devus renversi la perspektivon kaj prikonsideri alian vidpunkton. Ankaŭ sen flankenmeti siajn problemojn kaj siajn dezirojn, ili klopodu planadi *deirante de Dio*, lasante, ke estu Li, tiu, kiu moviĝas kiel unua. Eble la Sinjoro proponas alian komenco-manieron, Li havas alian manieron flanke de ni kunmarŝi.

La Sankta Apostolo Johano, en sia unua letero skribas:

Jen kiel la amo de Dio elmontriĝis en ni:

ke Dio sendis en la mondon

Sian Filon solenaskitan,

por ke ni vivu per li.

Jen estas la amo,

ne ke ni amis Dion,

sed ke Li amis nin,

kaj sendis Sian Filon

kiel repacigon pro niaj pekoj.

Amataj, se Dio tiel amis nin,

ni ankaŭ devus ami unu la alian!

(1. Joh 4,9-11)

Li nin amis kiel unua! Sekve, nia travivaĵo antaŭ ni komenciĝas. La mondo ne ekeksistis, kiam ni ekaperis. Antaŭ ni la historio estas ege, ege longa.

Ne temas simple pri historio pri viroj, pri virinoj, pri militoj, inventoj, vojaĝoj, malkovroj, ĝojoj kaj doloroj de la homaro. Temas pri la historio de Dio! Temas pri historio de Amo, kiun Li komencis kiel unua.

Ne estas ni, kiuj amas Lin,

sed Li, kiu amas nin!

Laŭ ĉi tiu perspektivo entrudiĝas la historio de la mondo kaj la historio de ĉiu homo: ekde Adamo ĝis la lasta homa estaĵo, kiu naskiĝos sur ĉi tiu tero.

Jesuo, kiam Li komencis sian predikadon, invitis nin pli-malpli laŭ ĉi tiu perspektivo. Li diris:

La tempo jam plenumiĝis, kaj la regno de Dio alproksimiĝis...

Pentu, kaj kedu al la evangelio!. (Mk 1, 15)

La supra alvoko rememorigas alian tre malnovan inviton-ordonon, kiu reeĥadas en la oreloj de la unuaj homaj estaĵoj, kiuj aperis sur la tero:

Fruktu kaj multigu,

*kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi,
kaj regu super la fiŝoj de la maro
kaj super la birdoj de la ĉielo,
Kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero.*
(Gen. 1, 28)

La regno de Dio tiam komenciĝis, je la aŭroro de la homaro.

Jesuo, kiam Li venis inter nin, ĉar la «tempo plenumiĝis», pri tio al ni malkaŝis la ekziston, la interplektiĝon, la vojon, la signifon. Sed ja estis komenciĝinta la regno. Ni eĉ rajtas diri, ke tiu ĉiam ekzistis, en la plano de Dio, en Liaj intencoj, en Liaj deziroj.

En la verko de Sankta Paŭlo ni trovas alian priskribon de ĉi plano de Dio kaj de Lia regno:

*Kaj ni scias,
ke por tiuj, kiuj amas Dion,
por tiuj, kiuj estas vokitaj laŭ Lia intenco,
ĉio kunlaboras al bono.
Ĉar, kiujn Li antaŭkonis,
tiujn Li antaŭdifinis
kiel konformajn al la bildo de Lia Filo,
por ke ĉi tiu estu la unuenaskita inter multaj fratoj;
kaj kiujn Li antaŭdifinis, tiujn Li ankaŭ vokis;
kaj kiujn Li vokis, tiujn Li ankaŭ justigis;
kaj kiujn Li justigis, tiujn Li ankaŭ gloris.*
(Rom 8, 28-30)

Laŭ ĉi tiu dia perspektivo enŝoviĝas la historio de la mondo, la historio de ĉiu homo, nia historio, tiu de ĉiu el ni; tiu de la unuopaj familioj.

Temas pri perspektivo, kiun oni povas kompreni en ĝiaj mirindaj belo kaj saĝo, nur se oni emas ĝin trapenetri, ties konon pliprofundigi, nur se oni kaptiĝas en Jesuo Kristo.

Malmultaj homoj atingas plenan ĉi-rilatan komprenon, ĉar malmultajn regas la volo pludaŭrigi la itineron de la priserĉado kaj, ĉar malmultaj volas komplete konfidi en Li, la Sinjoro.

Neperfekta estas la amo homa. Oni eĉ hezitas plene engagiĝi, ĉar oni apogas sin nur je siaj propraj fortoj.

Sed la amo estas de Dio, kiel al ni diris Sankta Johano. Kaj Dio volis, ekde la komenco, partoprenigi la homon je Lia entrepreno: kreski, multobliĝi, disvastiĝi sur la tero, tiun regi... Temas pri nia historio! Kaj temas, samtempe, pri la historio de la regno de Dio: kredo en la Evangelio!

La iniciato, tamen, venas de Dio, ĝi ne estas iniciato nia. Tiu, Kiu indikas la vojon estas Li, ni ne estas.

Geedziĝo, familio, estas *niaj* laŭ la mezuro laŭ kiu, ni agnoskas, ke ili estas kaj elpensitaj kaj dezirataj de Dio. Temas pri Lia regno!

Temas pri regno, kiu naskiĝas de la amo, marŝas en la amo kaj alcelas la amon.

Ĉar Dio estas amo!

UNUA PARTO

BILDO KAJ SIMILO

Dio diris:

«Ni kreu homon laŭ Nia bildo,
similan al Ni;
kaj ili regu super la fiŝoj de la maro,
kaj super la birdoj de la ĉielo,
kaj super la brutoj,
kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero».

*Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo;
laŭ la bildo de Dio Li kreis lin;
en formo de viro kaj virino Li kreis ilin.*

Kaj Dio benis ilin, kaj Dio diris al ili:

«Fruktu kaj multiĝu,
kaj plenigu la teron;
kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro
kaj super la birdoj de la ĉielo,
kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero».

Kaj Dio diris:

«Jen Mi donis al vi ĉiujn herbojn, kiuj semas semon,
kiuj troviĝas sur la tuta tero,
kaj ĉiujn arbojn, kiuj havas en si arban frukton,
kiu semas semon;
tio estu por Vi mangaĵo.

Kaj al ĉiuj bestoj de la tero,
kaj al ĉiuj birdoj de la ĉielo
kaj al ĉiuj rampaĵoj sur la tero,
kiuj havas en si vivan animon,
la tutan verdan herbaĵon kiel mangaĵon».

Kaj fariĝis tiel.

*Kaj Dio rigardis ĉion, kion Li kreis,
kaj vidis, ke ĝi estas tre bona.*

Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la sesa tago.
Kaj estis finitaj la ĉielo kaj la tero
kaj ĉiuj iliaj apartenaĵoj.
Kaj Dio finis en la sepa tago Sian laboron,
kiun Li faris,
kaj Li ripozis en la sepa tago
de la tuta laboro, kiun Li faris.
Kaj Dio benis la sepan tagon kaj sanktigis ĝin,
ĉar en ĝi Li ripozis de Sia tuta laboro,
kiun Li faris kreante.
Tia estas la naskiĝo de la ĉielo kaj la tero,
kiam ili estis kreitaj. (Gen. 1, 26-2,4)

La rava rakonto de la kreado -laŭ la simpla kaj alte inspirita lingvaĵo de la Biblio -diras al ni ege pli multe ol kia ajn scienca priskribo rilate la originon de la materio kaj pri la apero de la homo sur nia planedo.

Fakte, ĝi ne nur rakontas pri tio, ke ekzistas la mondo, ekzistas la aĵoj; sed ĝi konigas al ni la rilaton inter la aĵoj kaj Dio.

Se la homo eliris el la manoj de Dio, respegulante en sia aspekto la trajtojn de sia Kreinto, ni plenrajte povas retroiri, tra tiuj trajtoj, al la realaĵo mem de Dio.

Ekde sia ekzisto, la homo perceptas la alvokon de la Kreinto, kaj en tio li sentas, neforigebla, la neceson serĉi la Kreinton. Inter tiuj, kiujn la historio gardas por ni, tiu - tio estas, la serĉado de Dio - estas la aventuro la plej alloga en kiu - ade kaj drome - la homo engaĝiĝas.

Li povas nei Dion, li povas misformi Ties bildon, kontraŭ Li batali kaj provi Lin detrui: ĉi tiuj klopodoj estas ĉiuj la pruvo, la plej konvinkiga, ke la homo ne povas rezigni je Dio, ne povas ne serĉadi Lin, ne konatiĝi kun Li, Lin alvoki... ami Lin.

Estas - ĉiuokaze - la bildo, la similo, tio, kio reelvenigas la Aŭtoron kaj la Kreinton, la Plejaltulon, Dion... la Amon!

Mallonge antaŭ la alveno de Kristo, la nekonata aŭtoro de *La libro de la Saĝeco* tiamaniere skribadis:

*Estas ja laŭ nature stultaj
ĉiuj homoj, kiuj vivadis en nescio pri-Dio,
kaj disde la videblaj bonaĵoj ne rekonis Tiun, Kiu estas, ili ne rekonis la Farinton,
eĉ prikonsiderinte la faritaĵojn.
Sed, aŭ la fajron, aŭ la venton, aŭ la mildan aeron,
aŭ la enĉielan stelaron, aŭ la akvon torentan,
aŭ la en-altajn lumojn ili taksis dioj,
regantoj de l' mondo.
Se, mirigitaj pro ilia beleco, tiujn ili konsideris dioj, pripensu ili kiom supera estas ilia
Sinjoro,
ĉar la Aŭtoro mem de la beleco kreis ilin.
Se frapitaj ili estas de la potenco kaj moviĝemo de tiuj,*

*el tio ili eltiru kiomfoje pli potenca estas
 Tiu, Kiu al ili donis formon.
 Fakte, el la grando
 kaj el la beleco de la kreitaro,
 pro analogio, oni elkonas la Aŭtoron.
 Por tiuj estas tamen milda la riproĉo,
 ĉar eble ili sin trompas
 dum ili Dion serĉadas
 kaj pro la volo Tiun malkaŝi.
 prizorgante pri Liaj verkoj,
 ili ja esploras,
 sed ili permesas la allogon de la ŝajno,
 ĉar belas tro multe la viditaĵoj.
 Sed ankaŭ tiuj ne estas pardoneblaj,
 ĉar se tiom multe ili kapablis ekscii,
 ke ili ekzamenas la Universon, kial ili pli rapide
 ne malkaŝis ties Kreinton? (Saĝ. 13,1-19)*

Je la profunda primeditigo de la Libro de la Saĝeco, reeĥas la vortoj de Paŭlo, kiu - skribante al la Kristanoj en Romo - reargumentadas:

*Ĉar la kolero de Dio malkaŝiĝas el la ĉielo kontraŭ ĉia malpieco kaj maljusteco de homoj, kiuj tenas la veron en maljusteco; ĉar la scio pri Dio estas elmontrita ĉe ili, ĉar Dio elmontris ĝin al ili.
 Ĉar Liaj nevideblaj ecoj de post la kreado de la monda fariĝas videblaj, sentate per Liaj faritaĵoj, nome, Lia eterna potenco kaj dieco; tial al ili mankas defenda pledo; ĉar konante Dion, ili ne gloris Lin kiel Dion, nek estis dankemaj, sed vaniĝis per diskutadoj, kaj ilia sensaĝa koro mallumiĝis.
 Pretendante esti saĝaj, ili malsaĝiĝis, kaj ŝanĝis la gloron de la senmorta Dio en bildon de morta homo kaj de birdoj kaj kvarpiedaj bestoj kaj rampaĵoj.
 Tial Dio fordonis ilin al la voluptoj de iliaj koroj, al malpureco, por ke iliaj korpoj malhonoriĝu inter ili mem; kiuj ŝanĝis la veron de Dio en mensogon, kaj adoris kaj servis la kreitaĵojn prefere ol la Kreinton, kiu estas eterne benata. Amen.
 (Rm. 1, 18-25)*

La realo (Dio) kaŝita estas en la bildo (homo); kaj la bildo nerezisteble orientiĝas al la Realo.

Surtere, la bildo de Dio plej apuda al la perfekteco estas la homo. Kaj, kiel ni vidos pli precize: la viro Adamo kompletigita de la virino Eva. Viro kaj virino, edzo kaj edzino, karno ununura.

Pro tio, unu el la privilegiaj vojoj por ascendi de la kreitaĵo al la Kreinto estas enpenetri la geedzan amon homan kaj en tiu ellegi la amon Dian.

Pro la sama kialo, kiel tre ofte la homo fuŝfantazias en la serĉado de Dio interŝanĝante Tiun kun la kreitaĵoj, tiel ne malpli ofte la homo fuŝfantazias en la amo geedza, konfuzante ĉi dian bildon kun la terura devojiĝo de egoisma priĝuado.

Pro ĉi sama kialo, eblas finfine indiki itineron al Dio ekirante de la sperto de la geedza amo kaj klopodante tiun purigi de ĉia forvojiĝo pasia aŭ ŝuldebla al egoismo...

Kaj eblas ĉerpi el la sperto Dio, por eltrovi - en Lia vivo, kiu estas «lumo de la homoj» (Joh. 1,4) - la plej superajn koordinatojn de la homa amo travivata en la geedzeco kaj en la familio.

Bildo kaj similo.

Por descendi de Dio al la homo kaj por re-ascendi de la homo al Dio.

Por malkovri Dion, Kiu ĉeestas en la homo por tiun ami kaj savi.

Por ekvidi la emon de la homo, kiu alkrias, ke Dion li bezonas.

La Amon por kompreni.

La Amon por celebri.

La Amon por redoni.

1. - En la komenco estis amo

AMO: AMBIGUA VORTO

Paroli pri geedziĝo kaj pri familio estas paroli pri amo. Sed rilate la vorton *amo* oni devas bone interkompreniĝi.

Tiu vorto - se ni bone atentis - estas ĉe ĉies buŝo, sed varias ĝia signifo laŭ la pensomaniero, laŭ la kulturo, laŭ la unuopula konduto kaj ĉefe laŭ la religiaj konvinkiĝoj kaj la moralaj principoj, el kiuj iu homo prenas inspiron.

Du junuloj sentas sin allogataj unu de la alia. Ofte - inter ili - eksparkas Vera amo.

Tia amo bezonas kreskon kaj ĝi fariĝas reciproka interkonatiĝo, vivosperto, sperto de pensomaniero, de dirmaniero, kaj kuna agado.

Kun la kresko, la amo eltrovas novajn sinesprimojn, pli profundajn manifestiĝojn; facile en tio kaŝiĝas egoismaj pasioj kaj klopodo ricevi sinkontentigojn.

En la nuna tempo, du junuloj, kiuj sin amas atingas sufiĉe rapide la esprimon de sia amo pere de seksaj ankaŭ plenaj interrilatoj.

Ĝenerale estas por ili malfacile restadi je simple sindediĉa nivelo, kio evoluigus tiun dimension de la amo, kiu estas la plej vera kaj la plej kompleta, kaj eĉ atingas tian nivelon, ke sian propran vivon oni fordonas por la amato.

Ia procento de geedziĝoj malsukcesas pro tia, ke la amo fariĝis tro frue banalaĵo tra impetaj kaj eĉ blindaj interseksaj sintenoj, kiuj kontentigas, unue kaj antaŭ ĉio, ian nekontrolleblan pasio-senton.

Nome, la ambiguo de la amo oni ne konstatas nur pro la uzo de la vorto, sed mem laŭ la faktoj.

KRISTANA AMO

Ni parolu nun pri amo laŭ la kristana signifo, t.e. laŭ la instruoj de Jesuo kaj laŭ la plurjarcenta tradicio de la eklezio, kiu al ni rivelacias, kio estas la ĉiama Dia celo. Temas pri amo, kiu antaŭas la geedziĝon kaj la familion, kaj tiujn preteras.

La kristana amo nomiĝas *karitato* (en la greka lingvo: *agàpe*). Ĝi estas al ni priskribita en famkonata teksto de Sankta Paŭlo:

*Amo longe suferas,
kaj bonfaras;
amo ne envidias;
amo ne fanfaronas;
ne ŝveligas sin,
ne kondutas nedece,*

*ne celas por si mem,
ne koleriĝas,
ne pripensas malbonon,
ne ĝojas pri maljusteco,
sed kunĝojas kun vereco;
ĉion toleras, ĉion kredas,
ĉion esperas, ĉion eltenas. (1 Kor. 13, 4-7)*

La karitato havas siajn radikojn en Dio, ĉar Dio estas karitato; estas pro tio, ke ekirante de Dio, de Lia vivo, ni sukcesas atingi la komprenon de la karitato.

LA AMO EN DIO

Sankta Johano, komence de sia evangelio, diras:

*En la komenco estis la Vorto
kaj la Vorto estis kun Dio,
kaj la vorto estis Dio. (Joh. 1,1)*

Por la evangeliisto Johano, la *Vorto* de Dio korespondas al tia, kion oni intencas esprimi dirante *Filo* de Dio. *Vorto* kaj *Filo* estas du imagoj por indiki rilaton de personoj interne de la Dio ununura.

La pluraj terminoj, kiujn ni uzas montriĝas ĉiuokaze limigitaj kaj ne perfektaj; konsekvence, ni devas helpi al ni pere de ekzemploj, analogioj, bildoj, pro tio, ke nenia homa vorto povus precize kaj plene difini la esencon kaj la vivon de Dio. Rilate nian homan sperton, *vorto* estas parto de la homo, estas parto de ties vivo. Pere de vortoj ni esprimas niajn pensojn la plej belajn kaj la plej riĉajn el nia animo, ni eldiras nian amon. La vortoj ne estas *ekster* ni, ankaŭ se ilin ni prononcas per elblovo de nia spiro, per vibrigado de niaj voĉaj kordoj kaj ili de ni elbuŝiĝas vibrigante siavice la aeron. La vortoj estas esprimo de *nia* penso, manifestiĝo de niaj plej internaj sentoj. *Niaj vortoj estas iamaniere ni mem.*

Dio estas *senlima amo*.

De la eterno tuta, Dio elmontras sian amon prononcante unu Vorton nelimigeblan, ĉiamdaŭran, belegan, ege mirindan; la vorto estas *la Filo*.

Per ĉi tiu Vorto la Patro eldiras sian tutan neceson komuniĝi, Li diras Sian «Mi vin amas».

Pere de la Filo, la Patro esprimas kaj malkaŝas, konfidas kaj partoprenigas sian tutan memon.

Kiam du junuloj sin ekamas, ankaŭ ili sentas - kiel Dio sentas - la deziron diri unu al la alia: «Mi vin amas».

Homa mallonga esprimo, ofte povriĝinta pro troa uzado. Sed la du junuloj ne sukcesas sin rigardi reciproke kaj sin interrenkontiĝi sen plurfoja eldiro: «Mi vin amas».

Kaj ili preterpasas la vortojn, kaj la amon ili esprimas per aliaj signoj, kiel - ekzemple - per kiso, per donaco, per kareso.

La Sankta Spirito estas kiel kiso, donaco pere de kiu Patro kaj Filo (Vorto) diras unu al la alia sian reciprokan amon.

Pere de kiso kaj pere de donaco la homo engaĝas sin tute; estas ja en ĉi tiu *tuteco*, ke ni povas diri, ke ni apudiĝas al Dio, ke ni Lin imitas!

Nia *tuto* estas certe malmulto fronte al la *Tuto* de Dio. Ĝi estas tamen *tuto*.

En nia konsumema kaj supraĵa socio, ni sukcesis senigi je pleneco tiom multajn donacojn.

Estas do necese, ke ni remalkovru la valorojn la plej purajn de la kiso kaj de la donaco: tiamaniere ni sukcesos kompreni, ke ĝuste pere de kiso kaj de donaco ni estas imitantoj de Dio.

Jes, ja! Malgraŭ nia povreco kaj nia eto, ni estas - en ĉi aĵoj tutaj - *bildo kaj similo de Dio*.

Ju pli ni observadas Dion, des pli ni lernas precize konkretigi nian amon. Kaj jen Sankta Johano, kiu plie diras, pere de tre konciza esprimo:

*Dio estas amo,
kaj, kiu restas en amo, restas en Dio,
kaj Dio restas en li. (1 Joh. 4, 16)*

Kaj Sankta Paŭlo aldonas:

*La amo de Dio estas versita
en niajn korojn per la Sankta Spirito,
donita al ni. (Rm. 5,5)*

AMO KAJ FEKUNDECO

Pri Dio, pli multe facilas diri tion kio Li ne estas ol tion, kio Li estas, ĉar Li estas senlima, la sanktega.

Tamen ni povas, ni devas pri Dio paroli: laŭ la kondiĉo, ke ni havu sintenon de senmezura humilo.

Nur, kiu estas vere humila, kapablas ricevi la lumon, kiu al li venas de la Sinjoro, de Lia Spirito, ĉar Dio sin konigas al la humiluloj, kaj - kontraŭe - Li kaŝiĝas antaŭ la sin-gloremuloj, konfuzigante ties menson cele ke ili erarvagadu en siaj pensoj.

Ĵaluza estas Dio pri sia mistero kaj Li sin malkaŝas nur al kiu kapablas roli sian rolon.

En Dio, amo estas fekundeco. Kiel ni vidis, Dio ne estas fermita en ia individueca egoismo: Dio bezonas naski Filon, Dio bezonas eldiri Vorton, kaj la Vorto estas sinesprimiga.

Li bezonas eldiri sian amon pere de signo, de donaco, de kiso. La Sankta Spirito. Amo estas *fekundeco*. La mistero de Dio-amo havas nomon: *Triunuo*.

Se Dio ne estus amo, Li ne estus fekunda, konsekvence, Li ne estus Triunuo, Li ne estus «rilato de amo inter Personoj».

Sed amo ne estas nur fekundo, Amo estas ankaŭ *unueco*. La fruktoj de fekunda amo tendencas al unueco.

De Dio, ĉi postulo de *fekundeco* kaj de *unueco* verŝiĝas en la homajn kreitaĵojn, kiuj estas pro tio Lia *bildo kaj similo*.

Jesuo, antaŭ la pasiono, en sia preĝo al la Patro, diras:

Por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni.
(Joh. 17, 21)

Kiam ni asertas, ke «Dio estas unu», ni ne intencas simple diri, ke ekzistas ununura Dio (anstataŭ du, tri aŭ pluraj dioj). Ni intencas diri ege pli multe: ke Dio estas *unueco de amo*. Pere de homa lingvaĵo:

...unukora kaj unuanima... (Ag. 4, 32)

Ĉi tiu unueco-fekundeco de Dio, nemezurebla amo, estas la kaŭzo kaj la modelo de ĉiuj kreitaj realaĵoj. Dio, kreante, havis kiel modelon sian vivon mem, profundan, senmezuran, kio estas amo, ĝojo, paco.

Estas sperto mirinda - por tiuj, kiuj en humilo serĉas Dion - Lin malkovri, preskaŭ permane Lin tuŝi. ...

Kiam oni apudiĝas al Dio pere de lingva esprimo kaj en la geedziĝa sperto, kaj en prifamilia sperto, kaj en la sperto de la amo, la tuta vivo fariĝas preskaŭ transfigurita kaj inundiĝas je lumo.

Sed tion, nur la etuloj komprenas.

BILDO KAJ SIMILO

Ni relegu la biblian tekston de Genezo, kiu enkondukas la koncepton de *bildo* kaj *similo*.

Dio diris:

«Ni kreu homon laŭ Nia bildo,

similan al Ni;

kaj ili regu super la fiŝoj de la maro,

kaj super la birdoj de la ĉielo,

kaj super la brutoj,

kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero».

Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo;

laŭ la bildo de Dio Li kreis lin;

en formo de viro kaj virino Li kreis ilin. (Gen. 1, 30-31)

La homo estas bildo kaj similo de Dio, *ĉar* - kiel Dio estas Spirito purega - tiel, ankaŭ la homo estas spirito.

Sed ne nur laŭspirite la homo estas bildo kaj similo de Dio. *La homo estas bildo kaj similo de Dio ankaŭ seksorilate.*

Seksemo indikas allogon de virhomo al homino, de masklo al femalo; rilate la homon, allogon gvidatan de la amo, kaj la kialo, de kiu estas la amo (t.e. spirita potenco).

La dua rakonto pri la kreo de Adamo kaj Eva (Gen. 2) parolas ĝuste pri allogo kaj unueco inter viro kaj virino.

*Kaj Dio la Sinjoro
konstruis el la ripo,
kiun li prenis de la homo,
virinon,
kaj Li venigis ŝin al la homo.
Kaj la homo diris:
«Jen nun ŝi estas osto el miaj ostoj
kaj karno el mia karno;
ŝi estu nomata Virino,
ĉar el Viro ŝi estas prenita.»
Tial viro forlasos sian patron
kaj sian patrinon,
kaj aliĝos al sia edzino,
kaj ili estos unu karno. (Gen. 2,22-24)*

Viro kaj virino estas du estaĵoj; sed ili estas kreitaj por iĝi ununuraĵo. Kaj la unuo viro-virino en la geedziĝo ne estas simpla *duopa societo*, ĝi estas *origina unuaĵo*, t.e. *unuaĵo*, *el kiu originas la homa estaĵo*.

Iasence: temas pri ununura homa estaĵo!

Ĉiu viro kaj ĉiu virino estas *persono*, sekve *io absolute difinita*. Sed ankaŭ la paro viro-virino (kun la projekcio al la filoj) estas *absolutaĵo*. Tiasence oni ĝin devas honoradi kaj respektadi.

La leĝoj de la ŝtatoj devas defendi la rajtojn de la unuopuloj, nome la rajtojn de la edzo kaj la rajtojn de la edzino; sed ankaŭ la rajtojn de la paro viro-virino kaj de la familio de tiuj starigita.

Homa seksemo estas bildo kaj similo de Dio, *ĉar* ĝi estas en si mem fekundeco kaj unueco, tiel kiel Dio-amo estas kaj fekundeco (=Triunuo) kaj unueco.

La homo (masklo kaj femalo: karno ununura) de Dio kreita «laŭ Lia bildo kaj simila al Li» estas fekundeco kaj unueco.

Amo fekunda jam en la rilato edzo-edzino, kaj pli poste en ties projekciado al la filoj; amo, kiu tamen tendencas unuigi, nekontraŭstareble, ĉiujn fruktojn, kiujn ĝi donas: la du edzoj estas *karno ununura*, gepatroj kaj filoj estas familio *ununura*!

Eĉ, pli poste ni vidos, kiel la *bildo-similo* ne limiĝas je kun-seksa korpo, je geedza unuiĝo, sed ĝi iras transen kaj pli profunden.

Ni devas tamen plue primediti ĉi vir-virinan edzan unuiĝon.

Kunseksa korpo, bildo kaj similo de Dio

Maskleco kaj femaleco ne estas simple du *enkarniĝoj* de la ununura homa estaĵo, du apartaj kaj sinkompletigaj *corpaj ecoj*.

Ili estas ankaŭ du *manieroj*, du *konscioj* travivi la misteron de la bildo-similo al Dio, por plenigi tiun *solecon*, kiu ekde la komenco karakterizis la staton de la homo (ŝvebanta inter Dio kaj la malsuperaj estaĵoj) kaj iamaniere tiun igis nekapabla interkomuniki: kun Dio, ĉar tro alta; kun la brutoj, ĉar inteligento- kaj amo-mankaj.

La soleco de la homo

En la rakonto prikreada, la homo sentas sin sola; tion dufoje diras la libro Genezo: antaŭ ol Adamo donos la nomon al ĉiu bruto, kaj antaŭ la konstruo de Eva.

Doni la nomon al la brutoj signifas la povon de Adamo super ĉia vivantaĵo; ĉi povo starigas lin super ĉiu alia estaĵo, tio aliflanke lasis lin sola.

Adamo ne povas dialogi kun la brutoj kaj kun la plantoj. Li estas supera, sed *sola!* Ĉi rilato de supereco ne estas sufiĉa al li por plene konkretiĝi en sia vokiĝo, laŭ liaj eblecoj.

Li bezonas estaĵon al li *simila*, li bezonas *dialogon*, li bezonas *aliancon*, li bezonas ian *apartenecon*, sekve, li bezonas ian *konsekriĝon*.

Al la homo - al Adamo - ne sufiĉas havi aliulon, al li egala:

- ❖ *pliobligante la nombron oni ne kreas amon*, komunecon, dialogon, aliancon.
- ❖ *oni tion faras eltrovante estaĵon, kiu portas plenecon*, kiu kompletigas, iamaniere *malsaman* - eĉ en la identeco de la bildo-similo al Dio.

Ĉi stato de la viro kaj de la virino povas helpi nin kompreni - almenaŭ supraĵe - kial la mistero mem de Dio estas samtempe mistero de Unueco kaj de Triunuo.

Dio estas amo; konsekvence Dio estas fekunda, Li donas sin. Tri personoj. Triunuo.

Dio estas amo; konsekvence Dio celas al la komuneco. Unueco (kio ne estas soleco).

La temo de la soleco kaj ties preterpaso nuntempas en niaj tagoj, ĉar la homoj forperdis la signifon de la komuneco, de la konsekriĝo, kion oni devas viv-sperti en la geedza unuiĝo.

Ankaŭ se oni edziĝas, ofte oni sentas sin solaj: la edzoj ne interkomunikas, ili ne atingas la kontentiĝon, kiu devus origini de tiu interligo, kiu el la du faras ununuran karnon, ununuran spiriton, ununuran volon, ununuran strebon kaj ununuran amon.

Emo al plena komuneco

Maskleco kaj femaleco estas du ekstretoj de komuneco pli konkreta kaj pli profunda; ili elmontras distingon, kompletigon, kiu postulas komunecon, reciprokajn sinoferon.

Pro tio - kontraŭe al la gepatroj, kiuj ne elektas siajn filojn kaj al la filoj, kiuj ne elektas siajn gepatrojn - la geedzoj elektas unu la alian, serĉas unu la alian, inter si ili faras komparojn, ili allogas unu la alian, ili - antaŭ ĉio - preparas sin por vivi *porĉiame* sian reciprokajn sinoferon-konsekriĝon.

Ankaŭ Dio, ekde la eterno, nin elektis, cele ke ni realigu kun Li plenan komunecon.

La elserĉado kaj la elekto de la geedzoj enhavas multajn komunajn interligojn kun la elekto de Dio: la elekto de Dio havas tamen ununuran direkton (Li nin elektis kaj ne

renverse) , la elektoj de la viro kaj de la virino, kontraŭe, enhavas reciprokecon: ambaŭ serĉas kaj elektas la alian.

La korpo estas la ilo al ĉi serĉado-elekto, kiu celas al unuiĝo pli profunda, kiu ja situas je nivelo pli alta ol tiu de la korpaj interrilatoj.

La homo komunikas per la vorto, per la rigardo. Sed la homo interkomunikas ĉefe per la korpo kaj pere de la korpa nudeco; ĉi komunikado estas tamen sub kondiĉo, estas gvidata, estas defendata de la pudoro, pro tio, ke la peko enestas en ĝi.

La pudoro iĝas - laŭ la Dio antaŭvidemo - sav-gardo kaj promociado de la vera, profunda konsekriĝo-alianco inter viro kaj virino (kaj pli poste, inter gepatroj kaj filoj, inter fratoj kaj fratinoj).

La nudeco de la viro kaj de la virino, origine, ne provokas disiĝon inter korpo kaj animo, inter karno kaj spirito: ankaŭ ne inter masklo kaj femalo: ĝi eĉ estas perilo de sinofero plena kaj senpostula.

Ĝi ankaŭ preparas kaj allogas al la sinofero, trans ĉia eĉ pli eta egoismo aŭ pasio. Ĝi estas fonto de vera kaj purega konsekriĝo, de alianco (se vi perceptas la sekson, kiel io, kio estas *por vi*, vi estas egoisto, vi ne estas sinoferulo, vi ne amas).

La malsameco en la korpo kaj la nudeco estas kondiĉo kaj perilo al sinofero plena kaj perfekta.

La peko (kiu estas egoismo, ribelo) rompis ĉi harmonion. La sindono elnaturiĝis kaj fariĝis posedemo, egoismo.

Multaj geedzoj ne perceptas tion klare, sed ili ja bone kapablas distingi, kiam ilia amo estas donaco, kaj kiam ĝi estas posedemo...

KORPO, TEMPLO DE LA AMO

La reciproka sinofero, kiu igas el la edzo kaj el la edzino karnon ununuran, esprimiĝas kaj konkretiĝas pere de la videbla marko de iliaj seksohavaj korpoj kaj de ilia perfekta, integriga kaj reciproke kompletiga unuiĝo.

En tia unuiĝo, viro kaj virino apartenas tute unu al la alia, en plena kaj harmonia trajto de siaj propraj subjektiveco kaj personeco al la subjektiveco kaj personeco de la alia.

Ili *faras paskon*: reekvivas «nova kreitaĵo», ne plu temas simple pri li aŭ ŝi, kaj ankaŭ ne temas pri *kombinaĵo* de ambaŭ, sed ekekestas *nova unuo*.

La korpo estas la templo en kiu oni celebras ĉi paskon, la sakramenton de ĉi tiu unuiĝo, la sigelon de ĉi-reciproka donaco, sen limoj de amo kaj de tempo. La korpo estas necesa, por ke la reciproka sindonado en la amo estu ebla, videbla, vera kaj plena.

Ĉiun fojon, kiam viro kaj virino kuniĝas, ĝis ili formas ununuran karnon:

- ili altiras surteren la benon de Dio pri la fekundeco
- ili rekondukas la homaron al la momento de la origino: temas pri reveno al la fonto – al Gen. 2, 23-24 – , temas, iel, pri partopreno en la krea ago de Dio.

La nasko daŭrigas kaj evoluigas la kreadon, interpretante la dian fekundecon; ĝi estas vastigo de la dia interligo, pliampleksigo kaj pliperfektigo de la dia bildo-similo, kiu kreas novajn aliancojn, novajn sindonojn, novajn unuojn.

Cele, ke ĉio ĉi estu vera, necesas, ke la geedziĝo enhavu la nerezigneblajn ecojn: tiujn de la fideleco kaj de la akcepto-agnosko flanke de la komunumo.

La ekstazo de la intergeedza unuigo

Unu el la esprimoj, la plej profundaj de ĉi tiu reciproka sindono-alianco inter viro kaj virino ĉerpiĝas en tiu, kiu estas kutime nomata la *ekstazo de Adamo*, la miro, kiu lin ekfrapis, kiam li vidis apud si, antaŭ si, estaĵon al si simila, «osto el liaj ostoj kaj karno el lia karno».

En tiu ekstazo, kiu ripetiĝas ĉiufoje kiam viro kaj virino apudiĝas en la signo de la vero, de la pureco kora kaj de la vera amo, ĉiu vidas - en la alia - sin mem, la kompletigon de sia propra estaĵo, de siaj plej profundaj ambicioj, de la deziroj, la plej enradikiĝintaj en la paseo...

En la ekstazo de sia unuigo (*ekstazo* signifas «eliri el si mem», senti sin alia estaĵo), viro kaj virino perceptas sian egalecon plenan, universalan, nedetruoblan.

Ili ankaŭ malkovras, ke la viro estas la naska principo de ĉi egaleco: La viro *donas* al la virino la plej bonon el si kun sia tuta personeco kaj kun ĉiuj siaj rajtoj. Ĉio ĉeestas en la semo, kiun en sin li demetas, kaj ŝi konsekvence fariĝas gardanto kaj portanto de la samaj neforpreneblaj rajtoj, de la samaj valoroj, de la precize egala digno.

En Dio, Patro kaj Filo kaj Sankta Spirito estas egalaj, sed:

- la Patro *donas* (naskante la Filon);
- la Filo (naskigita de la Patro) *ricevas* kaj *donas*;
- la Spirito nur *ricevas*.

En maniero senfine malsupera, sed same vera, ni vidas:

- la viron, kiu *donas*,
- la virinon, kiu *ricevas*, gardas kaj *transdonas*,
- la filojn, kiuj nur *ricevas*.

Sed en ĉiuj regnas ununura, nedisdividebla egaleco.

Tiamaniere ni pli bone konscias, ke la bildo-similo stampita de Dio en la viro kaj en la virino, preteriras tre multe la korpan seksecon: ĝi penetras en la plej profundon de ĉiu homo.

Je la radiko de ĉio ĉi, jen estas la senfina amo de Dio.

Tian amon, Dio enmetis en ĉiun el ni, kiel *kapablon*, kiel *posedaĵon el-tirotan!* Ĉiu homo, en la profundo de la animo, entenas nemalaltan kvanton de bonaj ecoj, de emoj al sindono, de deziroj kun si mem rivali, de neceso sinoferi: temas pri la senlimaj facetoj de la amo, de tiu amo, kiu venas *de Dio!*

Ni estas bildo kaj similo de Dio, en ĉiuj ĉi energioj, kiujn ni malavare kaj abunde ricevis.

Sed ni ofte ne scias, ke ni posedas tiomajn kapablojn. Ni ilin forgesas. Aŭ ni sufokas ilin per la enrompo de niaj planoj neraciaj, egoismaj, sinvantigaj... ĝis tio, ke ni volas mem regi nian vivon, ĝis la pretendo superestradi, anstataŭ servadi kaj ami.

Ununura karno kaj ununura spirito

La bildo-similo de Dio - en la viro kaj en la virino kaj en la reciproka rilato de tiuj - plene konkretiĝas kaj beatige ripozas en la ama kuniĝo.

Ĉi ama ago, kiu unuigas viron kaj virinon ĝis ili formas *ununuran spiriton*, ne konas limojn en ĝia konkretiĝo, ĉar ĝi celas al la senfino, kiel senfina la amo estas en Dio, de Kiu ĝi prenas modelon kaj kapablon efektivigi.

Ĉi ago de amo trovas sian esprimiĝon en la kuneco de la korpoj. Ĉi unuigo, kiam ĝi estas fidele kaj ĉaste plenumata, estas vera *sakramento* (nome *signo vera kaj reala*) de la amo intergeedza.

En Maria kaj Jozefo - kiuj estis geedzoj veraj - ĉi intergeedza amo ne nur ĉeestis, sed evoluis pli multe ol ĉe iu ajn alia geedza paro.

Pro speciala kaj neripetebla Di-donaco, la geedza amo de Maria kaj Jozefo neniam bezonis esprimiĝi en la *sakramento* (signo) de la interkorpa unuigo.

Ilia amo jam estis perfekta, en tiu realiĝo, kiun Jesuo komparis kun la stato de la *anĝeloj en la ĉielo* (Mt 22,30).

Nu, ĉiuj geedzoj, en la venonta vivo estos kiel anĝeloj de Dio kaj ili ne plu estos submetitaj je la leĝoj de la sekso. Sed restos la amo, ĝi eĉ atingos sian plenecon.

En Maria kaj Jozefo ĉi pleneco estis atingita ĉi tie, sur la tera, sen neceso de perkorpora esprimiĝo. Ĉi tio klarigas la veron de la virgeco de la Patrino de Dio, kaj krome klarigas kiel ŝi kaj ŝia ĉasta edzo tuj atingis la nivelon la plej altan de la amo.

(Ni pli poste vidos, kiel la bildo-similo de Dio atingas sian plej altan konkretiĝo-pinton ja ne en Maria kaj Jozefo, sed en Jesuo: bildo kaj similo, kiun Li transdonos al Sia korpo, tio estas, al la Eklezio).

LA BENO DE DIO SUR LA FAMILIO

La beno trairas la tutan sanktan historion, la historion de Dio, kiu gvidas la homojn al ilia destino de beatemo kaj de savo.

*Fruktu kaj multiĝu,
kaj plenigu la teron
kaj submetu ĝin al vi,
kaj regu super la fiŝoj de la maro,
kaj super la birdoj de la ĉielo,
kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero. (Gen. 1, 28)*

Temas pri la unua beno de Dio al la homa familio. Estas beno, kiu renoviĝas ĉiun fojon, okaze de hom-enmondigo.

Por la antikvaj patriarkoj (Abrahamo, Izaako, Jokobo, Moseo, Davido...) la beno de la patroj al la filoj ne estis nura bondeziro pri futuraj riĉaĵoj, signo de amo, alvoko de la Plejaltulo: ĝi estis ankaŭ oficiala akto de heredaĵ-transdono.

La beno estas, antaŭ ĉio, gesto de Dio, Kiu al la homo transdonas Sian amon, al li donas la heredaĵon de la tero kaj ĝiajn riĉaĵojn, al li liveras la povon pro-kreadi, daŭrigi la kreadon.

La beno estas ankaŭ la respondo de la homo al Dio, Kiun li agnoskas, kiel sian kreanton kaj patron: temas pri la preĝo, la sindono, la ofero, kiuj suprenleviĝas al la trono de la Plejaltulo.

Fine, beno estas la gesto la plej riĉa, profunda kaj nobla de la interhoma bonvolemo. La patroj benas la filojn kaj la filoj benas la patrojn.

La beno en la vivo de Dio, kaj en la familio

La beno estas - ĉi-tie, sur la tero - la plej fidinda signo de tiu reciproka *interdoniĝo* de la diaj Personoj inter si, kio konstituas la beataĵon de la Dio, Kiu estas Triunuo-Unuo.

Beni signifas aligi al la ĝojo de Dio, al Lia vivo de Patro, de Filo kaj de Sankta Spirito.

Konsekvence, ĉi-speca beno ĉiam enhavas ion religian, ion, kio rilatas al la kredo. Ĝi ĉiam estas preĝo.

Sankta Paŭlo ĝin al ni priskribis laŭ ĝia duobla direkto - «Dio-homon» kaj «homo-Dion» - kiam li ekadresis sian leteron al la kristanoj de Efeso.

*Benata estu la Dio
kaj Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo,
kiu benis nin
per ĉia beno spirita en la ĉieloj,
en Kristo;
kiel Li elektis nin en li
antaŭ la fondo de la mondo,
por ke ni estu sanktaj kaj senmakulaj
antaŭ Li en amo;
antaŭdestininte nin por filadopto
per Jesuo Kristo. (Ef. 1, 3-5)*

Sekve, la kristana vivo, ĉerpas ĉe la radikoj de la eterno, ĉe la *ĉiamo* de Dio. De kiam Dio estas Dio, ni estas elektitaj kaj de Li signitaj, fermitaj en Lia beno, kreitaj de la penso de Lia amo.

Ĉi beno manifestiĝas ĉiun fojon okaze de naskiĝo de infano, ĉiun fojon, kiam kredanto baptiĝas, ĉiun fojon, kiam du geedzoj unuiĝas por komenci novan interligon, novan donadon de amo.

La dia beno subtenas la amon intergeedzan kaj estras la harmonion de ties familio. La geedzoj estas vokitaj por vivtenigi kaj daŭrigi ĉi benon, igante ĝin objekto de siaj sentoj, esprimiĝo de sia amo, substanco de sia ĉiutaga vivo, kerno de sia rilato al la filoj.

Sed la dia beno ne devas esti taksata talismano, preskaŭa garantiaĵo kontraŭ la malbonŝancoj: tio ne indus je Dio!

Dio benas sed respondecigas, ekestigante engaĝigon kaj eĉ riskon, eĉ kelkfoje suferigante, ĉar nenio -se ne tento kaj sufero - tiom multe maturigas nian kapablon ami!

La beno de Dio pasas al la geedzoj, kaj de tiuj transiras al la filoj. Pro tio la geedzoj devas lerni bondiri (=beni), nome *eldiri la tutan bonon* kaj tion deziri unu al la alia, akiri ĝin reciproke, unu por la alia.

La beno de la gepatroj al la filoj ne vane elĉerpiĝas en neprecizaj bondeziro-vortoj, sed konkretiĝas en la kuraĝa emo al la vera bono de la filoj, al ties virto, al ties kapablo sin foroferi kaj eĉ suferi por la aliaj.

La gepatroj benas la filojn, tiujn edukante al senantaŭkalkula sindonemo, al rezignemo, al oboe, al spirito de povreco, al humilo ...

Ĉio ĉi tio - se sincere plenumita - fariĝas preĝo, kaj la gepatroj Dion benas, Lin adoras kaj Lin dankas, kune kun la filoj.

Ĉi tiu stilo de beno devus komenciĝi ekde la nupta tago, kaj eĉ antaŭ tiu! Inter la hejmaj muroj, oni devus ĉiam enspiri aeron de beno.

La beno de la Nazareta familio

Inter la evangeliistoj, Luko estas tiu, kiu plej multe persistas priskribante por ni la etoson benan. Elizabeta benas Jesuon kaj ties patrinon Marian, kiam ĉi-lasta iras por viziti sin, tuj post la anonco:

Benata vi estas inter la virinoj

kaj benata estas la frukto de via ventro. (Lk. 1, 42)

Per ĉi tiuj vortoj Elizabeta farigis eĥo de la beno de la Patron al la filo Jesuo, kiu venas de la eterno (kiel al ni diris la letero al la Efesanoj), kaj kiu nin ĉiujn prikonsideras.

Ankaŭ Zeharja benas Dion, kaj same la maljuna Simeono. Luka ege ŝatas situigi ĉiujn epizodojn de la infaneco de Jesuo sub la signo de la beno.

Jesuo mem daŭrigos benadi la Patron, antaŭ la faro de la gestoj la plej solenaj: la multobligo de la panpecoj, la resurekto de Lazaro, la reveno de la apostoloj post la unuaj evangelizaj spertoj.

Precipe en la granda Pasko de la Lasta vespermanĝo, kiam Li prenis la panon kaj - beninte la Patron - ĝin li disdonis al la apostoloj kiel sia korpo!

Laŭ tiu beno de la Lasta vespermanĝo, la kristanaj gepatroj benas Dion, ĉiun fojon, kiam familio kunvenas ĉirkaŭ manĝotablo por sin nutri dum la tago.

Senkiala estas familio, kiu ne kapablas kuniĝi por alpreĝi kaj beni Dion, familio, kiu ne kapablas elparoli la lingvaĵon de la beno, ĉefe kiam estas trairenda ia provo, kiam decido estas alprenota, kiam krucon oni devas elteni, kiam aman geston kuraĝe kaj senŝancele oni devas fari.

La benon ni ne lasu nur al la sacerdotoj. Kiom da fojoj, en la familio, oni havas la oportunon voki la Dian benon: la gepatroj por la filoj kaj la filoj por la gepatroj...

Benu tiujn, kiuj vin persekutas,

benu, kaj ne malbenu.

Ĝoju kun ĝojantoj,

*ploru kun plorantoj.
Estu simpatiaj unu al alia.
Ne pripensadu altajn aferojn,
sed klinadu vin al humilaj aferoj.
Ne opiniu vin saĝaj. (Rm. 12, 14-15)*

2. - Geedziĝo kaj familio: interligo

HISTORIO DE INTERLIGO

La senlima Dia amo volis el si mem eliri kaj fariĝi historio. Temas pri historio de kreitaj estaĵoj, pri historio de aĵoj sed, ĉefe, temas pri historio de homoj.

Temas pri historio de homoj, kiuj - fidele enkarnigante la bildon kaj la similon Dian - estas kapablaj korekte interpreti la Dian amon.

Kreado kiel interligo

Kiam la senlima Amo, la Dio Triunuo-Unuo, volis kreadi, projekciante iasence sin mem en estaĵojn, kiujn Li estis volinta, aminta kaj sekve de Li ekzistigitaj, Li elpensis starigi *interligon de amo!*

Kreadi la homon, por la Dio Sinjoro, signifis: fari interligon kun la homo, starigi tiun Sia *partnero*, Sia amiko. Ĉi tion ekde la eterno.

Interligon oni ĝenerale faras inter egaluloj. Dio ne havas egalulojn, sed interligo povas *igi egalaj*. La Dia interligo havis ĉi celon: ekestigi perfektan komunion - preskaŭ egalecon de vivo - inter la homo kaj Dio. Diras Johano:

Ni estos similaj al Li. (1 Joh. 3, 2)

Interligo estas frukto de amo. Tion oni tuj ekvidis en la avertoj de la Kreinto donitaj al la kreitaĵo:

*Frukto kaj multiĝu,
kaj plenigu la teron,
kaj submetu ĝin al vi.* (Gen. 1, 28)

Kaj ankoraŭ:

*De ĉiu arbo de la ĝardeno
vi manĝu,
sed de la arbo de sciado
pri bono kaj malbono
vi ne manĝu.* (Gen. 2, 16-17)

Pere de ĉi normoj, Dio alligis al si kaj viron kaj virinon, Li kununuigis ilin per Sia senlima amo-kapablo, starigante interrilatojn harmoniajn kaj amikajn:

- ❖ inter la homo kaj la malsuperaj estaĵoj
- ❖ inter la viro kaj la virino

❖ inter la homo kaj Dio

En ĉi-unua interligo, la viro jam estas rigardata plene integriĝinta kaj kun la virino, kaj kun la kosmo, kaj kun Dio.

Sekve, ne estas tute kontentige diri: «Dio kreis la homon». Pli bone estus ĉi-tiele esprimiĝi: «Dio kreis la viron kaj la virinon (unue-ce)».

Kiel la unueco de *Dio* estas la brilego, la lumo de la senlima fekundo-triunuo; kiel ĝi estas la glorado de la amo, tio estas la vivo de la Patro, de la Filo kaj de la Sankta Spirito, tiel same la homa unueco estas la brilego, la ekburĝonado de la perfekta amo inter Adamo kaj Eva, inter viro kaj virino.

Ekde la unua momento de sia ekzistado, viro kaj virino - Adamo kaj Eva - allogataj estas unu de la alia pro la amo, kaj ili celas al plena kaj perfekta kun-unuiĝo.

En ĉi tiu realaĵo de interligo projekcianta la senliman dian interligon, pensi pri *laŭtempa kontrakto*, pri portempa kaj estingiĝonta unuiĝo, estas absurdaĵo nekomprenebla. Ne nur antaŭ Dio, sed ankaŭ por la homo.

La grandeco de la kreitaĵo-homo estas ĝuste en ĉi tiu bildo kaj similo, kio lin tiom multe apudigas al Dio, ke li alprenas de Tiu mem la leĝojn de vivo.

La homa amo estas interligo; sekve, ĝi estas nedisigebla, ĉar tia estas la senlima amo de Dio.

Tamen...

Rompo de la interligo

Ĉi logiko de la interligo, estus devinta gvidi ĉiujn momentojn de la vivo de ĉiu homa estaĵo, sed la peko - t.e. la rifuzo de la interligo - ekrompis la planon de Dio.

La homo ne plu povas fideli al la interligo, ĉar li estas nekapabla fidele ami, porĉiame. Eĉ, li estas nekapabla kompreni la dian amon.

Ekkredante la aserton de la serpento (de la Maliculo mensogema, de tiu, kiu *dividas*), Adamo vidis en Dio rivalon, malamikon: amikon kaj patron li ne vidis. Anstataŭ sin vesti per fido kaj konfido, Adamo sin vestis je suspektemo, malamo kaj ribelo. *Li ne kredis en la Amo.*

Ĉiuj disdividiĝoj, rompoj, oponentaĵoj, kiuj pli poste montriĝos en la historio, estas sekvo de tiu rompiĝo komenca, kiu metis la viron kaj la virinon kontraŭ Dio, Kainon kontraŭ Habelo.

De la familia medio, la disdividiĝo etendiĝis al la urboj, al la sociaj klasoj, al la rasoj, al la religioj, al la nacioj kaj al la kontinentoj. Jen la Babelo universala

Laŭ la vojo de Dio por restarigi interligon

Dio ĉiam volis reestigi tiun interligon, ĉiam Li volis restarigi tiun rilaton de amo, kiu estas Lia vivo mem kaj Lia ununura celo, la celo de Lia kreado.

Akcepti kreitaĵon, kiu estas nekapabla ami, nekapabla fideli interligon, por Dio estus, kiel se Li neus sin mem, kiel se Li submetiĝus je ofendo venanta ĝuste de tiu kreitaĵo, kiu estis farita laŭ Lia bildo kaj similo.

Detruu la homon - kiu, laŭ la Dia intenco, devis esti la perfekta bildo de Lia amo - same estus Dia malvenko, malvenko de la Amo!

La peko ne devis venki. *Devis ja venki Dio!*

Pere de la voĉo de la profetoj, la popolo de Izraelo ricevis la revelacion de ĉi-daŭra volo Dia. Trafoliumante la historion de tiu popolo, oni povas eltrovi la etapojn de la restarigo de la interligo.

La unua granda etapo kuŝas ĉe la piedo de la sankta monto, en la Sinaja dezerto, kiam Dio diris al Moseo:

*Tiel diru al la domo de Jakobo,
kaj sciigu al la filoj de Izraelo.
Vi vidis, kion Mi faris al la Egiptoj
kaj kiel Mi portis vin sur aglaj flugiloj
kaj venigis vin al Mi.
Kaj nun se vi obeos Mian voĉon
kaj observos Mian interligon
vi estos Mia amata propraĵo inter ĉiuj popoloj,
ĉar al Mi apartenas la tuta tero.
Kaj vi estos por Mi regno de pastroj
kaj popolo sankta. (El. 19, 3-6)*

Tiu interligo estis, dum la tuta historio de Moseo ĝis Kristo, la provo-benka de la fideleco de Izraelo. Dio daŭre fidelis, tio ne okazis por Izraelo. La profetoj plurfoje revenis al tiu ĉi temo, riproĉante, kaj al la popolo kaj al la ĉefoj, de ambaŭ la nefideleco. Ofte ili komparis la fidelecon al Dio kun la fideleco inter-geedza.

Koncerne tion, kio rilatas la profetojn, ni legu kelkajn esprimojn de Hoŝea:

*Havu juĝon kontraŭ via patrino, havu juĝon!
ĉar ŝi ne estas Mia edzino,
kaj Mi ne estas ŝia edzo! (Hoŝ. 2,4)*

*Kiam Izraelo estis junulo, Mi lin ekamis, kaj el Egiptujo Mi vokis Mian filon.
Sed, ju pli Mi vokis ilin, des pli ili deturnis sin. (11,-1-2)*

*En tiu tempo
- diras la Sinjoro! -
si nomos min «Mia edzo!»...
Kaj Mi faros por ili en tiu tempo interligon...
Mi fianĉiĝos kun vi porĉiam,
Mi fianĉiĝos kun vi en vero kaj justo,
en favorkoreco kaj kompatemeco,
Mi fianĉiĝos kun vi en fideleco,
kaj vi ekkonos la Sinjoron. (2, 18.21-22)*

Sed la homoj neniam estintus kapablaj restarigi la interligon laŭ nerompebla fideleco; pli aŭ malpli frue ili revenintus al nefideleco, ili estus malsanktigintaj la amon, interŝanĝante ĝin kun la egoismo.

Pro tio, estis necese, ke *la interligo estu restarigita kaj fondita sur la fideleco mem de Dio*. Estis necese, ke la Filo, la Vorto de la Patro, enkarniĝu por restarigi en sin mem, en sian karnon, la komunecon en la amo.

NOVA INTERLIGO,
BAZITA SUR LA FIDELECO DE DIO

La ne-ebleco de la homo daŭre fideli interligon kun Dio, povis trovi solvon nur enirigante la koron de la homo en la koron mem de Dio. Nu, pro tio, ke la homa koro ne povas iĝi dia, la koro de Dio iĝis homa koro.

Dio, Kiu kreis la homon laŭ Sia bildo kaj similo, volis Li mem fariĝi simila al li.

*Kaj la Vorto fariĝis karno
kaj loĝis inter ni. (Jo 1, 14)*

La similo de la homo al Dio tiamaniere fariĝas - pro mirinda plano, kiun nur la koro de Dio kapablis imagi kaj konkretigi - *similo de Dio al la homo!*

*(Kristo Jesuo) sin malplenigis,
alprenante la formon de sklavo,
fariĝante laŭ la bildo de homoj. (Fil 2, 7)*

*Tiu, kiu vidis min, vidis ankaŭ la Patron.
[...] Ĉu vi ne kredas, ke mi estas en la Patro
kaj la Patro en mi? (Jo 14, 9-10)*

La homa travivaĵo de Jesuo, filo de Dio kaj Filo de Maria Virgulino, vera Dio kaj vera homo, surprenas mirindajn trajtojn, kiuj havas radikojn en la profunda intimeco inter Jesuo kaj la Patro.

Kaj ja en la koro de Jesuo enradikiĝas la interligo, kiu fariĝas nedetruenda, decida, fidela kaj perfekta.

La interligo Jesuo-Patro kaj konsekvence homo-Dio, manifestiĝas laŭ pluraj facetoj. *Kontemplado kaj aŭskultado de la Patro. Jesuo vidas la Patron kaj Tiun aŭskultas.*

*Vere, vere, mi diras al vi:
la Filo ne povas per si mem fari ion,
krom tio, kion li vidas la Patron faranta;
ĉar kion ajn Li faras, tion la Filo tiel same ankaŭ faras.
Ĉar la Patro amas la Filon,*

*kaj montras al li ĉion, kion Li mem faras;
kaj Li montras al li farojn
pli grandajn ol ĉi tio,
por ke vi miru. (Jo 5, 18-20)*

*Mi jam ne nomas vin sklavoj,
ĉar la sklavo ne scias,
kion lia sinjoro faras;
sed mi nomis vin amikoj,
ĉar ĉion, kion mi aŭdis de mia Patro,
mi sciigis al vi. (Jo 15, 15)*

Amo kaj obeo al la Patro. La aŭskultado kaj la kontemplado de la Patro, iĝas en Jesuo amo kaj obeo. En ĉi tiu interrilato amo-obeo, ni vidas la koron de la nova interligo.

*La mondo sciu,
ke mi amas la Patron,
kaj kiel la Patro ordonis al mi,
tiel mi faras; (Jo 14, 31)*

*Mia nutraĵo estas
plenumi la volon de Tiu, Kiu min sendis
kaj fini Lian laboron. (Jo 4,34)*

*Kaj Tiu, Kiu min sendis, estas kun mi:
Li ne lasis min sola;
ĉar mi ĉiam faras tion,
kio placas al Li". (Jo 8, 29) "*

La obeado de Jesuo al la Patro fariĝas la esenco mem de lia vivo, de lia morto-resurekto, de lia misio.

*... kaj troviĝinte laŭfigure kiel homo, li sin humiligis
kaj fariĝis obeema ĝis morta,
eĉ ĝis la morto per kruco. Fil 2, 8)*

Ĉi fideleco de Jesuo al la Patro ne restas fermita en li kaj ne estas preskaŭa lia monopolo; ĉio, kio Jesuo estis sur la tero, kaj ĉio, kion li faris, estas «por ni homoj kaj por nia savo» (El la *Kredo* dum la meso).

Konsekvence, ĉi fideleco devas fariĝi nia.

Kaj nia ĝi fariĝas, pere de la ago de la Sankta Spirito, tiel kiel Jesuo mem ĝin anoncis al ni.

*Kiam venos la Spirito de la vero,
li gvidos vin en ĉian veron,*

*ĉar li parolas ne de si mem,
sed kion ajn li aŭdos, tian li parolos
kaj li anoncos al vi venantajn aferojn.
Li gloros nun, ĉar li ricevos el miaj
kaj anoncos al vi.
Ĉio ajn, kion la Patro havas, estas mia;
tial mi diris, ke li ricevos el miaj
kaj anoncos al vi. (Jo 16, 13-15)*

La donaco de la Spirito estas farita de Jesuo al ĉiuj homoj, al la homaro tuta, en ĝia kuneco kaj al la unuopulo.

De ĉi tiu donaco de la Spirito - kiu fondas la fidelecon de la homo al la Dia interligo - la eklezio estas en la mondo la ĝermo, la videbla signo, la nesto.

Fakte, de la sango de Jesuo, verŝita sur la kruco, naskiĝis la nova alianco inter Dio kaj la homoj. Ĝi:

- ❖ manifestiĝis kaj ekvivis en la resurekto,
- ❖ estis konfirmita kaj donita de la Sankta Spirito dum Pentekosto, kiam la eklezio naskiĝis.

La eklezio estas «la signo de la nova interligo», tiel kiel la ĉielarko estis la signo de la antikva interligo, renovigita de Dio post la diluvo.

En la eklezio, senmakula edzino de Kristo, la fideleco de la homo estas subtenata de la fideleco de Dio kaj pro tio ĝi fariĝas nedisigebla. Oni ne plu povos rompi ĉi interligon, neniam.

La sep sakramentoj estas siavice - en la eklezio - la signoj de ĉi interligo nova kaj definitiva. Pli detale:

- ❖ la *bapto* enigas ĉiun kristanon en la interligon kun Kristo kaj lin konsekras al Dio: ĉiuj postaj konsekroj estas jam ĝerme entenitaj en ĉi tiu sakramento;
- ❖ la *eŭkaristio* kununuigas la kristanon kaj la eklezion tutan kun la Jesuo al la interligo eldirita surkruce de Jesuo kaj faras, ke ĉiuj kredantoj estu korpo ununura: la korpo de la edzino de Kristo, nome, de la eklezio;
- ❖ la *geedziĝo* "greftas" la interligon viro-virininon kaj gepatroj-filoj (familio) sur la interligon Jesuo-eklezio.

Ĉio ĉi tio estas ĉiam kaj nur fondita sur la *fideleco de Kristo al la Patro*, fideleco, kiu respegulas la *dian interligon de la tri Personoj*.

La nedisdividebla amo inter la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito fariĝis la amo *plena je kompatemo* je kiu Jesuo amas kaj konas siajn ŝafidojn, kaj tiujn vokas laŭnome, kaj por ili fordonas sian vivon. Ĝi fariĝis la amo de Jesuo al sia eklezio!

Por bone kompreni la duoblan dimension - personan kaj komunuman - de ĉi tiu interligo de la homo kun Dio en Kristo kaj en la eklezio, necesas rilati al la itinero de la interligo, tiel, kiel ĝi komenciĝis ĉe la popolo de Dio.

Ĉirkaŭ Sinajo ĉeestis la tuta popolo de Izraelo, dum sur la monto Dio donis al Moseo la ordonojn kaj konsentis pri la interligo.

Descendinte de la monto, Moseo celebris la riton de la interligo, mortigante la bestojn de la ofero kaj verŝante ties sangon sur la popolon, dum li diris:

*Jen estas la sango de la interligo,
kiun la Sinjoro faris kun vi. (El. 24, 8)*

Ĉiu izraelido sin sentis envolvita en ĉi interligo, ne nur kiel unuopulo, sed interne de nacio, de popolo. Li samtempe vivis la duoblan dimension:

- personan, unuopulan
- komunuman-nacian

La fakto, ke ĉi interligo estis farita pere de ago kolektiva, socia, - kio iamaniere ĉiujn sendistinge envolvadis - donis pli grandan forton kaj garantion al la persona aspekto, kiu signis la respondecon de ĉiu unuopa izraelido.

Io simila okazis dum la lasta vespermanĝo, kiam Jesuo estigis la Eŭkaristion, dirante:

*Ĉi tiu kaliko estas la nova interligo
en mia sango,
kiu estas elverŝata por vi. (Lk. 22, 20)*

Ĉiu apostolo sin sentis envolvita persone kaj senpere, sentante tamen, ke tiu gesto envolvadis ilin ĉiujn. Kaj en tio li sin sentis subtenata, iamaniere *garantiita*.

Tiel same, kiel en la mateno de Pentekosto, la apostoloj kaj la 120 disĉiploj persone sin sentis inunditaj de la Sankta Spirito, sed sentis, krome, ke la donaco de la Spirito, envolvadis kaj rilatis al la tuta naskiĝanta eklezio.

Ĉi dimensio duobla - unuopula kaj komunuma - ĉeestas evidente ankaŭ en la kristana geedziĝo: la du geedzoj sin sentas envolvitaj en la interligo kun Jesuo, kaj je unuopa kaj je duopa nivelo, kaj pli poste je nivelo familia, kaj fine interne de la kristana komunumo, kiu lasta fariĝas atestanto kaj garantianto.

KRISTO, BILDO KAJ SIMILO DE LA PATRO

Kiam Dio decidis krei la homon, Li - kiel ni jam citis - diris:

*Ni kreu homon laŭ Nia bildo,
similan al Ni. (Gen 1, 30)*

Sed *bildo kaj similo* de Dio ne estas nur la homo, kiel spirita estaĵo. Tio ne estas la nura sekso-hava paro. Eĉ, la vera kaj perfekta bildo-similo enestas nek en Adamo nek en iu ajn el ties idoj... sed nur en Jesuo Kristo. Tiu estas la perfekta kaj nesuperebla bildo de Dio!

*[La filo de Dio]
estante la elbrilo de Lia gloro*

*kaj plena bildo de Lia substanco,
kaj subtenante ĉion per la vorto de sia potenco.*

Ĉi aserton ni trovas je la komenco de la letero al la Hebreoj (1, 3). Per tiuj vortoj, la aŭtoro de la letero al ni komunikas la saman mesaĝon kaj eĉ plifortikigas - se tiel diri - la aserton, pli konvinkige: ne simple *bildo kaj similo*, sed ankaŭ «la elbrilo de Lia gloro» kaj «plena bildo de Lia substanco».

Sed Jesuo posedas ne nur por si mem ĉi tiun bildo-similecon kun Dio. Ĝin li transdonas ankaŭ al ni!

Jesuo el Nazareto, naskiĝinta el Maria Virgulino, iamaniere bezonas nin ĉiujn.

Diras krome la Letero al la Hebreoj (2, 16-17):

*Ĉar vere li ektenas ne anĝelojn,
sed la idaron de Abrahamo li ektenas.
Tial li devis en ĉio similigi al siaj fratoj,
por ke li fariĝu kompatema
kaj fidela ĉefpastro
en la aferoj de Dio,
por fari repacigon por la pekoj de la popolo.*

Jesuo - en la plano de Dio - ne estas sola, sed li envolvas nin ĉiujn en sia estaĵo. Sankta Paŭlo diras al la Galatoj (3, 28):

Vi estas *unu* en Kristo Jesuo.

Jesuo estas en ni kaj ni en Jesuo.

Jen la plej grava punkto en la revo de Dio! *En Jesuo, ni plenrajte iĝas bildo kaj similo de Dio!* En maniero nesuperebla.

La kristana geedziĝo - tiu, kiun Sankta Paŭlo nomas *sakramento, mistero* - estas sekve io senmezure supera al kiu ajn eĉ se ege bone okazinta natura geedziĝo, pro tio, ke celebrata ĝi estas en la sanktejo mem de Dio, tie, kie Jesuo al ni transdonas siajn proprajn bildon kaj similon kun la Patro.

* * *

Ni haltu momenton, antaŭ ol pli-enprofundiĝi en ĉi *granda mistero* (kiel ĝin nomas Sankta Paŭlo en Ef. 5,32) de la edzeca raporto inter Kristo kaj la eklezio, sur kiu sin bazas la kuniĝo de la kristanaj geedzoj.

Fakte, ni devas eniri ĉi misteron kun *bone alpretigita kaj akceptema animo*. Nu, ni estas irantaj trans la racio, por senti, ke ni estas kaptitaj de Jesuo kaj, ke de ties amo ni estas nerezisteble gvidataj.

Ĉu ni kapablas apudiĝi al Jesuo? kompreni ties amon? ami lin? Li estas la perfektega *bildo kaj similo* de la Patro: sed kiamaniere ni taksas ĉi bildo-similon?

Se alkroĉitaj ni estas al niaj posedaĵoj, al niaj planoj, al nia vivo kaj al la ĉiutagaj kontentiĝoj, kiamaniere ni povas eniri en Jesuon, kaj lasi ke li en nin eniru?

La supra ne devas ŝajni pia instigo, ekstertempa prediko: ĝi estas la konkretaĵo de la mistero! Aŭ oni stariĝas kiel *kredanto*, kiel *amanto*, aŭ kondamnitaj oni estos resti ekster la

kristana realaĵo, nome ekstere
de Kristo Jesuo.

Pro eterna volo de la Patro, kreitaj ni estas por *esti unu* en Jesuo: nur tiamaniere ni partoprenas en la bildo kaj similo de Dio.

«Kiu min amas...», «se vi min amas...», diras Jesuo. Temas pri amo. La amo transfiguras ĉion. Se ili ne estas legataj kaj akceptitaj kiel *spirito kaj vivo de amo*, ĉiuj tiuj vortoj restas senemocia rezonado, ili restas sigel-fermita libro.

Jesuo estas tiu, kiu nin enkondukas en la misteron de la dia amo. Nur apudiĝante al Jesuo kun la simpla amo de infano, oni povas kompreni la amon dian kaj lasi, ke oni transformiĝu al ĝi.

Nu..., la kapablo, kiu nin helpas kompreni la amon - kaj, konsekvence, kompreni la mision de Jesuo, lian realaĵon de edzo de la eklezio kaj de ni ĉiuj - ĉi kapablo ne estas la racio, sed la koro. Koro milda kaj humila, ĝuste kiel la koro de Kristo.

*Lernu de mi,
ĉar mi estas milda kaj korhumila. (Mt 11, 29)*

GEEDZA INTERLIGO: INTER KRISTO KAJ LA EKLEZIO

La tuta vivo de la homoj enfermita estas en la ama interligo kun Dio, Patro, Filo kaj Spirito. Dio estas amo, kaj nur per amo Li agas; kaj ĉio, kio estas amo tradukiĝas al la termino interligo.

Ĉiu kreita estaĵo eniras do rilaton de interligo kun Dio, interligo kies kondiĉoj estas metitaj nur de la parto de Dio - kiel Li faris kun Moseo kaj kun la izraela popolo sur monto Sinajo - sed ili estas ĉiam kaj nur favore al la kreitaĵoj.

En la realo de la geedziĝo kaj de la familio, ĉi interligo akiras gravecon pli grandan.

Pri tio diras al ni Sankta Paŭlo - ĝuste koncerne la geedzan union - en la letero al la Efesanoj, por pruvi al ni, ke la kristana geedziĝo estas unu el la signoj la plej perfektaj de la interligo de Dio kaj la homoj, en Kristo.

*Edzinoj, submetiĝu al viaj edzoj
tiel same, kiel al la Sinjoro.
Ĉar edzo estas kapo de edzino,
kiel ankaŭ Kristo estas kapa de la eklezio:
kaj li estas la savanto de la korpo.
Sed kiel la eklezio sin submetas al Kristo,
tiel ankaŭ edzinoj
al edzoj en ĉio.
Edzoj, amu viajn edzinojn,
kiel Kristo amis la eklezion
kaj pro ĝi sin donis, por ke li sanktigu ĝin
per akvolavo,
kun la vorto,*

*por ke li starigu ĝin antaŭ si glora eklezio,
ne havante makulon, nek malglataĵon,
nek ion tian,
sed por ke ĝi estu sankta kaj sendifekta. [...]
Ĉi tiu mistero estas granda,
sed mi parolas pri Kristo kaj la eklezio. (Ef. 5,22-32)*

La senlima amo de Dio estas plena konsekriĝo de ĉiu persono al la aliaj, ĝi estas interligo de senlima fideleco, kiu faras el tri personoj unu solan Dion.

Nu: ĉi tiu senlima amo, enkarniĝinta en Jesuon Kriston kaj en lian koron, fariĝas *doni la vivon* ĝis la morto sur kruco por la homaro.

Ĉi *krucumita amo* estas la deirpunkto de la kristana amo, kaj ankaŭ de la amo intergeedza kaj familia. La surkrucumita Jesuo fariĝas la radiko de la *jeso al la amo*, kiu formas la esencon de ĉiu geedziĝo-sakramento.

Inter la natura geedziĝo kaj la geedziĝo sakramento estas ĉi tiu abisma diverseco: la kristana geedziĝo estas daŭrigo kaj pliampleksigo de la amo per kiu Kristo foroferis sian vivon surkruce.

Oni do geedziĝas en kirko, nur se oni bone konscias, ke amo inter edzo kaj edzino havas la celon «doni la vivon ĝis - se necese - la morto por la kunedzo aŭ por la filoj». Sed tion oni faras kun profunda konscio pri amo plenplena je ĝojo, je paco kaj je fideleco al la interligo.

Kaj estas en ĉi tiu *amo ĝis la fordono de sia vivo*, ke ĉiu ago trovas kialon kaj forton interne de la familio: preĝo, harmonio inter ĝiaj membroj, strebado, libero, studado, malsanoj, ĝojo kaj doloro, vivo kaj morto, ĝis tiu tre alta formo de fekundeco, kiu estas la *kristana edukado*.

Jes ja, la deirpunkto kaj la plej alta supro de la kristana edukado de la filoj ne estas pedagogia metodo, sed fordono de si mem ĝis la heroismo de la morto!

*Ĉi tiu mistero estas granda:
sed mi parolas pri Kristo kaj la Eklezio. (Ef 5,32)*

Sankta Paŭlo inkluzivas la tutan geedziĝon en tiu pli vasta realaĵo, kiu estas la eklezio. La geedziĝo de

kristano ne estas simpla *rito*, kiu *ĉemetiĝas* je la natura geedziĝo, kaj ĝi ankaŭ ne estas beno, kiu garantias apartan asistadon de la Sinjoro. Tio ĝi ja estas, sed ĝi estas ege pli multe ol tio!

Ĝi estas *la mistero de amo inter Kristo kaj la eklezio*, kio elfluas el la koro de Kristo kaj plufluas al la rilato inter kredanta viro kaj kredanta virino.

Ĉu tio ne estas mirinda?

La kialoj de la natura ordo sufiĉas por postuli de la geedzoj fidelecon, amon, sindonemon reciprokan. Sed la kristana revelacio donas al la amo ian profundecon, kiu venas de la malapudego kaj kondukas tre foren.

Ĝi venas de Dio kaj al Dio gvidas.

Ĝi venas de Kristo kaj al Kristo gvidas.

La tuta vivo de la homo - estu tiu pri tio konscia aŭ nekonscia - estas celi al la amosenmezureblo, sen adjektivoj kaj sen limoj; temas pri amo al dia konsekriĝo, al eterna interligo.

Geedziĝo kristana kiel konsekriĝo

La termino *konsekriĝo* signifas, fundamente: aparteno de iu homo, aŭ de iu aĵo, al iu, en maniero plena kaj neforprenebla. La termino estas uzata preskaŭ ekskluzive en la religia medio, ĉar kutime ĉi konsekriĝo aŭ aparteno havas kiel objekton Dion mem.

La vera konsekriĝo estas dediĉita nur al Dio, kaj ĝi celas Liajn gloron kaj volon: tio okazas ankaŭ kiam oni konsekriĝas al la servo de la gefratoj.

Multaj opinias, ke nur la sacerdota, religiula, misiista vivoj povas havi valoron kaj signifon de konsekriĝo, dum la geedza kaj familia vivo estas fremdaj je tiu medio.

Sed laŭ la spirito de la Evangelio, ankaŭ la vivo de la geedzoj, kiuj starigas familion estas ja vera konsekriĝo al Dio, Kiu estas amata kaj servata en la kunedzo, en la filoj, en la fratoj.

Kiel oni povus nei, ke la sindediĉo de edzo al la edzino kaj de edzino al la edzo ne estas vera kaj pura konsekriĝo? Se «la du fariĝas ununura karno», kiamaniere oni ilin povus eksterigi de la konsekriĝo, kiu estas reciprokeco en aparteno? ĉu ne estas la geedzoj, kiuj konsekriĝas unu al la alia?

Tamen, la geedziĝa unuiĝo estas ankaŭ konsekriĝo al Dio en Kristo. Fakte, la amo de la geedzoj sin bazas sur la modelo de la dia amo. Kaj estas ĝuste la reciprokeco de la aparteno de la tri diaj Personoj, kiu estas la fundamento de ĉia homa amo kaj de ĉia *konsekriĝo*.

Ne estas vere, ke la geedza-familia vivo celas malplimulte al la sankteco ol la religia vivo. En ambaŭ oni povas konsekriĝi ĝis niveloj de sankteco, kiuj neniam havas limon, kaj *estas ja peko, ke al la kristanaj geedzoj oni kutime ne proponas sanktecon, kiel normalan idealon, kiel logikan sekvon de la sakramento de la geedziĝo.*

Inter la formoj de konsekriĝo-interligo, tiu geedziĝa estas la unua, la plej necesa. Kaj, se en la religia konsekriĝo oni povas efektiviĝi pli radikalman unuiĝon kun Dio, estas ankaŭ vere, ke ĉiu geedziĝo celas - laŭ la planoj kaj laŭ la volo de Dio - plene konkretigi la unuecon de la Triunuo, la konsekriĝon de la Personoj, la interligon en la paco.

Geedziĝo inter kredantoj, kiu ne celas al plena konsekriĝo, jam de la komenco estas netrafita geedziĝo: kaj ĝi estas netrafita en ĝia esenco mem kaj en ĝia praa celo.

Sekve, *eduki al amo* estas tasko, devo de ĉiuj al ĉiuj. Eduki al konsekriĝo, eduki al interligo estas tasko, kiu celas helpi ĉu viron ĉu virinon cele, ke ĉiu estu si mem, cele, ke ĉiu konkretigu la unikan planon de Dio.

Nur pli poste venos la diferenciĝoj: sacerdoteco, religiula vivo, geedziĝo-familio, Sed ĉio devas okazi sub la signo de la konsekriĝo kaj de la interligo.

Nome, de la amo.

3. - Kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero

LA INTERLIGO DE AMO, LEĜO UNIVERSALA

Ankaŭ Dio havas Siajn leĝojn. Temas pri leĝoj de amo, Eĉ! temas pri *la leĝo de la amo*; ĝi ne estas io *malsama* de Dio, io *ekstera* al li, ĉar Dio identiĝas kun la leĝo: unu leĝo, tre simpla, en kiu enestas Lia esenco kaj Lia vivo: vivo de tri Personoj, rekondukita al la unueco de amo ununura. Dio estas amo kaj Lia ununura Leĝo estas ami.

Ĉi leĝo, kunigante inter ili la tri Personojn - Patro, Filo kaj Sankta Spirito - povas krome nomiĝi *interligo*. Temas pri interligo de amo.

Ni povas pluiri kaj uzi - apud la terminoj *leĝo* kaj *interligo* - ankaŭ *konsekriĝo*, ĉar ĉiu dia Persono estas *konsekrita* al la aliaj, nome, *apartenas* al la aliaj laŭ senlima kaj eterna donacado, kiu neniam ĉesas kaj neniam povas subiĝi al ia pento.

Ĉi tiu leĝo de amo, aŭ interligo, aŭ konsekriĝo de la diaj Personoj al amo ununura, descendas *kiel universala leĝo* en la tutan kreitaron kaj iĝas la *leĝo de la kreado*, la *leĝo de la kreitaĵoj*:

kiu ilin estigas, kiu ilin kreskigas kaj faras, ke ili atingu sian celon, sian perfektigon, kiu ilin harmoniigas inter si;
kiu enhavas kaj klarigas en si mem ĉiujn aliajn leĝojn ĝis la plej etaj kaj nekonataj;
kiu ilin koncentrigas en la realigon de la granda plano de Dio: *la universala plano de la kreo - elaĉeto kaj savo*.

Ni daŭre trarigardas ĉi tiun planon por pli bone ĝin kompreni, kaj tiamaniere je ĝi ni restas ĉiun tagon pli kaj pli mirigitaj kaj admiroplenaj, malkovrante pli kaj pli da novaj perfektaĵoj kaj da novaj misteroj.

Ĉiu aĵo, ĉiu evento nin rekondukas al la amo.

Kaj ĉio estas malkovrita kiel momento de alianco, kiu inter ili *kunligas* ĉiujn estaĵojn, ilin igante reciproke dependantaj unu de la alia kaj ilin *konsekrante* iasence unujn al la aliaj.

La leĝo, kiu reguligas la vivon de Dio montriĝas fundamenta, ĉefe rilate la geedziĝon kaj la familion. Temas pri lego, kiu, antaŭ ol esti devo, estas postulo, *interna neceso*, profunde enradikiĝinta.

Ni diru pli multe: antaŭ ol esti devo kaj postulo, la leĝo de amo estas donaco, kiun Dio faras al ĉiu kreitaĵo: ĝi estas iaspeco de vivo-trans donado.

Enmetante Sian amon en la homan koron, Li kvietigas lin en la paco, Li turmentas lin dum la provo, lin Li pliglorigas pro la ĝojo de la posedata bono.

La vivo de familio bazita sur kristana geedziĝo respegulas la vivon de Dio kaj la kunecon inter Kristo kaj ties eklezio.

Sed, se en Dio ĉio estas enfermita en unu sola leĝo - senlima, esenca, ege simpla - niaflanke ni devas priskribi tiun leĝon per pluraj esprimoj, kiel nunon da leĝoj, kiuj estas unuope unu la kompletigo de la aliaj: neniuj estas kompleta per si mem.

Ni nomos ilin la «*leĝoj de la interligo*».

Ili prezentas ses manierojn eldiri la neesprimeblan misteron de Dio kaj konkretigas ĉi tie sur la tero - kaj aparte en la familio - tion, kio efektiviĝas en la ĉielo.

Kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero!

LA UNUA LEĜO:

NE EKZISTAS «MIA» KAJ «VIA»

SED ĈIO «VIA» ESTAS «MIA» KAJ ĈIO «MIA» ESTAS «VIA»

En Dio, ĉio, kio apartenas al la Patro apartenas ankaŭ al la Filo, kaj la samon oni povas diri pri la Sankta Spirito. Ni renkontas tre trafan aserton de Jesuo, pri kiu raportas al ni la Evangelio de Johano:

*La Spirito de la vero... li gloros min,
ĉar li ricevos el miaj kaj anoncos al vi.
Ĉio ajn, kion la Patro havas, estas mia;
tial mi diris, ke li ricevos el miaj
kaj anoncos al vi. (Joh 16, 13-15)*

Patro kaj Filo kaj Spirito posedas ununuran kaj nedisigeblan amon, kio estas ilia vivo mem. Neniu el la Personoj posedas la amon en maniero ekskluziva kaj ĵaluzo-provoka.

La Patro ne estus la Patro, se Li forlasus de la amo la Filon.

La Filo ne estus la Filo, se de la amo Li forlasus la Patron.

La Sankta Spirito ne estus la Sankta Spirito, se tiu ne ĝuus je la sama senfina ĝuo, pere de kiu la Patro kaj la Filo interkomunikas kaj akceptas unu la alian.

Tiel same en la geedziĝo. La amo, kiu riĉigas la edzon, devas esti posedata kaj kundividita de la edzino.

En la familio, ĝojoj, doloroj, zorgoj, planoj, devas fariĝi komunaj kaj je ili, ĉiuj devas partopreni. Ĉiuj festas por ĉiu, kaj ĉiu por ĉiuj. Nome: oni festas *kune!*

Ĉi tiu estas tre bela formo de konsekriĝo. Konsekriĝi al la bono de li, de ŝi, de la filoj, de la gepatroj. Jen, kio estas la sekreto por esti feliĉaj.

En la momento, kiam oni provas starigi barilon, signi *propraĵon*, komencas manki la konsekriĝo, la amo ĉesas.

Estas la komenciĝo de la fino...

LA DUA LEĜO:

MI EKZISTAS «POR VI», MI REALIĜAS «EN VI»

Kiam ni vivas kiel emantaj al aŭ serĉantaj alian homon kaj el tiu homo ni preskaŭ faras la celon de nia vivo, ni povas inspiri nin je du sentoj malsamaj:

- ❖ mi serĉas la alian, ĉar tiun mi bezonas, de tiu mi dependas, ĉar ties ĉeesto kontentigas min: mi serĉas tiun *por mi*, ĉar tiu al *mi plaĉas*.
- ❖ mi serĉas la alian, ĉar mi deziras ties bonon, ĉar tiun mi volas riĉigi per tiuj bonaĵoj - materiaj aŭ spiritaj -, kiujn mi posedas, kaj mi volas, ke el tiuj la alia ĝuadu kune kun mi; tiun mi serĉas *por li*, *por ŝi*, ĉar mi volas *ties bonon*; ties bonon mi volas en la mia, kaj en ties bono la mian.

La unua estas egoisma sinteno: la dua altruisma. Kutime, kunekzistas la du sintenoj, sed ofte unu superregas sur la alia.

Se la unua superregas, ne ekzistas la vera amo, sed ia formo de sklaveco, de dependeco, kiu celas fermi la du en *senkonkluda cirklo*, en kiu ili fariĝas pli kaj pli posedemaj, kaj ili baras al si ĉian malfermiĝon al la senlimaj riĉaĵoj, kiuj estas ĉirkaŭ ili.

Se la dua supervenkas, temas pri vera amo; tiu povas naskiĝi nur ĉe koroj liberaj, kiuj bonon serĉas cele al bono.

Nur Dio estas la senlima amo, kiu amas kun plena perfekto la Bonon por si mem. Pro tio, ke senlime Li amas sin mem, la Patro estas tute por la Filo: Li konkretigas Sin mem, Sian *esti Patro*, ĝuste amante la Filon kaj dezirante, ke Lia tuta Bono estu ĝuata de la Filo, eĉ, ke ĝi estu Sia Filo mem.

Sammaniere, la Filo estas ĉio por la Patro kaj li himnas al la senfinaj perfektaĵoj de la Patro, ĝuste sin akceptante kaj sin sentante senlime amata de la Patro. La Filo realiĝas en la Patro, per la akcepto kaj sentante, ke de la Patro li estas senlime amata.

La Sankta Spirito estas la ĝuado mem de la Patro kaj de la Filo, ĝi estas la ĉirkaŭbrako per kiu la Patro kaj la Filo enmetiĝas unu en la alian, per kiu ili diras unu al la alia kaj reciproke interŝanĝadas tiun rilaton de senlima amo.

Paralele: la edzo ne serĉas la edzinon precipe por tiu ĝuo, kiun li sentas, ŝin posedante; pravigebla estas ĉi sento kaj oni ne devas forpeli ĝin, kontraŭe, oni devas ĝin kun danko akcepti kiel donacon de la bona Dio.

Sed unue la edzo la edzinon serĉas por la bono, kiun al ŝi li komunikas; fakte, la edzo volas, ke la edzino ekzistu, ke ŝi bone fartu, ke ŝi kresku en beleco, sano, bono, ke ŝi estu feliĉa! Kaj tio devas reciproke okazi.

Kiam momentoj malfacilaj prezentiĝas, tiam la ununura zorgo de la geedzoj estos resti en harmonia kuneco por alfronti la komunajn malfacilaĵojn, por ilin solvi en konkordo, celante al la samo.

Fina kontentiĝo por ambaŭ estos la ĝojo konstati, ke ilia parulo estas serena.

Tiamaniere oni kreskas kaj oni sin sentas kompletigitaj. Kaj tio ne validas nur por la geedzoj, tio validas por la familio tuta, laŭ la tuta nuancaro de interrilatoj de la filoj al la gepatroj, de la fratoj kaj fratinoj unuj al la aliaj.

Geedziĝo kaj familio estas itinero, kvazaŭ lern-okupo laŭ kiu ĉiuj kune kaj la unuopuloj akiras sperton ami, kaj ami iom post iom unu la aliajn dum la sinsekvigo de la tagoj.

La filoj devas vidi en la gepatroj akordon absolutan, fidelan, tutkoran; se tiu mankas, la filoj fermiĝas en si mem, kaj malakceptas iliajn eduko-celajn intervenojn, eĉ se tiuj estas plen-evidente saĝaj.

LA TRIA LEĜO:

NI ĈIUJ ESTAS EGALAJ.

NE EKZISTAS UNUA KAJ DUA,

NE EKZISTAS PLI-ULOJ KAJ MALPLI-ULOJ,

Kateĥismo instruas al ni, ke en Dio la tri Personoj estas «egalaj kaj distingitaj». La Patro ne estas pli grava ol la Filo kaj la Sankta Spirito ne estas pli malgrava ol la Patro kaj ol la Filo.

Ĉi tio povas ĉio ŝajni problemo de nombra kvanto, materia problemo. Sed en Dio, la enhavo de egaleco estas ege pli riĉa.

En ĝi fakte estas hel-pura konsonanco de volo ununura, kiu deziras, ke la riĉo de unu estu ankaŭ la riĉo de la aliaj.

Tial, egaleco en familio ne estas egaleco kvanta. La gepatroj pli multe donas al filo mankohava, ekzemple, ĉar tiu estas handikapita, malinteligenta, laŭsane pli malfortika. Kaj ili instruas al la aliaj filoj pli multe malfermi la koron al frato aŭ fratino, kiu estas en stato de malavantaĝo.

En la rilatoj inter la kreitaĵoj, kromaĵo donita al unu estas nepre deprenita de alia, kiu ricevas pli malmulte.

En Dio, la Personoj estas kiel puregaj speguloj, kiuj povas nur reflekti sur la aliajn la tutan perfektecon kaj ĝojon de ĉiu el ili.

Estas karaktero de la dia perfekteco, ke ĝi estas samkvanta propraĵo de ĉiuj tri.

En teama ludo, la atingoj apartenas al la tuta teamo kaj samtempe al ĉiu unuopa atleto; progreso de unu estas ĉies progreso.

Tio devas okazi en familio kaj inter geedzoj. La virtoj de unu, egalmezure devas esti priĝuataj de la aliaj.

Ĝuste pro tio: ke ĉio *mia* estas *via*, kaj ĉio *via* estas *mia*.

Pli aĝa frato, kiu helpas etan fratinton prepari la taskojn, ne devas senti sin pli lerta (kaj ankaŭ ne devas doni gravecon al sia supereco), sed, kontraŭe, li devas danki la fratinton, kiu al li donas la oportunon meti

je sia dispono tiujn kapablojn, kiujn la bona Dio al li donis, cele, ke ilin li malavare disdonadu kaj ke tiujn li ne gardu nur por si mem.

Kaj jen montriĝas, en ĝia lumiga vero, tiu Evangelia parabolo, en kiu Jesuo prezentas la sinjoron de la vinberejo, kiu je la fino de la tago donas al ĉiuj laboristoj egalan rekompencan, ĉu al tiuj, kiuj laboris ekde la sunleviĝo ĝis la sunsubiro, ĉu al tiuj, kiuj alvenis nur je la lasta momento.

Ni aŭskultu la kialigon de la domomastro (kiu malkaŝas la stilon de Dio, kiun Jesuo volis al ni instrui):

Amiko, mi ne faras al vi maljustaĵon: ĉu vi ne kontraktis kun mi por unu denaro? Prenu do la vian kaj foriru; mi volas doni al ĉi tiu lasta, kiel al vi. Ĉu ne estas permesate al

mi, fari kun la mia tion, kion mi volas? Aŭ ĉu via okulo estas malbona tial, ke mi estas bona?" (Mt 20, 13-15)

Jesuo volas instrui al ni, ke la parametroj de la homa justeco estas tre striktaj kaj ĉefe ne respektas unu leĝon, kiu estas fundamenta en Dio: *nur estaĵo kompatema estas kapabla je justeco.*

Ni distingas inter *devoj de justeco kaj devoj de amo*, dum en Dio ununura justeco estas amo.

Pro tio, dum ni kutimas diri, ke unue oni devas praktiki justecon kaj poste oni praktikas kompatemon, Dio renversas tiun sinsekviĝon kaj al ni instruas, ke nur kompatoplena koro kapablas atingi justecon, nome realigi justecon, kiu estas bazita sur la amo.

Ni ekkonscias, ke la feliĉon de la familioj - kaj unue de la geedzo-paroj - oni konstruas per tiaj gestoj kaj per tiaj konvinkiĝoj.

Jen, ĉi tio estas vivi laŭ la stilo de Dio, amante, en plena etoso de konsekriĝo-interligo,

LA KVARA LEĜO:

NI ĈIUJ ESTAS UNU. UNU EN ĈIUJ KAJ ĈIUJ EN UNU.

Pluraleco devas fariĝi unueco, restante tamen pluraleco; ĉi tio nin ankaŭ helpas kompreni la misteron de la Unueco-Triunueco de Dio.

Ekzistas radikala diferenco inter persono *ununura* (= sola) kaj familio *kuna*. *Solulo* estas ofte egoisto, retiriĝinta en si mem: li ne interkomunikas.

Kuna familio estas nekalkulebla bonaĵo, ĉar la perfekteco de unu estas potencigita de la maniero laŭ kiu, la aliaj ĝin akceptas kaj ĝin pluvivas. Ĝi estas la triumfo de la komuneco kaj de la interkomuniko.

Ankaŭ en la ekster-familia agado unu el la membroj konscias, ke li povas fari ege pli multe, se li povas kalkuli je la solidareco, je la helpo kaj je la amo de siaj karuloj.

Ni kuraĝas revii, ke, en ne tro malproksima morgaŭo, oni proklamos sankta aŭ beata, ne iun individuon, sed tutan familion, pro sankteco, kiun tiu kune konstruis kaj travivis,

Jes, ja, ĉar diferenco estas inter virto de unuopulo kaj virto de ĉiuj kune kaj harmonie travivita.

Kaj ĝuste ĉi tio estas la sankteco de Dio. La patreco fariĝas - en la dua Persono - fileco; kaj en la tria Persono ĝi fariĝas interŝanĝa donaco. Sed temas pri la sama perfekteco, pri la sama amo,

Homajn komparojn ni tamen uzu, ĉar tiuj pli bone nin povas helpi al kompreno: la potenco de la Patro, en la Filo, estas kompatemo; en la Spirito ĝi estas ĝojo, ĝi estas paco.

Se en familio estas iu, kiu suferas, ĉiuj kun tiu suferas, intime kaj solidare. Se unu el la filoj abiturientiĝas aŭ doktoriĝas, la tuta familio festas kaj kunĝuas.

Soleco estas kancero de familio. Hodiaŭ ekzistas la aglomeraĵo, la amaso, kiu kunigas milionojn da homoj, kiuj ne scias, ne povas, ne volas interkomuniki.

Ni devas lerni *vivi kune* kaj *akcepti nin reciproke*. Pli malbonas disiĝi ol kvereli.

Necesas, ke ni volu kune vivi, se ni volas vivi en konsento.

En familio, kiu konscias pri tio, ke ĝi estas kristana familio. Ĉiu membro konsekriĝas al la servo kaj al la amo al ĉiuj aliaj. Tio estas formo de alianco, kiu potence nin alsimiligas al Dio-unueco.

Ĉi unueco tamen postulas, flanke de ĉiu, la absolutan respekton de la apartaj ecoj kaj apartaj karakteroj de la aliaj.

Gepatroj ne povas antaŭaranĝi nek trudi *vivokliŝon* al filoj: ĉiu malkovras sian vokiĝon kaj ĝin li elektas, ankaŭ se kun la valora kunlabora helpo kaj laŭ la konsilo de la aliaj, inter kiuj unuaj estas la gepatroj,

Por ke plene realiĝu la unueco ama kaj vera de la familio, la originaleco de ĉiu homa estaĵo devas ĝui

respekton kaj esti prizorgata en maniero preciza, ĝuste kiel okazas ĉe Dio, kies unueco konkretiĝas en la plena kaj perfektega respekto de la *distingiĝo* de ĉiu Persono.

La dinamisma unueco de la familia.

En familio, edzo kaj edzino, unuope, havas apartajn rolojn; tio validas ankaŭ por la filoj.

Estas simple, ke ĉiu pensu pri siaj propraj zorgoj kaj engaĝiĝoj, prizorgante eventuale ne meti ilin en konflikto kun tiuj de la familio.

Sed tio ne sufiĉas.

Esti unu por du geedzoj signifas, ke ĉiuj zorgoj de unu estas ankaŭ zorgoj de la alia; ĉiu persona zorgo perceptita devas esti de ambaŭ, same intense kaj same pasie.

Laŭ la kresko de la filoj, ties zorgoj fariĝas zorgoj familiaj, kaj la filoj devas havi la kapablon senti siaj propraj la zorgojn de la gepatroj.

La principo, ke «la du estos ununura karno» etendiĝas do al la tuta vivo. Nur se la malfacilaĵoj estos alfrontataj de ĉiuj kune, oni trovos la ĝustajn solvojn, kaj tiujn oni trovos ne kiel venkojn de unu kontraŭ alia, sed kiel liberan kaj unuaniman konkerojn de ĉiuj.

Nu, devas esti nek venkintoj nek venkitoj, aŭ - pli bone - ĉiuj devas senti sin venkintoj, ne ĉar lia propra tezo superregis, sed pro tio, ke ĉiuj serĉis nur la bonon de la familio, ne la sukceson de sia propra intereso aŭ de sia vidpunkto.

La unueco de la familio havas ne nur valoron psikologian, sed ĝi estas donaco de la ununura kaj sanktega Dio, Kiu celas reunuigi - unuece kaj pace - siajn filojn, kiuj laŭdestine kun Li eterne vivos.

LA KVINA LEĜO:

ĈION, KION MI RICEVAS MI DONACAS

La teologoj diras, ke la Patro estas senlima *donado*. La Filo estas senlima *ricevado* kaj *donado* (unue li ricevas kaj poste li disdonadas tion, kion li ricevis). La Sankta Spirito estas senlima *ricevado*.

La Patro estas la senlima originanta amo, kiu disdoniĝadas.

La Filo ricevas la senliman amon de la Patro, en maniero tiom senlima kaj perfekta, ke li neniom el ĝi forperdas, kaj li ĉion *redonas*, laŭ la sama kvanto kaj laŭ la sama maniero, laŭ kiuj li ricevis.

Kaj lia donaco estas akceptata, ricevita de la Sankta Spirito, kiu ĉion senlime ricevas kaj ne plu donas, En la Sankta Spirito estas la plenumiĝo de la plej granda, la fina, la senlima paco.

Aplikante ĉi tian misteron al nia vivo, ni povas diri, ke nia vivo estas daŭraj disdonado kaj ricevado: aŭ, pli bone, ĝi estas antaŭe ricevado kaj, dualoke, disdonado,

Ĉio bona, kion ni posedas estas donaco de la bona Dio, kaj tion ni ricevis. Nia *stato de kreitaĵoj* per si mem estas daŭra, plena, absoluta ricevado.

Ni estas laŭnature ricevantoj, ankaŭ se ni emas al donado, reciprokadon. Kaj la tuta gustohava konscio pri la amo, la tuta kapablo, la deziro, la neceso ami, ĉio ĉi tio havas ununuran kialon kaj ununuran originon; ni, eĉ antaŭ ol ekzisti, *estis amataj de la Amo!*

Ĝis ni sentas nin *estroj* de la amo, ĝis ni sentas, ke ni estas kapablaj ami per ni mem, ni estas sur erara vojo. Multaj vivekzistadoj malsukcesas pro ĉi tia sin-altigo: ni opinias nin majstroj anstataŭ disĉiploj, sciuloj anstataŭ ignorantoj, ĉiopovuloj anstataŭ plenaj nekapabluloj.

La familio devus esti la privilegia loko, kie oni faras la mirindan sperton de la ricevita amo, por tie poste havi la duan konsekvencon sperton: tiun de la amo redonata kaj reciprokata.

Ĉi-duobla ago, de la ricevo kaj de la donado, estas la bazo de la kristana geedziĝo, ĝi estas la vera, pura rilato inter Jesuo kaj lia Eklezio.

Ne ekzistas iu, kiu nur donas aŭ nur ricevas: kaj neniam ekzistas ago, kiu nur donas aŭ nur ricevas. Ni ĉiuj estas malriĉuloj, ni ĉiuj, tamen, estas kapablaj pliriĉigi la aliajn, ankaŭ se pri tio ni ne konscias.

Helpi la filojn interpenetriĝi en ĉi tiu ricevo-donado, kaj de tio fari vivo-planon, estas fundamento por la edukado.

Sed neniu el la gepatroj kapablas instrui ĉi tiun regulon, se ĝi ne estis travivata persone kun la edzo, kun la edzino, kaj eĉ pli frue, kun la Sinjoro.

LA SESA LEĜO;

ĈIO ESTAS SENKOSTA.

Ĉi-lasta leĝo konsekvenco estas de la antaŭa. Se ĉio estas donado-ricevado, ĉio okazas sub la signo de la senkosteco.

En la vivo triunua, kiel en la krea faro kaj en la elaĉeta ago, ĉio estas senkosta. Tie, kie senkosteco ĉesas, tie ankaŭ amo ĉesas.

Unu el la signoj, la plej evidentaj, de la malvaloriĝo de la homa vivo pro la peko, oni rimarkas en tio, ke la homoj ne plu kapablas donadi plene senkoste, nome, doni kaj ne atendi rekompencan.

La strukturo mem de la nuntempa socio estas tiu, kiu forpelis, kaj kelkfoje eĉ malpermesis la senkostecon kaj la volontulemon.

En unu aŭ en alia maniero *oni ĉion pagas*, kaj precipe *oni neniam volas senti, ke oni estas ŝuldantoj*. Jam la apostolo Petro konsideris ofendo, ke Jesuo volis al li lavi la piedojn.

Ĉi sinteno atencas la familion kaj la amon ekde la fundamentoj: ĝi faras avidaj, ĝi celas personan profiton, nome, ĝi estas egoismo.

En la familio - ankaŭ se multaj aferoj estas senkostaj - ekzistas tamen kelkaj subtilaj pago-formoj: etaj ĉantaĝoj, ĵaluzo-montrado, sintenoj fieraj, envioj kaŝitaj, silentoj kaj doloriga nekapablo interkomuniki...

Eduki la filojn al amo kaj al emo al senŝuldo estas postulo, kiu antaŭ ĉio devigas la gepatrojn esti - inter si - senŝuldaj kaj ne-avidaj en ĉiuj okazoj.

La *di-triumua* vizio de la konsekriĝo helpas kompreni, ke ĉio en la familio devas ja esti vere, plene kaj elkore senkosta,

LA FILOJ ESTAS PARTO DE LA GEEDZIĜA ALIANCO.

LA BENO DE DIO AL LA HOMARO

TRANSKOMUNIKIĜAS PERE DE LA FILOJ

Geedziĝo estas taksata laŭjure perfekta, kiam ekestas konsento de ambaŭ edzoj.

Amo reciproka kaj senŝulda estas ĉio. Ĉu la sacerdoto Elkano ja ne diris al la edzino Ĥana - kiu estis senkonsola, ĉar ŝi ne havis filojn - : «Ĉu mi ne estas por vi pli bona ol dek filoj»? (1 Sam 1, 8).

Jes, du edzoj povas realigi plenecon de amo, ankaŭ se - ni supozu - ne venus al ili filoj. Jam inter ili du povas ekesti perfekta kaj fekunda alianco-konsekriĝo, kiu perfektigas kaj ripozas en Dio.

Sed se filoj venas, tiuj ne estas ia «pluaĝo», ia «posto», ia «aliaĝo».

Ili estas enigitaj kaj enskribitaj en la saman geedziĝan amon, en la saman aliancon de amo kaj de konsekriĝo, kiu interligas la geedzojn reciproke inter si kaj kun la Sinjoro Jesuo.

La filoj ne rilatas alian planon. La filoj estas la *kompletigo de la sola ekzistanta plano*.

Ĉi tia prikonsidero de la filoj ne estas preteksto por kontrabandi la postulon de ia pli alta naskemo. Hodiaŭ, bedaŭrinde, la mondo iras renkonte al memmortigo, ĉar ĝi timas la filojn. Sed ne estas ja pro timo de ĉi tia timo, ke ni pli supre subtenas la enestantan postulon de filoj en la geedza amo.

La filoj estas parto de la konsekriĝo, de la interligo, konsekvence, de la amo. Sekve, ilin forigi aŭ ĉiuokaze ilin timi, je ili rezigni, signifas maltrafi la veran mision de geedzoj, kiu estas *anonci al la mondo la veran amon, ĝis ĝiaj lastaj konsekvencoj*: la filoj, en ilia pleneco de «bildo kaj similo al Dio», de kreitaĵoj vokitaj por sin plene realiĝi en Kristo,

Ĉi tio estas ĉio enfermita en la amo intergeedza kaj en ties plano de vivo, Ĉi tio estas ĉio kompletiga parto de kiu ajn geedziĝo, kiu estas esprimebla kiel konsekriĝo, kiel fordonado de si mem, kiel harmonio kaj interligo de estaĵoj, kiuj serĉas sin reciproke por kompletigi unu la alian kaj por malfermiĝi al la realo tuta.

Ĉi enirigo de la filoj en la ununuran planon de amo, kiun ni nomas geedziĝo-familio, ne ĉesas je la naska ago, sed disetendiĝas al ilia tuta ekzistado kaj ĉefe al ilia edukado.

Ne temas pri simpla didaktika-formiga momento flanke de la gepatroj, sed temas pri gravega momento de komuneco, dum kiu gepatroj kaj filoj sin sentas envolvitaj en unu sola plano de amo.

Edukadi, krome, ne estas *diri* kaj eĉ ne *instrui, lernigi*. Edukadi estas *vivi amante* kaj *ami vivante*.

Edukadi estas *purega ago de senkosta amo*, de amo per si mem, de amo al la bono plej supra, kiu estas Dio kaj kiu estas Jesuo Kristo, de amo al la bildo de Kristo, kiu estas en la

vizaĝo de la frato; finfine: de amo al tre aparta bono, kiu estas la filoj, bildo kaj similo de paĉjo kaj de panjo.

La donaco de la filoj ne celas al io, kio malsamas disde la amo: ĝi lokiĝas en la amo mem de la gepatroj.

Sub ĉi tiu lumo, la filoj estas ĉiam beno, ĉar ili estas parto de tiu beno pri kiu al ni parolas Sankta Paŭlo; kiam li komencas la leteron al la Efesanoj, beno, kiu ekzistas antaŭ la kreo de la mondo kaj por kiu, ni ĉiuj estas elektitaj de Dio-amo «por esti sanktaj kaj senmakulaj antaŭ li, per Kristo kaj kune kun Kristo».

*Fruktu kaj multiĝu,
kaj plenigu la teron. (Gen. 1, 28)*

Ĉi tiu dia beno, ekde la estiĝo de la homaro, trakovris ĉiujn generaciojn, kaj ĝi atingis la apikon en la dia patrineco de Maria, ĉar

*... heredo de la Eternulo estas infanoj;
rekompenco estas la frukto de ventro. (Ps 126, 3)*

Infano naskiĝis! Amo denove venkis!

4. - Interligo de libereco

GEEDZIĜO KIEL ELEKTO DE LIBERECO.

LA VERA SIGNIFO DE LA LIBERECO DE LA HOMO

Libereco estas nuntempe termino ege kaj tro uzata, al kiu oni donas signifojn kiuj kelkfoje kontraŭstaras unu kontraŭ la alia.

Diri, ke geedziĝo estas elekto de libero estas ege pli multe ol diri «mi edziĝas, ĉar tion mi volas», aŭ «mi edzigas kiun mi volas». Ĉi du aspektoj ja bone enestas en tiu libero, pri kiu ni estas nun parolantaj.

Sed en la pri-geedziĝa elekto estas necesa ege pli riĉa kaj pli profunda libero.

Libereco estas parto de la naturo mem de homo, de ties esenco: homo estas homo, ĉar libera.

Libereco estas la interna sinteno, laŭ kiu la homo apudiĝas al la realo, kun la realo identiĝas, alcelas la bonon.

En la marŝo de la libero geedziĝo estas decida momento; la interrilato homo-libereco traviviĝadas duope, kaj la du celas esti unu, realigante la kunfandiĝon al unueco nur je la nivelo, laŭ kiu ili *unuiĝas en libero*.

Estas libero vera tiu, kiu permesas al la du fariĝi karno ununura kaj spirito ununura, nome, tiu, kiu permesas realigi tiun planon de vivo, kiu jam enskribita estas en la kreado de la mondo kaj aparte en la kreado de la homo (viro kaj ino).

Ni klopodu iom pli bone kompreni, kio estas libero, kian rolon ĝi ludas en la homa vivo.

Ni komencu per sufiĉe simpla ekzemplo: kelkaj homoj decidis atingi la lunon. Iri sur la lunon estis, evidente, libera elekto; studis kaj pritaksis la aferon multaj spertuloj kune, kaj tiuj konfirmis la intencon post longaj kaj komplikaj kalkuloj, La fina elekto estis elekto de libereco.

Sed ne temas pri elekto laŭ la tipo «mi faras tion, kion mi volas». Tute kontraŭe! La unua kondiĉo por ebligi surluniĝon estis: koni ĉiujn leĝojn matematikajn, astronomiajn, fizikajn, ĥemiajn, biologiajn, psihologiajn ... kiujn oni devus respekti por iri sur la lunon.

Estis sufiĉe forgesi nur unu el tiuj miloj da leĝoj por fuŝigi la projekton; estis sufiĉe erari je cent metroj en la kalkulon de la distanco inter la tero kaj la luno, aŭ je unu minuto la tempo-daŭron de la itinero, por misigi la entreprenon; estis sufiĉe ne bone kalkuli la eltenemon de la spacaj vesto-kompletoj rilate la aer-premon, por provoki la morton de la astronautoj.

Konsekvence, la baza kondiĉo estis: *perfekte obei ĉiujn leĝojn kaj, sekve, unualoke, ilin ĉiujn koni*.

Sed tiujn leĝojn oni ne devis taksu malamikaj al la homo, kiel se ili estus barilo-riĉa ĝangalo, kiu malhelpis la supreniron de la homo al la luno. Tute kontraŭe: tiuj multenombraj leĝoj estis - kaj estas - ĝuste la savo de la projekto.

Nur se oni vivis en kompleta kaj plena amikeco kun tiuj leĝoj, oni estus atingintaj la celon. Ja la leĝoj estas tiuj, kiuj helpis la homon elŝipiĝi sur la luno,

Iu povus konkludi: ĉi tio, tamen, estas kontraŭa al libero, kiu estas «fari, kion oni volas»; male, en ĉi tiu okazo oni sekvas la principon: «fari, kion oni devas»...

Ni tuŝis la kernon de la problemo, kaj ni estas nin liberigontaj el la plej kolosa miskompreno, en kiun falis kaj faladas nekalkulebla nombro da homoj.

Libero tute ne estas «fari, kion oni volas».

Libero estas la kapablo - kiun nur homo, sur la tero, havas - koni la veran trairetan vojon por atingi tiun celon, kiu li nefiksis laŭ sia propra arbitro, sed enskribita estas en la profundo de lia esto (la kredantoj diras: ĝi estas fiksita de Dio),

Libero devas sekvi la ĉi-suban itineron:

- 1) Koni la realon kaj ties leĝojn;
- 2) Koni la plej superan leĝon; la lastan alcelon, al kiu ĉiuj leĝoj strebas;
- 3) Havi la volon atingi tiun celon;
- 4) Ordigi sian propran iron, respektante kaj leĝojn kaj celon.

Esti liberaj, do, signifas esti kapablaj doni al si taskon kaj sin organizi por atingi - laŭ sia propra iniciato kaj laŭ sia propra konvinkigo - sian lastan celotaĵon, kiu konsistas en sia propra vera bono kaj en sia kompleta plenumiĝo.

Sed kio estas nia fina celo, nia plej alta bono?

Ni reiru al la antaŭa ekzemplo. La homoj, kiuj planis la vojaĝon al la luno, estus povintaj -kaj verŝajne tion ili faris - levi al si demandon:

iri sur la lunon kostas tre multe, kaj ĉi tie, sur la tero, ekzistas centoj da milionoj da malsatantoj; ĉu estas pli bone elspezi la monon por iri sur la lunon, aŭ por resanigi la ekonomiojn de la popoloj, kiuj havas malfacilaĵojn al evoluo?

La demando ne estas sensenca. Antaŭ la etika problemo de la uzo de la mono, oni povas ekvidi iun superan leĝon, kiu diras:

antaŭ ol elspezi monon por entreprenoj utilaj kaj bonaj sed ne necesaj, ĝin uzu por solvi problemojn de justeco. aŭ eĉ de pluvivado!

(nur ekzemplon ni faris ĉi tiel ĉar estas evidente, ke kun pli klarvida kaj malpli egoisma ekonomio oni estus povintaj kaj iri sur la lunon kaj samtempe promocii mondan evolu-planon, kiu estu samtempe unucela kaj laŭ justeco)

En ĉi tiu okazo, ni rimarkas, ke ni estas antaŭ leĝo etika, kiu estas supera rilate ĉiujn leĝojn matematikajn, fizikajn, ĥemiajn, astronomiajn, biologiajn...

Ankaŭ inter la leĝoj estas ia hierarkio. Ekzistas pli aŭ malpli gravaj leĝoj: ekzistas leĝoj, kiuj dependas de aliaj, kaj leĝoj, kiuj influas aliajn malsuperajn leĝojn.

La leĝoj estas kiel granda, plurbranĉa planto: pli alte (temas pri la abundo da branĉetoj, etaj folioj, floroj) situas la plej variaj kaj apartaj leĝoj; iom-post-iome, malsuprenirante, la leĝoj laŭnombre malgrandiĝadas, sed ili fariĝas pli kaj pli gravaj kaj necesaj (temas pri la grandaj ram-etendiĝoj), ĝis oni alvenas je la trunko por poste atingi la radikojn: tie estas ununura leĝo, kiu subtenas ĉiujn aliajn kaj al tiuj donas signifon kaj justigon.

... Kaj, kiu estas ĉi leĝo? *Temas pri la leĝo de la amo*. Ĉiuj leĝoj devenas, estas aplikoj, estas klarigoj de la ununura, plej supera kaj senlima leĝo de la amo, tio estas Dio mem.

Kie ne estas amo, tie oni estas ekstere de la leĝo, tie oni estas kontraŭ la leĝo.

Kaj aldoni oni povas: *kiu malobservas la leĝon de la amo eliras el la libereco*.

Konsekvence, oni povas aserti, ke geedziĝo estas *elekto de libero*, ĉar ĝi portas viron kaj virinon al plena realigo de si mem, kun la celo konkretigi - kune - la vokiĝon al la amo.

Besto aplikas la leĝon de la amo, sed tiun ĝi aplikas laŭinstinkte, obeante ian internan instigon, kiu ne dependas de ĝi, kiu en ĝi ne havas justigon.

Besto ne konas, ne komprenas la leĝon, sed ĝin aplikas, ĉar puŝata de ia forto, kiu ĝin gvidas.

La homo estas libera ne nur, ĉar li povas fari aŭ ne fari, agi laŭ la leĝo aŭ tiun vanigi; antaŭ ĉio, la homo estas libera, ĉar li havas la eblecon interpreti la leĝon, utiligante la kapablojn de la inteligento kaj de la forto de la koro; li estas libera, ĉar li povas plene orienti sin mem kaj sian vivon, pere de siaj propraj elektoj, aktivigante la leĝojn, kun kiuj li konatiĝis.

Sume: li estas libera *fari la bonon!*

La ebleco fari malbonon ne estas libero, sed estas la negativa konsekvenco de la libereco.

Ne estas libera tiu homo, kiu uzas sian seksemon por doni al si solipsistajn kontentigojn; estas kontraŭe libera tiu, kiu kontrolas siajn proprajn instinktojn, tiujn ankaŭ bremsante, por ilin orienti al aŭtentika plano de amo.

Geedziĝo kaj familio estas konsiderendaj laŭ ĉi tiu tipo de libereco. Ne nur estas necese edziĝi en libereco (sen eksteraj trudoj) sed ankaŭ kun libereco (sen internaj trudoj), klopodante travivi la geedziĝon laŭ la perfekta leĝo de la amo (pri tio, vaste ni parolis en la 3.a ĉapitro).

Eĉ pli multe oni povas diri: Geedziĝo, travivata laŭ ĉi tiu leĝo, de tago al tago kreskigas la veran liberecon de la geedzoj kaj, en la morgaŭo, tiun de la filoj.

LA LIBERECO DE LA KRISTANO
CELAS AL LA LIBERECO DE DIO

Ekzamenante la liberecon, kiel ĝi esprimiĝas en la vivo de la homo, ni ion malkovris.

Niaj malkovroj iĝas eĉ pli interesaj, se ni klopodas kompreni kiel Dio - unue en la historio de Izraelo kaj poste kun la alveno de Jesuo Kristo - gvidis sian popolon travivi la liberecon.

Jen la unua konstato, kiu frapas nin: Dio ĉiam sola faras siajn decidojn, kaj poste Li tiujn proponas al la homo.

Li ne diras al la homo: «Sidiĝu ĉe ĉi tiu tablo kaj ni kune pridiskutu». Dio decidas, kaj poste Li diras al la homo: «Ĉu tio taŭgas al vi? Se vi konsentas, bone! Sekvu Min kaj vi ricevos la vivon; se tion vi ne akceptas, vi povas rezigni, sed sciu, ke vi ne plu rajtos kun mi kuniri».

Inter la multaj, jen du Diaj intervenoj, kiuj tre bone esprimas Lian sintenon al Izraelo:

«Mi proponas al vi hodiaŭ benon kaj malbenon;

benon:

*se vi aŭskultos la ordonojn de la Sinjoro, via Dio, kiujn mi ordonas al vi hodiaŭ;
kaj malbenon,*

se vi ne aŭskultos la ordonojn

de la Sinjoro, via Dio,

sed forflankiĝos de la vojo, kiun mi ordonas al vi hodiaŭ,

kaj sekvos diojn aliajn, kiujn vi ne konas». (Rd. 11, 26-28)

«Mi proponis al vi hodiaŭ la vivon kaj bonon,

kaj la morton kaj malbonon;

ordonante al vi

ami la Sinjoron, vian Dion;

iri laŭ Liaj vojoj,

kaj observi Liajn ordonojn

kaj Liajn leĝojn kaj Liajn decidojn,

por ke vi vivu kaj multiĝu,

kaj por ke vin benu la Sinjoro, via Dio, en la lando,

en kiun vi venas, por ekposedi ĝin...

Mi atestigas pri vi hodiaŭ

la ĉielon kaj la teron;

la vivon kaj la morton mi proponis al vi,

la benon kaj la malbenon;

elektu la vivon,

por ke vi vivu, vi kaj via idaro,

amante la Sinjoron, vian Dion,

aŭskultante Lian voĉon

kaj alkroĉante vin al Li...». (Rd, 30, 15-20)

Oni devis liberigi la popolon de Izraelo el la sklaveco en kiun la egiptoj ĝin enprofundigis. Dio elektas Moseon, kaj tiun allogas al si, lin konvinkante preni sur sin la taskon liberigi siajn samlandanojn.

Tre malfacila estis la entrepreno, ĉar unuflanke la egiptoj montriĝis tre firmaj en la decido subigi la hebreojn, tiujn devigante al punlaboro, kaj aliflanke la hebreoj preferis sklavecon senriskan anstataŭ liberiĝo plenplena je neantaŭvideblaĵoj.

Sed Dio persistas ĉe Moseo kaj forigas ties dubojn. Al li, Li transdonas apartan animforton kaj lin Li interne konkeras, per prilumado laŭ la kredo. Moseo devos alfronti la eltenemon de Izraelo, por tiun konvinki pri la boneco de la plano. Kaj Dio, akompanante ĉion per mirindaĵoj, plukonfirmas la faritaĵon de Moseo.

Ankaŭ se oni agnoskas, ke la rakonto de la Biblio enhavas epikan kaj religi-instigan karakterojn, kaj konsekvence, ke la detaloj de la rakonto ne estas plene laŭlitere prikonsiderindaj, oni devas tamen konsenti, ke estis Dio, kiu gvidadis la eventojn. ankaŭ per la supervenko de la kontraŭstarojn de la homoj rilate la efektivigon de Liaj planoj.

Ĉi maniero agi de Dio rilate la homon ne humiligas ties liberecon. Dio persvadas la korojn ne per la uzo de perforto, sed per nemezurebla pacienco, kaj Li atendas, ke la eventoj mem de la historio rompu la obstinemon de la koroj de la homoj.

Kiam - post hezitaj kaj malkonsentoj - eliras el Egiptujo la hebrea popolo, tiu trairas sur senakviĝinta grundo la Ruĝan Maron kaj lasas definitive post si tiun landon kun ĉiuj memoraĵoj ĝojaj kaj malĝojigaj, Dio atendas Izraelon sur monto Sinaj.

Tie, Dio parolas al Moseo, kaj al tiu klare malkaŝas Sian planon:

*«Tiel diru al la domo de Jakobo
kaj sciigu al la filoj de Izraelo:
Vi vidis, kion mi faris al la Egiptoj
kaj kiel mi portis vin Sur aglaj flugiloj
kaj venigis vin al Mi.
Kaj nun se vi obeos Mian voĉon
kaj observos Mian interligon,
vi estos Mia amata propraĵo inter ĉiuj popoloj,
ĉar al Mi apartenas la tuta tero.
Kaj vi estos por Mi regno de pastroj
kaj popolo sankta.
Tio estas la vortoj, kiujn vi diru al la Izraelidoj».* (El. 19, 3-6)

Nu, estas Dio, kiu metas la kondiĉojn. De Izraelo, Li petas nur konsenton. Kiam Moseo ricevos la tabelojn de la leĝo (la dek-ordonaron, t.e. «la dek vortojn») kaj celebros la riton de la interligo, la popolo diros solene:

«Ĉion, kion diris la Sinjoro ni faros». (El. 24, 3)

Kaj kiam Josuo kondukos la hebreojn al la Promesita Lando kaj renovigos la interligon, al ili li memorigos, ke ili estos devigataj ĝin fidele observadi.

La tuta historio de Izraelo baziĝas sur ĉi tiu interrilato, en kiu la libereco de la homo estas en la diro de «jes» aŭ «ne». La Sinjoro metas la kondiĉojn.

Venas Jesuo, kaj kiam li komencas sian publikan vivon, li komencas prediki kaj agi «kiel havanta aŭtoritaton» (Mt 7,29). Jesuo sin starigas, kiel supera al la leĝo mem de Moseo, kiun li ne venas por detrui sed por plenumi, por perfektigi.

*Ne pensu, ke mi venis por detrui
la leĝon aŭ la profetojn;
mi venis ne por detrui,
sed por plenumi.
Vere mi diras al vi:
Ĝis la ĉielo kaj la tero
forpasos, nek unu joto
nek unu streketo forpasos de la leĝo,
ĝis ĉio plenumiĝos. (Mt 5, 17-18)*

Li kuraĝas diri: «Vi aŭdis, ke estas dirite al la antikvuloj... *sed mi diras al vi!*» (kp Mt 5, 21, 48).

Kiel Dio sur Sinaj, ankaŭ Jesuo donas leĝon:

*Novan ordonon mi donas al vi,
ke vi amu unu la alian;
kiel mi amis vin,
tiel vi ankaŭ amu unu alian. (Jo. 13, 34)*

Se vi min amas, vi observos miajn ordonojn. (Jo, 14, 15)

Ĉion ĉi tion Jesuo starigas dum la lasta vespermanĝo; kaj kiel fundamenton de ĉi nova leĝo, de ĉi tiu «nova ordono», Li metas novan interligon, interligon eternan kaj definitivan. Ankaŭ ĉi tiun fojon, kiel sur Sinaj, Li mem, la Sinjoro, decidas la kondiĉojn, sen antaŭa prikonsultiĝo kun la homoj.

*Ĉi tiu kaliko estas la nova interligo
en mia sango,
kiu estas elverŝata por vi. (Lk 20,22)*

Jen estas la stilo de Dio. Li kreis nin liberaj, kaj Li scias, kion nia koro bezonas.

La leĝo ne estas en kontrasto kun la libereco, Kontraŭe, ĝi stimulas kaj provokas nian liberecon. La leĝo estas, kiu faras nin liberaj, kiel Sankta Jakobo al ni instruas:

*Sed tiu, kiu fikse rigardas en la perfektan leĝon,
la leĝon de la libereco,
kaj tiel restas,
ne estante aŭskultanto, kiu forgesas,
sed plenumanto, kiu energias,
tiu estos benata en sia faro. (Jak. 1, 25)*

Ĉi tia libero venas de la vero, Jesuo mem, kiu diris: “Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo.” (Jo, 14, 6)

Kaj ankoraŭ:

*«Se vi restos en mia vorto,
vi estas vere miaj disĉiploj.
kaj vi scios la veron,
kaj la vero vin liberigos ...
Vere, vere, mi diras al vi:
Ĉiu, kiu faras pekon
estas sklavo de peko.
Kaj la sklavo ne ĉiam restas en la domo,
sed la filo ĉiam restas;
se do la Filo vin liberigos,
vi estos efektive liberaj (t.e. por ĉiam)».* (Jo 8,31-36)

La vero, en Dio, koincidas kun Lia libereco; Dio estas senlime kaj neerareme libera aliĝi al si mem. Kaj estas tiu Lia senfina, ĉiopova, eterna fideleco al si mem, kiu fondas la veron.

Vera estas ĉio, kio kun Dio harmonias: Li estas fonto de vero kaj libereco. Agi malsame ol Dio signifus eksteriĝi de la vero kaj disde la bono. Kaj tio ne estas libera,

En Dio, libereco koincidas kun amo, libereca estas Lia amo.

Ĉi libereco kompreni, voli, efektiviĝi la amon estas la granda donaco, kiun Dio al ni faras pere de la bapto, tra kiu Li nin igas esti filoj Liaj.

La libereco estas la signo, ke ni estas filoj de Dio.

Cetere; ĉu ne agas precize tiamaniere la gepatroj? Tiuj decidas havi filon, al tiu ili donas nomon, hejmon ili donas al li, lin ili nutras, vestas, prizorgas, sendas al la lernejo, pridecidas ĉiam *favore al li*: venos la momento, kiam la filo *decidos per si mem*, sed li decidos ĝuste surbaze de tuta *aro da ricevitaĵ donitaĵoj*, kiuj kontribuadis al la starigo de lia personeco.

La supra principo estos helpo al ni, kiam ni parolos pri la edukado de la filoj, edukado farenda en plena libero kaj, kiu pro tio postulas, ke la gepatroj faru la elektojn unuajn: kiel Dio faris, kiel faris Jesuo.

La libero estas ja tiu plena laŭiĝo al la volo de Dio, kio poste konsentas al ni krei, preskaŭ kiel kreas Dio; tio donas al ni la eblecon inventi nenombreblajn bonajn farojn, ĉar ni estas gvidataj de tiu elano; kiun Dio metis en nian koron kaj kiu igis nin liberaj.

Jen, Sankta Paŭlo nin instruas:

*Ĉar vi, fratoj, estas vokitaj al libereco;
tamen ne uzu vian liberecon
kiel pretekston por la karno,
sed per amo servu unu la alian.
Ĉar la tuta leĝo estas plenumata*

en unu diro, jene:

Amu vian proksimulon kiel vin mem. (Gal, 5, 13-14)

Liberaj ni estas ĝis la nivelo, je kiu ni aplikas en nia tuta vivo la leĝon de la amo; unue la amo al Dio, kiu tamen ne estas vera, reala, pura, aŭtentika, se ĝi ne konkretiĝas en la amo al Liaj filoj, nome, en la amo al la proksimulo.

Ĉar kiu ne amas sian fraton, kiun li vidis,

tiu ne povas ami Dion, kiun li ne vidis.

Kaj la jenan ordonon ni havas de Li:

ke kiu amas Dion, tiu amu ankaŭ sian fraton. (1 Joh. 4, 20-21)

Nia libereco konsistas en tio, ke ni kapablas inventi ĉiun tagon novajn formajn kaj iniciatojn por la bono de la gefratoj. Kaj tio igas nin feliĉaj.

Sankta Paŭlo diras al ni, ke la leĝo ekzistas por la bubaĉoj, sed tiu, kiu amas ne plu bezonas la leĝon, ĉar la Dia amo en lin enmetita ja estas la leĝo.

Kiu de Dio venas, ne bezonas leĝon, ĉar la Spirito de Dio estas la leĝo, kiu gvidas lian koron. Paĉjo kaj panjo, edzo kaj edzino, se ili estas veraj, aŭtentikaj, liberaj, ne bezonas leĝon, ĉar ilia koro, puŝata de la Spirito de Dio, estas la leĝo.

Dio estas la leĝo: leĝo libera, leĝo kiu liberigas, kiam tiu leĝo estas akceptata, elektita, amata.

La forto de la leĝo estas la amo, ĉar la amo venas de Dio.

Dio estas amo;

kaj kiu restas en amo, tiu restas en Dio,

kaj Dio restas en li. (1 Joh. 4, 16)

LIBERECO:

KONSISTIGANTO DE LA GEEDZA INTERLIGO

LA GEEDZOJ ESTAS «KONSEKRITAJ JE LIBERECO»

La libereco estas je la bazo de la algeedziĝa elekto, Li kaj ŝi geedzigas, ĉar ili libere elektis unu la alian.

La unua kondiĉo, por ke estu valida geedziĝo, estas, ke oni celebru ĝin en plena libero fare de ambaŭ geedzoj.

Nu, se libero estas stariga elemento de geedziĝo, estas necese, ke por ĉiuj alnuptuloj garantiata estu ĉi libero. Ne nur tio: ili devas ankaŭ esti helpataj elekti en plena libero, nome: *oni ilin devas instrui pri la vera koncepto de libero kaj pri la kristaleca realo de la amo.*

Nuntempe, ĉi tiaj instruoj estas ofte mankaj. Multaj junuloj ne scias, kio - reale, konkrete - estas kaj libero kaj amo.

La celo de ĉi tiuj paĝoj estas precize la jena: helpi kompreni la du fundamentajn

dimensiojn de la geedziĝa vivo, sed ankaŭ de la vivo unuopula. Sen libero vera kaj sen vera amo, oni ne konstruas personecon.

Kelkaj praktikaj sugestoj pli multe utilas ol kiu ajn teorio.

1. La gefianĉoj devus levi al si mem kelkajn demandojn, kiujn ili devus antaŭ ĉio respondi en la sekreto de sia propra konscienco, kaj pli poste, dialogante inter la du. Temas pri tre simplaj demandoj:

Kial mi volas la geedziĝon?

Kion mi celas atingi pere de geedziĝo?

Kial mi volas edziĝi ĝuste al tiu homo kaj ne al alia?

Kio estas alloga por mi en tiu homo?

Kion mi alcelas, kiam mi diras: «mi amas lin, mi amas ŝin»?

Kion mi esperas ricevi de tiu homo?

Kion signifas por mi «ami»?

Kion mi pretas perdi el tio, kio estas mia (materiaj, spiritaj posedaĵoj) por ne perdi tiun, kiun mi amas (aŭ pensas, ke mi amas)?

Ĉu mi pretus ne vidi dum longa tempo mian amaton, se ĉi longa foresto utilis por lia/ŝia bono?

Kiajn mankojn mi eltenas (aŭ ne eltenas) en la homo, kiun mi amas? Ĉu mi min sentas engaĝita kunlabori kun mia amato cele, ke tiu korektu siajn mankojn? Kaj kiajn mankojn mi trovas en mi mem, kiujn mi ne eltenas en la homo, kiu min amas?

Se pri iu punkto mi ne samopinias, ĉu mi preferas rezigni aŭ mi persiste restas je mia opinio?

Surbaze de kiaj kriterioj ni povas trovi akordon en la okazoj, kiam ni malsame opinias?

Ĉu estas vere grave, ke ni kapablu esti en akordo pri ĉio? Aŭ ĉu ekzistas aferoj rilate kiujn oni povas esti je opinio malsama kaj aliaj en kiuj nepras identeco de starpunktoj?

Kiuj estas la fundamentaj temoj, pri kiuj estas necese, aŭ almenaŭ estas tre grave konsenti? (ekzemple: rilate religion, kredon, kristanan praktikadon...).

Kiajn ideojn mi havas tiurilate? Ĉu mi agnoskas, ke nur laŭleĝe farita geedziĝo donas plenan rajton al la geedzoj, unu al la alia, en reciprokeco?

Ĉu mi sukcesas kompreni, ke la intergeedza rilato postulas aŭtentikan maturiĝon de la amo, plenan kapablon flanke de la geedzoj superregi siajn proprajn sentojn kaj instinktojn, realan ekvilibron ĉu psikan ĉu spiritan?

Ĉu la sinrajtigo al antaŭedziĝaj rilatoj ne kaŝas troan haston en la serĉado de percepteblaj fruktoj de amo, kiu en la realo estas ankoraŭ nematura, malfortika, bezonas rekompencan kaj konsekvenca ne estas sufiĉe forta?

Ĉu ni kredas, ke unu el la garantiaĵoj de la fideleco futura kuŝas ĝuste en la kapablo atendi, pacienci, elteni...?

La supraj estas demandoj, kiujn oni povus formuli ankaŭ en maniero malsama, sed ili

certe bone fokusigas la problemon de la libereco kaj de la kapablo ami sin reciproke.

Ni opinias, ke estas tre grave por la geedzoj esti sincere kaj profunde kontentaj pri la bonaĵoj de unu flanke de la alia; kaj tio ne nur en la malfacilaj momentoj, kiam laŭinstinkte unu forte brakumas la alian por oferi sinceran helpon de amo, de interkonsilo, de kuraĝigo, de kunlaboro; sed ankaŭ en la momentoj la plej favoraj, kiam plezuro kaj eŭforio forgesigas la devojn.

Kelkfoje, la feliĉo por tio, ke en la geedziĝo ĉio funkcias perfekte bone, povas kaŝi profundajn kaj vastajn spacojn de egoismo en unu el la du... aŭ en ambaŭ.

«Ni geedziĝis, ĉar ni sukcesis esti en harmonio pri ia vivomaniero..., kaj ni ne antaŭvidis, ke laŭ tiu vivomaniero ni povis unuope zorgi pri niaj gustoj kaj niaj interesoj; ekmanĝis io, kaj jen alvenis malharmoniaĵoj, kaj antaŭ tiuj ni trovis nin senpreparaj...»

En ĉi-okazoj, ĝis kia punkto estas pretaj - ambaŭ - respekti la personecon kaj la opini-liberecon unu de la alia? Se hazarde ĉi tiuj malharmoniaĵoj aperas, estas tre grave - antaŭ ĉio - el la afero ne fari dramon; poste, iom post iom, oni devas klopodi interparoli, klarigi unu al la alia, interkompreniĝi.

Nepras, ke neniu el la du defendu ian starpunkton, ĉar la starpunkto estas la sia.

Amo, kiu ne kapablas iĝi disĉiplo de la vero, ne estas vera amo. Kaj ĝi ne estas libera.

Multaj geedziĝoj lamadas, ĉar la du geedzoj ne kapablas paroli unu al la alia, kaj ĉefe, ili ne kapablas aŭskulti unu la alian. Tiuokaze ili devas klopodi eltiri kelkajn komunajn principojn, laŭ kiuj estas facile trovi akordon.

Tiuj komunaj principoj tre utilos en la momentoj malfacilaj de la decidoj, aŭ kiam estos necese esprimi starpunkton koncerne filon. Nu, estas serioza damaĝo por la familio, se la gepatroj ne samopinias rilate la fundamentajn liniojn de la edukado de la filoj.

Alia grava elemento estas la *sincereco*.

* La geedzoj devas havi la kuraĝon kaj la simplecon, kiuj estas necesaj por diri ĉion unu al la alia, por kaŝi nenion; penige estas vidi geedzojn, kiuj diras al konatuloj (parencoj, amikoj): «tion ne diru al mia edzino... al mia edzo...». Se ne ekzistas plena sincero, iam aŭ tiam oni devos alfronti delikatajn situaciojn sen tiu kompleta kunsento de ideoj kaj de elektoj, kiu estas necesa por superi la provojn.

* Saman sincerecon oni bezonas ankaŭ kun si mem; ĉi tiu principo ŝajnas evidentega; okazas tamen, ke en la plej kaŝitaj anguloj de nia konscienco, eble ekde la infaneco, ni ne kuraĝis diri la veron al ni mem, ni ne kuraĝis agnoski niajn malvirtojn, evidentigi niajn malfortajn flankojn; tia malsincereco igas tre malfortikaj kaj nesekuraj, kaj kondukas al profunda sento de frustracio, kio kreas siavice la konvinkon, ke ni pri ĉio eraris dum nia vivo; de ĉi tie al tutelĉerpigo, estas mallonga la vojo...

* Tre grave estas, ke la du geedzoj montru sincerecon al la Sinjoro; sincereco konstruita kune, kiu dependas antaŭ ĉio de la volo: la sincera volo esti fidelaj al Dio kaj al sia propra kredo.

Ne malofte la gejunuloj atingas la geedziĝon post periodo de tute supraĵa religia vivo, de konfuzo, de morala devojiĝo aŭ kun ia rezignema indiferenteco pri religia.

La geedziĝo sin prezentas kiel okazo por revoki la valorojn de la kredo; kutime la gefianĉoj tion akceptas kun dankemo kaj kun sincero; sed ili ne kapablas prosperi pli multe

kaj faras ĝeneralajn sinproponojn, kiuj, je la unua malfacilaĵo, forvaporigās kiel subsuna neĝo.

La geedzoj, en kuneco, metu vere serioze antaŭ si la problemon de la religio, kaj ili planu kun sacerdoto aŭ kun geedza paro laŭkrede plene konvinkita, itineron de kredo, kiun ili poste tramarŝos fidele kaj fideme.

Por fari tion, estas necesa la sincero de la intencoj.

Tio, pri kio ni okupiĝas, ŝajnas argumentado, kiu tre multe malapudas disde la libereco. Kaj, tamen, estas precize en ĉi aferoj, ke la libereco havas rolon, la libereco vera, tiu, kiu venas de la akcepto de leĝo supera, de la konvinkiĝo, ke super ni estas Dio, amo senlima kaj vero nemezurebla; ĝi venas de la deziro, ĝi venas de la granda emo esti al Li aliancanoj.

Jen estas la supraj, la grandaj elektoj, kiuj decidas la sukceson kaj la feliĉon de nia vivo. Estas fundamente trovi la kuraĝon por rekte rigardi al ĉi tiu realaĵo, ĝin akcepti kaj je ĝi laŭigi.

En la geedziĝo oni estas duopo. Por konkretigi ĉi planon de libero, vero kaj amo, por realigi ĉi tiun interligon kun Dio, la fakto, ke oni estas duope - kaj en la volo, kaj dum la decidoj, kaj en la subteno reciproka - estas avantaĝo granda.

EDUKI LA FILOJN AL LIBERO KAJ EN LIBERO

KONSEKRITAJ JE LA LIBERO EN LA AMO

La problemo, kiu rilatas al la edukado de la filoj, estas senpera konsekvenco de la ĝisnuna priparolitaĵo.

Ni konstatis, kiel en la kreitaĵo ĉio estas farita laŭ la Dia estaĵo, ĝis la atingo de la plejsupro - la kreado de la homo -, kiu estas «bildo kaj similo» de Dio.

Nun - en akordo kun tio, kion ni malkovris observante la kreaĵon de Dio - ni eldiras leĝon mirindan kaj mistero-densan, kiun tiele ni povus difini: «*Dio, antaŭ ĉio, edukas per sia estaĵo mem*».

Ĉiuj leĝoj de la kreitaro, same kiel la intervenoj - pli aŭ malpli senperaj - de Dio en la historio, estas projekciigo mem de la Dia esto kaj vivo.

- Dio estas amo, kaj la plej supera leĝo de la kreitaro estas amadi;
- Dio estas unueco, kaj la tuta universo konverĝas al unueco;
- Dio estas vero, kaj neniu povas ŝanĝi la veron de la aĵoj;
- Dio estas libero, kaj ni havas la neforigeblan emon al la vera libero.

Konklude, jen la unua kaj fundamenta leĝo por la edukado de la filoj, en la familio: «*La gepatroj edukas siajn filojn unue per sia konduto*».

Eduki per sia konduto

Se la geedzoj travivas sian interrilaton en perfekta libero ena, amate reciproke unu la alian en la sindona ofero de si mem, akceptante unu la alian kaj reciproke sin konstruante laŭ lingvaĵo de sincero, respekto, dialogo, aŭskulto-kapablo, la filoj ne povas ne deĉifri tian lingvaĵon: ili kreskos sinceraj, liberaj, sindonemaj, respektemaj.

Se la geedzoj kapablas travivi sobran kaj simplan vivon, senigita de ĉia deziro nur bele aspekti, kontentaj je la rimedoj necesaj kaj sen kreskanta klopodo pli kaj pli multe havi,

ankaŭ la filoj kapablos limigi siajn pretendojn kaj siajn dezirojn, sin kontentigante je la necesajo kaj provante kreski pli multe laŭ la esto ol laŭ la havo.

Se la gepatroj engaĝiĝas por konstrui konkretan modelon de kredo kaj de kristana vivo, se ili, kiel unuaj, preĝas, sanktigas la tagon de la Sinjoro partoprenante en la eŭkaristio, kaj apudiĝas al la sakramento de la repaciĝo, se ili havas rilaton de amo al Jesuo, al la eklezio, al la malriĉuloj, pli facile estos por la filoj akceptadi kaj travivi ĉi religiajn valorojn.

Kutime, kontraŭe, la gepatroj zorgas pri tio, kion ili devas *diri* al la filoj, pri la aferoj, kiujn ili devas *farigi*, sume, pri siaj intervenoj de ekstere koncerne la filojn.

Kaj ili ne konscias, ke la vera homa (kaj kristana) kresko okazas *ekde la interno*, kiel pro *osmozo* (ensorbiĝo), de animo al animo: «Mi fariĝas - iom post iom - tio, kio vi jam estas».

La filoj iĝas, ankaŭ se senkonscie, testo de pruvo por la gepatroj. Kiam tiuj vidas ian neperfektaĵon en siaj propraj filoj, la unua penso, kiu devas veni al ili en la menson jenas: «Ĉu hazarde la neperfektaĵo, kiun mi rimarkas en mia filo estas ankaŭ neperfektaĵo mia?; en tia okazo, mi komencu korekti min mem... kaj mia filo postsekvos min».

Direndas, krome, ke ne estas nur la gepatroj tiuj, kiuj edukas la filojn, sed estas la filoj mem, kiuj edukas la gepatrojn, ĉar per ilia konduto ili povas influi (ankaŭ en pozitiva maniero) la vivon de paĉjo kaj de panjo.

Kapabli legi sian propran vivon en la vivo de la filoj, por ili estas granda helpo.

Plue, ekzistas fundamenta principo de la kristana ekzistado: ni ĉiuj - plenaĝuloj kaj etuloj, gepatroj kaj gefiloj, saĝuloj kaj ne tro saĝaj, riĉuloj kaj malriĉuloj - estas sub la ununura Dia leĝo.

La filoj devas scii - kaj vidi! - ke ankaŭ iliaj gepatroj estas submetitaj je la sama leĝo kaj je la sama Sinjoro. Kaj ili devas havi la eblecon vidi, ke la gepatroj, kiam tiuj eraras, kapablas agnoski sian eraron aŭ sian kulpon.

Ne estas necese, ke ili pardonpetu de la filoj, sed estas tiel bele, se ili kapablas peti la pardonon de Dio *antaŭ la filoj*.

Eduki la filojn en libero

Libereco estas la ideala etoso por la familio. Tion signifas eduki la filojn en libero: ne ekzistas vera edukado, se en familio ne estas vera libero.

Ne utilas proponi eĉ la plej saĝajn instruojn, se mankas interrilato de libereco. Kio klarigas kial gepatroj kleraj kaj kapablaj kunmeti saĝajn kaj konvinkajn paroladojn, malsukcesas tamen en la priedukaj intervenoj: tiuj gepatroj ne estas kapablaj respekti la postulojn de la libereco.

Evidentas, ke dum la unuaj vivojaroj estas tasko de la gepatroj fari elektojn por la filoj, sed laŭ ties kreskado oni devas kialigi la decidojn: ne nur por pravigi la intervenojn de la gepatroj, sed ankaŭ por alkitimigi la filojn al kunmeto de ia aro da kriterioj prikondutaj.

Jen ekzemplo: la filoj ricevas la bapton, estas sendataj al la kateĥisma instruado, estas prezentataj por rajtigo al la konfirmacio kaj al la eŭkaristio, estas partoprenigataj en la preĝado de paĉjo kaj de panjo, pro tio, ke tiuj estas kredantoj kaj ke temas pri ties kredo.

Sed, dum la kreskiĝo-jaroj, la gepatroj informos la filojn pri la kialoj de sia prireligia elekto, tiel ke la filoj komprenu ties motivojn kaj, atinginte aĝon, kiu al ili permesos pli

grandan aŭtonomecon, ili mem faru siajn personajn kaj finajn elektojn, libere.

Se, atinginte la adoleskecon, filo ne plu volas iri al la meso, estus erare tion al li trudi kun aŭtoritato; estus same nefarinde, diri al li: «Ĉu vi ne iru? nu, restu hejme!».

Se la filo provas malfacilaĵojn por iri al la meso, oni devas helpi lin eltrovi la kialojn de tio, cele, ke poste li kapablu decidi mem kaj respondece. Bone estus, por tia filo, vidi, ke la gepatroj iras al la meso kaj en tiu plenfide partoprenas.

Kiam la gepatroj estas nekredantoj, aŭ agnostikaj, aŭ indiferentaj, la problemo fariĝas serioza, ĉar iele-tiele, ili devas helpi la filojn fiksi starpunktojn pri la religiaj aŭ etikaj problemoj.

Nuntempe prezentiĝas ofte eksternormaj situacioj: gepatroj religie malĉeestemaj, kiuj trudas al la filoj la etapojn de la kredo kaj de la kristana vivo. La plej malbona aspekto, por tiuj knaboj, eble ne estas tiom multe la vakuo en la prireligia edukado (kio estas mem serioza problemoj), kiom la kritikinda ekzemplo de nekohero evidenta, kiun donas al ili paĉjo kaj panjo, aŭ unu el tiuj.

Devigo al pli granda kohero povas montriĝi netranspasebla barilo por la gepatroj. Tiuj devas trejniĝi kun humilo kaj kuraĝo, eĉ helpon serĉante; se bone prikonsideri la tuton, ĉi tia sindevigo al kialodonado estas utila al la gepatroj por reekzameni, en la nuna stato de plenkreskuloj, la iamajn starpunktojn, fiksitaĵojn dum la jaroj adoleskaj. Kaj ne temas ja pri simpla fuŝaĵo.

Je la aĝo, kiam la filoj komencas fariĝi kritikemaj kaj kiam ili komencas senti la bezonon de motiviĝoj kaj de prikontroloj, ne malofte la gepatroj plendas pro la malfacilo de sia tasko; kontraŭe, estas eble tiuj la plej belaj kaj plej taŭgaj momentoj, se simple ni kapablas aŭskulti la filojn, ni klopodas ilin kompreni kaj poste kun ili ni diskutas por eltrovi kune la plej bonajn solvojn.

Sed se neniam antaŭe ekzistis dialogo, malfacile estos tiun ekestigi je tia aĝo.

Ĉi-okaze fariĝas devo kaj montriĝas granda helpo, por la kristanoj, sin turni al la preĝo kaj al la Dia parolo (ĉefe el la Evangelio).

Je certa aĝo, oni devas komenci lasi la filojn liberaj preni sur sin la respondecon de siaj propraj decidoj, kaj rimarkigi al ili, ke se ili eraros, ili mem devos elteni la konsekvencojn de la miskonduto.

Kaj kiam la filoj konscios, ke ili eraris, tiam oni devos ilin helpi, cele ke ili reakiru fidon kaj ne senkuraĝiĝu; estus stulte al ili sin adresi dirante: «Pri tio mi antaŭavertis vin, kaj vi ne volis nin aŭskulti!»

La gepatroj devas atenti ne altrudi al la filoj siajn personajn revojn kaj planojn; tio estas malbona kutimo tre disvastiĝinta. Patro kaj patrino emas, ankaŭ se ne plene konscie, solvi ĉe la filoj problemojn, kiuj restis nesolvitaj ĉe ili mem; aŭ ili emas deziri por la filoj tion, kion ili estus volontaj, sed ne sukcesis realiĝi (oni pensu, ekzemple, pri la atingoj en la studoj kaj pri la kampo de la laboro).

Tio, tamen, estas eraro. Oni, kontraŭe, devas helpi la filojn malkovri siajn proprajn inklinojn, proponante kriteriojn por alveni al prijuĝo kaj al pridecido.

La filoj mem devas malkovri sian vokiĝon; tasko de la gepatroj estas helpi ilin legi en si mem; sed post tio, en la momento de la decido, la gepatroj lasu la filojn liberaj.

Ĉi tio plene kongruas kun la priskribo de la geedziĝo kaj de la familio, kiun ekde la komenco ni nomis konsekriĝo.

La gepatroj enmondigas filojn ne por si mem, sed por ties bono, por ties venonto,

antaŭvide al helpo kaj al progresigo de la homaro. Last-analize tion ili faras por la Sinjoro.

Estas por ni subtena, ĉi-rilate, mirinda paĝo de Sankta Paŭlo al la Romanoj (14,7-8)
*Neniu el ni vivas al si mem,
kaj neniu mortas al si mem.
Ĉar se ni vivas, ni vivas al la Sinjoro,
kaj se ni mortas, ni mortas al la Sinjoro;
ĉu ni vivas do, aŭ mortas,
al la Sinjoro ni apartenas.*

Maria naskis Jesuon, sed ne por ŝi: por Lin doni al la mondo kaj al la Patro.

Tiele la geedziĝo sin montras en sia lumo de plena sindonema engaĝiĝo kaj de konsekriĝo al Dio.

La grandan misteron de la viv-generado oni devas vidi sub ĉi tia lumo: gepatroj kunlaborantaj kaj kun-kreantaj kune kun Dio, sed laŭ iu plano, kiu eĉ superas ilian kompreno-kapablon.

La futuro de la filoj estas mistero: paĉjo kaj panjo havas la taskon prepari la grundon por poste sin meti flanken adori, suferi, ami, doni, danki.

Kiel faris Maria kaj Jozefo en Nazareto.

Eduki al libero.

Eduki *al* libero signifas eduki travivi ĉiun momenton kiel viroj kaj virinoj liberaj. Ĉi tio antaŭvidas stimulon al aŭskultado kaj serĉado. Nome:

* eduki al aŭskultado, serĉado, scio; nu, ni vidis, ke libero konsistas el la kono de la leĝoj, por lokigi ilin laŭ ties hierarkio de valoroj; kiu opinias, ke nenio estas lernota, tiu baras al si la vojon al ĉiu elekto de libero; kiu scias *ĉion*, tiu ĉion eraras;

* eduki esti interne liberaj, t.e. ne lasi sin allogi - en la momento decida - de ia pasio aŭ de ia kaprica plezuro, aŭ de simpatio, aŭ eĉ de timo; malmultaj inter la adoleskantoj estas liberaj interne, ĉar la aĝo, kiun ili trapasas estas aĝo dum kiu ĉio allogas. Multaj el ili, tamen - se helpataj kaj lumigitaj - kapablas agnoski la trompemon de tiuj allogoj, kaj de tiuj ili sin defendas; ili devas ĉiuokaze kompreni la valoron de la interna libereco.

* eduki elekti, decidi; la filoj devas scii, ke ĉiun elekton oni faras sub kondiĉo de ia rezigno; preskaŭ ĉiam malantaŭ la jeso al io aŭ al ia entrepreno, ekzistas postulo eldiri iujn ne. Kelkfoje tiuj *ne* portas pli grandan suferon kompare kun la ĝojo, kiu povas veni de la unua *jes*.

La filoj sukcesos kompreni, ke je certa aĝo oni devas kapabli elekti kaj decidi per si mem. Sed al tio ili devos sin pretiĝi.

La elekto devas esti primeditata, povas eventuale esti kontrolata pri ĝia boneco kune kun kompetentulo, kelkfoje estas oportune ĝin iomete prokrastigi, sed je la fino oni devas atingi decidon.

En tiuj delikataj momentoj, paĉjo kaj panjo devas esti kapablaj retiriĝi, sed ili devas, samtempe, esti pretaj sugesti kriteriojn, kuraĝigi, instigi al atentemo. Multo dependas de la fidemo-nivelo, kiun oni atingis inter gepatroj kaj filoj.

En tiaj momentoj la preĝo estas nerezignebla: ĝi konsciigas pri la homaj limoj kaj malfermas al la senlimeco de Dio. Sed tia preĝo ne estas forfuĝo de la respondeco: Dio

neniam elrespondecigas. Li donas al ni la lumon de la Spirito, sed samtempe Li nin instigas al risko.

Fronte al tiom multaj kaj tiom seriozaj problemoj, ni havas ian senton de forperdiĝo. La realo estas pli simpla. Ĉefe, se la gepatroj kapablas vivi ĉiun tagon sian interligon-konsekriĝon. Dio ne povas ne engaĝiĝi kun ili...

Tiaj malfacilaĵoj reportas al maro profunda la etan ŝipon de la geedziĝo kaj devigas la geedzojn rediri ĉiun tagon sian jeson, reekzameni de tempo al tempo la motivojn, kiuj puŝis ilin al geedziĝo, por ilin renovigi kaj pliperfektigi, por trovi novan elanon, por rediri al la Sinjoro sian tutan plenan fidon kaj sian oferon de si mem al Lia volo.

La aventuro-geedziĝo fariĝas pli kaj pli bela, pli kaj pli kaptema. La amo ja kreskas ĉiun tagon, kaj la tuta vivo ne sufiĉas por atingi la plej altan supron!

5. - La dia beno de la familio al la mondo

LA FAMILIO: LERNEJO DE UNIVERSALISMO.

Ni rememorigu dum momento la solenan benon per kiu Di-Kreinto transdonis la mondon al la homa estaĵo en ties plej plena dimensio, kiu estas la familio.

*Fruktu kaj multiĝu,
kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi,
kaj regu super la fiŝoj de la maro
kaj super la birdoj de la ĉielo,
kaj super ĉiuj bestoj,
kiuj moviĝas sur la tero. (Gen. 1, 28)*

Interese estas ĉemeti je ĉi tiu komenca beno - kiu estas samtempe mesaĝo, bondeziro, ordono, povo-transdono - alian benon, kiu ankaŭ estas mesaĝo, bondeziro, ordono kaj povotransdono: la misio, kiun Jesuo konfidis al siaj disĉiploj antaŭ ol supreniri al la ĉielo:

«Estas donita al mi ĉia aŭtoritato en la ĉielo kaj sur la tero. Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomon de la patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito; instruante ilin observi ĉion, kion mi ordonis al vi. Kaj jen mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo!» (Mt 28, 18-20)

Ĉi tiuj du benoj - tiu je la komenco de la kreado kaj tiu je la komenciĝo de la eklezio - koncernas ĉiun homon, ĉiun kristanon, ĉiun familion aparte.

La familio estas benata de Dio:

- cele, ke ĝi estu fekunda en la amo kaj, ke ĝi multobligu siajn filojn;
- cele, ke ĝi sanktigu la mondon kaj ĝin ĝi levu al la regno;
- cele, ke al ĉiuj homoj ĝi portu la konon de la vera Dio;
- cele, ke ĝi plikreskigu la popolon de Dio, la eklezion, per novaj filoj;
- cele, ke ĝi tenu inter la homoj la fidelecon al la plano de Dio.

La misio de la familio estas universala: kiel horizonton ĝi havas la limojn de la mondo kaj la homan koron. Por ĉiu homo, kiu venas ĉi-monden, la familio havas ion por doni, ĝi havas ion por diri, ion por memorigi.

Sed estas necese, ke ĝi konsciui pri ĉi beno-misio ricevita de Dio Kreanto kaj de Kristo Sinjoro.

La familio havas universalajn horizontojn, ĉar kreinto de la homo kaj de la familio estas la Dio de la universo.

Neniu familio, kiu volas sin nomi kristana rajtas fermi sin en la izolo de siaj muroj kaj de siaj problemoj.

Dio estas Patro al ĉiuj; neniam iu homa estaĵo estos forigita de ĉi patreco dia. Nu, se ni estas Liaj filoj, ni ĉiuj estas fratoj kaj fratinoj. La ĉeesto de la eklezio en la mondo - ankaŭ se kiel eta aro - estas signo de la universala patreco de Dio.

Ĉiu familio devus iĝi konscia pri sia propra identeco de miniatura mondo. La vera familio estas la mondo. Ĉiu familio estas *mikro-kosmo*, guto, en kiu la tuta homaro respeguliĝas.

Kiam oni vidas, ke pasas en strato de la urbo eksterlandano, kun alikolora haŭto - sed ankaŭ kiam oni renkontiĝas kun sia najbaro - oni devas spontanee senti ian emon al apudiĝo, al simpatio, al akceptemo.

Ni sentas, ke en tiu homo enestas Dio, Kiu amas unu el siaj filoj, unu el siaj filinoj. Kaj ni sentas, ke la elaĉeta sango de Kristo Jesuo atingis ankaŭ tiun homan estaĵon.

Familio, kiu fermiĝas al la aliaj, per si mem dividiĝas, fariĝas senfrukta kaj skleroza: formortas senelana flamo.

Sin senti filoj de Dio kaj savitoj de Kristo kun ĉiuj aliaj homoj, estas la ideala maniero por igi spiri familion. Kaj tion, la gepatroj devas scii, kaj se ili nekonsekvence agas, ili ne nur pekas, sed ankaŭ dronas en tristeco. Kaj ili damaĝas siajn filojn, ĉar - vole nevole - tiujn ili eksterigas de la granda festo de la homaro.

Ĉi universala spiro estas la spiro de Dio. La patro malfermiĝas al la Filo kaj la Filo malfermiĝas al la Patro. Patro kaj Filo, fine, renkontiĝas en la Sankta Spirito, kiu - siavice malfermiĝas al la Patro kaj al la Filo.

Sed sur la tero, inter la filoj de la homoj, iuj estas - kaj tiuj estas multaj! - kiuj ne volas iun alian. Jen estas la radiko de ĉiuj malbonaĵoj, de ĉiuj disdividiĝoj.

Ĉi tio *ne voli* de la frato ne estas simpla peko kontraŭ la frato - tio ne estas nur la peko de Kaino - sed tio estas ankaŭ peko kontraŭ Dio - tio estas la peko de Adamo - kiu *ne volis Dion!*

La fermitaj familioj pekas kontraŭ Dio, ĉar ili ne akceptas Ties universalan patrecon. Al ĉiu homo, tiun kreante - ankaŭ al abortitaĵo ĵetita en la balaajujon - Dio diris, per la tuta nemezurebla amo je kiu Patro amas Filon: «Mi volas, ke vi estu!».

Eduki - pli bone, eduki sin mem - al ĉi universalismo estas tasko, kiu ja engaĝigas la gepatrojn, sed pli frue eĉ la gefianĉojn.

Oni ne geedziĝas sinadmire, cele al duopa kunĝuado: oni geedziĝas por malfermi sin mem al la universo.

Konkretaj sugestoj

1. Familio, kiu estas malfermita al la universo estas familio, kiu *informiĝas* pri ĉio, kio okazas en la mondo.

La filoj devas esti instigitaj al informiĝo, cele, ke en ili eknasku intereso al siaj fratoj! Ĉi universala pensomaniero estas kulturo, per kiu estas bone, se la gepatroj estas jam

provizitaj. Temas pri intereso, kiu sin adresas al niaj gefratoj!

Legi gazeton por informiĝi pri faktoj kaj problemoj, kiuj sinsekviĝas en la mondo povas aliformiĝi al preĝo, al trasuferata pasiono, al instigo agadi, al koro-malfermiĝo por sentoj pli sindonigaj.

Kaj en nia familio, duonhoro pasigita ĉiun vesperon antaŭ la teleĵurnalo povas fariĝi formiĝo-momento, kiu ĉirkaŭbrakigas al ni la mondon kaj nin iĝas solidaremaj kaj sentemaj al tiuj, kiuj suferas kaj bezonas helpon.

2. De la kono, oni facile pasas al la *informado de la aliaj*. Ĉi tia universalema pensomaniero trovas malfacilaĵojn por disvastiĝi, kaj ĉiu familio celas - preskaŭ senkonscie - al izoliĝo. Informi, sciigi, iĝi sentemaj iĝas pro tio tasko de ĉiuj kaj fariĝas ne malgranda okazo por eduki al mondospekta panoramo.

Informado ne celas «esti notindaĵo» sed ĝi celas sentigi la problemojn, ĝi celas eduki al respondeco flanke de ĉiuj fronte al la aliaj kaj de ĉiuj al la unuopulo. Iam ĉi tia vizio ne estis ebla, hodiaŭ ĝi eblas, kaj ĝi fariĝas deviga.

3. Ankaŭ la faktoj de la privata kaj publika vivoj devas esti *taksataj je la lumo de la Evangelio*. Jesuo instruis al ni, ke ni ne juĝu la homojn, sed, ke ni juĝu la faktojn (kp. Lk 13,2-5).

La inform-organoj (presado, radio, televido) al ni liveras programojn, informojn, problemojn, kiujn ni devas ekzameni, kontroli, pridiskuti, kompreni. Programoj, eĉ se pridiskuteblaj, kiuj povus fariĝi eduko-rimedo, kondiĉe, ke la gepatroj kapablu helpi la filojn reagi kritike kaj kun humilo.

4. Kritiko, ĉu pozitiva ĉu negativa, se ĝi ne indikas konkretan elirejon, restas senfrukta. Ĝi devas *envolvi la homojn*, ĝis ĝi ŝanĝigas al tiuj la manieron agi.

La Evangelio havas en si mem energion, kiu envolvas, kiu provokas ĝis oni alprenas kuraĝan starpunkton, eĉ riskan, sed preter ĉio kun granda amo al tiuj, kiuj suferas.

Neniel helpas priplori perfortojn, diskriminaciojn, ekonomikajn kaj sociajn malekvilibrojn, se en la koro ne naskiĝas ia decido konkrete, ageme enviciĝi inter tiujn, kiuj defendas la subprematojn. Ni ĉiuj malsanas je vortumado kaj sentas ian alergion al konkreta starpunkto, ĉar tio ofte estas malkomforta.

Apud ni situas lernejoj, malsanulejoj, kvartaloj, familioj, homoj ... kiuj al ni sin turnas. Ĉu ni kapablas ekagi, entrepreni, ion konkretigi almenaŭ je tia nivelo?

Malfermiĝo al spacoj pli vastaj, ĝis dimensioj tutmondaj, venos poste, per si mem. Sufiĉas havi la volon, sufiĉas esti sentemaj.

Patrino Tereza komencis per sinŝarĝigo de unu mortonta infano kaj poste tiu unua gesto de amo altiris alian, kaj ankoraŭ alian. Ŝin postiris aliaj virinoj, ili fariĝis vera armeo... nun tiuj estas vokataj en multajn landojn en ĉiuj kontinentoj...

5. Kiam oni estas akceptintaj ĉi tutmondan dimension de la familia vivo, ankaŭ la enaj problemoj de la familio fariĝas pli facile solveblaj.

Fariĝinte tiamaniere sentema, la familio pli facile malfermiĝas rilate la realaĵon de la medio, en kiu ĝi vivas. Kaj oni komencas de la paroĥo. Tiu ne devas esti taksata simple kiel servo-stacio, al kiu oni iras okaze da bapto, por peti atestilon... aŭ por serĉi ies apogon.

La paroĥo fariĝas la fenestro malfermita al la mondo, kie oni enspiras la dimension de tiu kosma resurekto, kiun alportis Kristo.

La manko de ĉi elano al universaleco eble estas la ĉefa kialo de la febliĝo de la kredo en multaj koroj kaj ĉe multaj familioj... kaj en tiom multe da paroĥoj.

Kaj je ĉi tiu punkto la diskuto povus malfermiĝi al horizontoj senlimaj: komence, ni diru, ke el la familia terminaro devas malaperi la esprimo «sendi al la paroĥo».

Neniu, absolute neniu, devas esti *sendita*.

Ni iru, kune, ĉiuj.

Ni, kiel familio, kune iru.

La gepatroj, kiel unuaj, devas tien iri; la filoj tiujn sekvos, se la donita ekzemplo montriĝos valora.

Se la gepatroj ne partoprenas, sed nur sendas la filojn al la preĝejo, ili faras hipokritaĵon, kiu perturbas la fidon mem de la filoj. Kiam tiuj kreskos, ili forlasos unue la laŭreligian vivon kaj dualoke la kredon.

La krizojn prikredajn ili pli bone superos, se, kaj en la hejmo kaj en la paroĥo, estos spirebla etoso mondoampleksa. Nenio pli danĝeras - por la kredo - ol tiun prezenti kiel aferon pure personan: ĝi estas, kontraŭe, problemo, kiu grandas, kiel la mondo tuta.

Aŭ mi sentas la neceson, ke kune kun mi la tuta mondo estu savita, aŭ mi ne komprenas, kial mi devas esti la savito.

LA BENO DE DIO AL LA FAMILIO

ESTAS SAMTEMPE VOKO, VOKIĜO POR LA FAMILIO MEM KAJ POR ĈIU EL TIES MEMBROJ

Malfermante sin mem al ĉiuj eblecoj al bono kaj plivastigante siajn horizontojn al la limoj de la tero, al popoloj kaj rasoj, al kulturoj kaj religioj, la familio evoluigas tiun benon, kiun Dio al ĝi transdonis *ekde la komenco*.

Ĉi dia beno - samtempe - estas ankaŭ vokiĝo.

Dio nenion kreas laŭhazarde; al ĉio kaj al ĉiuj Li donas nomon, kaj
doninte nomon, Li vokas,
vokinte, Li donas fidon,
fidon doninte, Li donas mision,
doninte mision, Li donas garantiaĵon de helpo.

Ekzistas ĝenerala voko, vokiĝo, kiu por ĉiuj estas egala:

la voko al ekzistado;

la voko disvastigi, evoluigi, defendi la vivon;

la voko al la kredo, al la espero, al la amo;

la voko al resurekto.

Sed ene de ĉi tiu ĝenerala voko, ekzistas vokoj, vokiĝoj apartaj, laŭ la situacio, en kiu troviĝas familio, laŭ la eventoj, kiujn ĝi travivas, laŭ la kapabloj kaj la eblecoj de la unuopuloj.

Siavice, la kristanaj familioj havas apartan vokiĝon interne de la socia teksaĵo, al kiu ili apartenas; en niaj tagoj, ekzemple, la kristanaj familioj estas vokitaj defendi la valorojn de la amo, de la fideleco, de la vivo, kiuj ege multe suferas je kompromisoj pro la nuntempe reganta kulturo.

Tia aparta vokiĝo koncernas ĉiujn familiojn de kredantoj, kiuj devas pri tio konscii.

La kristanaj familioj evoluigas sian apartan vokiĝon ĉu interne de la familia realaĵo mem, ĉu en la kristana komunumo (kutime, la paroĥo), ĉu en la socio civitana.

Apartaj vokiĝoj en la familio kaj de la familio al la mondo

Interne de la familio manifestiĝas kelkfoje vokiĝoj, kiuj rilatas ties membrojn: zorgi kun amo aparta pri handikapita parenco, atestante pri la maniero, kiel povas esti akceptitaj, amataj, helpataj, starigitaj memsufiĉaj, entute respektataj ĉi kreitaĵoj laŭ ilia digno de homoj kaj de filoj de Dio kaj kun la celo, ke ili estu utilaj por alpreni ian rolon.

Ni, krome, pridemandadu nin, kiel en la familio estas amataj, prizorgataj, honorataj la pliaĝuloj, aŭ kiel la junuloj estas preparataj por la geedziĝo, por komenci studi kaj por elekti ian laboron.

Oni povus diri, ke tion devus fari la socio, al tio devus prizorgi ankaŭ la paroĥo; tio estas vera, sed nur parte. La servoj, kiujn la socio kaj la eklezio donas postulas ĉiam (kaj tion ili devas provoki) intervenon subtenan kaj atesto-donan flanke de la familio.

Nu, estu ja bonvenaj la programoj animzorgaj, sed tio, kio marŝigas la komunumon estas la familio, ĉar en tiu oni konkrete edukas la homojn realigi la volon de la Sinjoro.

Ankaŭ kiam programoj kaj iniciatoj surhavas la sigelon de ia civila leĝo aŭ de ia normo eklezia, la grundo de ilia konkretiĝo estas precipe la familio.

Tio valoras ankaŭ, ekzemple, por la reformo de la lernado aŭ de la saneco-reguloj, aŭ de la mondo sindikata aŭ de la laboro; ankaŭ kiam oni starigas gravan politikan leĝon.

La provejo estas la familio, kiu preparas la civitanojn kaj la kristanojn akcepti leĝojn kaj normojn, asimili tiujn laŭ vera evangelia spirito kaj kun civila sento de respondeco.

La animzorga agado de paroĥo estas ĝenerale konfidita al sacerdoto kaj al tiuj malmultaj grupoj de laikoj, kiuj - fortaj je bona volo, ankaŭ se ofte ili sin sentas ne preparitaj - estas pretaj doni sindoneman kunlaboron.

La animzorga streĉo estas rimarkinda, sed la rezultoj montriĝas ege senprosperigaj.

En ĉi tia tipo de animzorga agado de la paroĥo, la familio preskaŭ ĉiam estas pezo. Kiomfoje pastroj kaj kateĥizistoj plendas pro la opono de la gepatroj al iliaj provoj enpresigi en la geknabojn aŭtentan laŭkristanan formiĝon.

Verŝajne - sen neadi la respondecon de la gepatroj, oni devas agnoski, ke la animzorga programo de la paroĥo estas valida kaj fruktodona nur kiam la familio ne plu estas taksata posttrenota pezo, sed forta starpunkto je kiu prikalkuli.

La plej granda streĉo devas esti la klopodo helpi la geedzojn remalkovri la grandon, la riĉon kaj la allogon de la kredo. La filoj - por kreski kiel kristanoj - bezonas la senton de la subteno de la kredo de la gepatroj.

Je la unua momento, ĉi plenaĝuloj nek komprenos nek volos; sed la batalon oni devas antaŭenigi pacience kaj kun klaro, kaj alta ja estas la pagota prezo: nuntempe la reevangelizado postulas ne nur jarojn, ĝi postulas jardekojn por provoki profundan kaj daŭran ŝanĝiĝon en la kutimoj de la familioj.

Familio estas la unua portanta subjekto de la kredo kaj de la kristana vivo. La paroĥo redonu al la familio, ĉi tian rajto-devon.

En ĉiu paroĥo ekzistas familioj, kiuj kredas kaj estas helpopretaj. Al ĉi tiuj familioj oni komencu doni pli multe (kaj de tiuj oni postulu pli multe): tagoj de primedita retiriĝo, de spirita formiĝo, de bone gvidata prisakramenta marŝado, momentojn fortajn de reviziado de

la vivo, proponojn al kristana plialtiĝo.

Oni ne plu postulis de la gepatroj sanktecon (eble iu pastro ĝin ne plu pretendas eĉ de si mem). Je tio estas ligita la povreco de rezultoj. Kiam al la plej sindonemaj oni proponos helpon al sanktiĝo, la familioj pretaj al tio plinombriĝos; kaj ĉiu el ili iĝos centro de disradiigado al aliaj familioj.

Ni ne devas esti pesimistoj, nome senaj je espero (espero-manko estas peko kontraŭ la Sankta Spirito). Hodiaŭ ni konstatas, ke ekaperas familioj vere mirindaj, malfermitaj al la plej sindonemaj servoj, ĝis la punkto, ke ili forlasas sian propran landon por vivi dum tri aŭ kvar jaroj en la Tria Mondo proponante profesion kvalifikitan servon, travigligatan de vera kristana amo.

Aliajn familiojn ni vidas, kiuj adoptas forlasitajn infanojn, kiuj gastigas ekster-komunumajn studentojn, kiuj servas en la paroĥo kaj en la movadoj.

Ni estas ekforirontaj el frostiga vintro; sub la neĝo, kiu akviĝas je la unua milda suno, ni konstatas, ke elmontriĝas freŝa, malmola, vivanta eta herbetaro: la eklezio ĉiam vivantadas, pro tio ĝi kelkfoje aspektas trairata de la sulkoj de la aĝo kaj de la laciĝo... sed ankore ĝi posedas Kriston, kiu redonas al ĝi junecon.

Familio kaj vokiĝoj al aparta konsekriĝo.

Nuntempe mankas vokiĝoj al sacerdotiĝo, al religia kaj misiista vivoj. Unu el la kialoj, la plej gravaj, estas la spirita disfalo de la kristanaj familioj, eĉ de la plej bonaj.

Se ne enestas forta prispirita elano en paĉjo kaj panjo, oni ne povas pretendi, ke la filoj estu pretaj al sindonema engaĝiĝo je la servo de la Sinjoro. Kiel povas junulo, aŭ knabino, nur pensi pri la realiĝo de la revo sin dediĉi al Dio kaj al la animoj, se de la familio li ne ricevis veran edukon al preĝo, se li ne sin trejnadis en humiliĝo kaj en eltenemo kontraŭ la malfacilaĵoj, se li ne spiris aeron de sindonema entuziasmo por la afero de la Sinjoro?

Dio daŭre vokas, sed malforta estas la kapablo lin aŭskulti, la preteco de la koroj akcepti alvokojn engaĝigajn kaj nereversigeblajn.

La estimado de la evangelia *malriĉo* estas malofta ankaŭ en la religi-observantaj familioj; preskaŭ ĉion oni elspezas por la interesoj de la familio mem, kaj dume por la pli kaj pli kreskantaj bezonoj de la malriĉuloj restas nur eretoj.

Amo kaj estimo por la ĉasteco primokataj estas en multaj familioj, ankaŭ en tiuj, en kiuj oni absolute respektas la fidelecon intergeedzan. La filinoj ne estas edukitaj por gardi sian pudoron serene kaj senŝancele, kun sincera pritaksado de la pureco de la sentoj kaj de la koro, nek la knaboj estas alkitimiĝitaj al sinofero kaj al sindonemo.

Ĉi konstatojn povas fari ĉiu pastro, kiu sin metas volonte je dispono por preni la konfesojn de la gejunuloj. Preskaŭ neniu konfesas pekojn koncerne la sesan ordonon. Sed, kiam la sacerdote helpas meditati, tiam oni sin trovas antaŭ misorientigintaj, senatentaj, turmentitaj, resignaciemaj konsciencoj.

Ĉi tio klarigas kial multaj jam de jaroj forlasis la sakramenton de la konfeso aŭ tiun ege maloftigis.

Obeado estas alia virto, kiu tro multe malĉeestas nuntempe. Tial ni renkontiĝas kun gepatroj, kiuj ne kapablas aŭ ne kuraĝas ordoni, aŭ kiuj ordonas tro aŭtoritate, kaj ni trovas

filojn kiuj neniam respektas la decidojn de la gepatroj: familioj en kiuj oni ofte kaj volonte kvereladas pro kialoj la plej frivolaj...

Ni ne devas alarmiĝi antaŭ la mankoj, kiujn ni listigis ĉi-supre. La Sinjoro neniam forlasas tiujn, kiuj Lin serĉas sincerakore kaj kiuj strebadas por anonci Lian regnon.

Tamen: *la familio oni devas savi, cele, ke ĝi siavice savu!*

Nova ekflorado de enfamilia sanktiĝo: jen la kondiĉo por reveki konkrete la vokiĝojn al vivo konsekrita kaj al sankteco.

La taskon prepari la junulojn akcepti la plej sindonemajn vokiĝojn oni povas transdoni nur al la familio. Pro tio, ĉiu doktrina instruo de la kristanaj komunumoj devas absolute:

- pli rekte malfermiĝi al la evangelizado kaj al la forĝado de la familioj;
- celi - en la supraj evangelizado kaj forĝado - idealojn de aŭtentika sankteco.

Misio de la familio rilate socion.

Kaj nun iĝas pli facile kompreni la apartan vokiĝon, kiun familio havas rilate la civilan socion. Tion oni rimarkis dum la lastaj jardekoj; ni malvenkis ĉiujn civilajn batalojn (eksedziĝo, abortigo, kaj ni aldonu ankaŭ la prireligian instruon en la lernejoj; kaj, plue, aliajn nereligi-rilatajn batalojn, kiel ekzemple la sanitaran reformon, tiun de la psikiatria kuracejoj...), ĉar la mondo de la valoroj disfalis, kaj, sen disvastiĝintaj valoroj en la tuta teksaĵo de la socio, en la sekularigitaj konsciencoj de la plejmulto el la civitanoj, ankaŭ la leĝofarado tion laŭgrade suferas.

Leĝaro, kiu maltrafis la kristanan senton kaj eĉ la naturan moralan konsciencon povas nur pliprofundigi la moralan vakuon de la civitanoj.

Ĉi valoroj estas defendendaj, gardendaj kaj disvastigendaj fare de la familio, ankaŭ se oni devas alfronti politikajn kaj sociajn batalojn.

En la nunaj tempoj tendenco publika, oficiala, estas nerenversebla: dum pluraj jaroj ni ankoraŭ devos luktadi kontraŭ drogo, mafio, koterio, koruptado, perforto. Oni devas reiri malantaŭen kaj rekomenci ekde la familioj.

La novaj geedzaj paroj devas apudiĝi al la nuptomomento kun granda sindonemo, kun fido kaj ideoj klaraj.

Siavice, la sacerdotoj devas meti je dispono pli da tempo kaj pli da entuziasmo por la formado de la novaj familioj, streĉante pli kaj pli multe siajn fortojn rilate kateĥizon kaj spiritan, eĉ asketan, gvidadon de la gefianĉoj.

Jenaj estas la perspektivoj de la kristana alvokiĝo de la familio.

Jesuo diras ankaŭ al ni, ke ni ĵetu la retojn.

Sed tiun matenon, sur la lago de Genezareto, al tiuj malmultaj disĉiploj, Jesuo diris, ne nur, ke ili ĵetu la retojn: antaŭe kaj unue li diris: «iru for de la bordo» (laŭlitere: iru tien, kie pli profunda estas la akvo).

Jesuo diras al ni ĉiuj: ĵetu la retojn - t. e. fondu vian familion - en la profunda eno de via koro, de koro sindonema kaj pura, de koro preta luktadi, suferadi, nome... de koro, kiu pretas ami.

LA FAMILIO ESTAS ĈIAM MARŜANTA,
ĈAR PATRUJO ESTAS LA REGNO DE DIO.
SIMBOLISMO DE LA PILGRIMADO.

La familio estas ankoraŭ la homa realaĵo, kiu, pli multe ol ĉio alia savas kaj plusendas al la tempoj futuraj mesaĝon propran, propran heredaĵon.

Kiam la filoj edziĝas kaj formas novan familion, kiam la maljuniĝintaj gepatroj estas denove solaj, kiel en la tempo geedziĝa, tiam la familiaj ligoj restas pli fortaj ol antaŭe kaj la malnova trunko de la geavoj

daŭre elmetas foliojn, fruktojn, vivon, kaj eĉ la plej freŝaj branĉoj, tiuj, kiuj pli multe etendas siajn kapetojn, sentas, ke ili apartenas al tiu trunko, al tiuj radikoj, al tiu grundo...

La familio, ĝuste ĉar ĝi estas komunumo de amo, ne povas resti izolita en si mem, kio estus samkiel branĉoj, kiuj dispeciĝas kaj teren senvive falas.

Ekzistas kaj malgrandaj familioj kaj la granda familio, la parenkaro, la tuto de la geneologia arbo. Ĉi tiuj ligiloj estas nerompendaj, ĉar ili utilas por kunligi, por plue doni limfon. Ĉiudirekten.

Ni ĉiuj estas antaŭen marŝantaj; kaj tio, kio estas bona en la familio - inter multaj aliaj bonaĵoj - ja estas ĉi tia ĝoja kunvivado intergeneracia; en familio infanoj lernadas restadi kun la maljunuloj, kaj gejunuloj lernas akcepti la sperton de la plenaĝuloj.

Estas vere, ke en familio ofte ekaperas kontrastoj streĉigaj, sed tionmalgraŭe estas ja en la familio, ke tiaj kontrastoj denove glatiĝas kaj, ke oni reakiras normalan trankvilon...; kaj estas ja lernante ene kaj pere de la familio sin akcepti unu la aliajn, ankaŭ se malsamaj, ke oni poste sukcesas en komunumo pli vasta (preĝejo, lernejo, dumlabore, sport-okaze, dum la libera tempo...) entrepreni aŭtentikajn interhomajn rilatojn kaj kun ĉiuj interkomunikadi.

Ni ĉiuj estas marŝantaj survoje. Kaj ĉiam estas en la familio iu, kiu havas ion novan por alporti ĝojigan mesaĝon aŭ solvotan problemon, enkondukon de amika rilato aŭ donacon kune ĝuotan.

Unu tago egala al alia ne ekzistas, kaj en familio oni lernas esti serenaj dum la provo, kaj ne gloradi sin tro multe, kiam oni estas bonŝancaj. Oni tie lernas akcepti malfacilan karakteron de parenco, rideti fronte al siaj propraj malperfektaĵoj kaj klopodi tiujn korekti, elteni tiun, kiu estas enuiga kaj ensorbi tempestojn de filo malesperiĝinta aŭ de patro, kiu estas kelkfoje tro kolerema.

La familio havas la taskon *irigi ĉiujn kune*, grandajn kaj etulojn, laŭ komuna esperiga kaj paciencodona lingvaĵo, virojn kaj inojn, kun la ebleco sperti pri interrilatoj delikataj kaj ardaĵaj, afablaj kaj intimaj.

En la familio ekzistas sufiĉe da graco-rezervo por akcepti handikapitan aŭ spasmosuferan infanon, paralizitan avon, knabinon, kiu emas daŭre elhejmiĝi, kaj knabon, kiu en sia kapo prikonsideras nur kaj ĉiam futbalon, patron kiu emas elzorgiĝi sin-konsole ĉiun vesperon en drinkejo, kaj avinon kiu nenion alian faras ol forcerbiĝi pensante al iamaj belaj tempoj.

Ĉi kunmarŝado estas la plej valora viv-instruado: ege pli valora ol la lerneja institucio, kiu kapabligas legi kaj skribi kaj fari kalkulojn. Kiom multe la familio sukcesas instrui, malgraŭ la evidentegaj malperfektaĵoj de la gepatroj kaj de la filoj... kaj malgraŭ la enŝoviĝo de geparencoj...

Ĉi kunmarŝado estas la beno de Dio, kiu estas ĉiam sur ĉiuj kaj sur la unuopulo, ĝi estas

ne-forlasenda okazo por apudigi unu al la alia la korojn kaj la mensojn, por komenci konstrui en eta medio, tiun pli grandan idealon, kiu estas la homa familio, kiu celas vidi ĉiujn homojn de la mondo de neelĉerpebla paco kununuigitaj ĉirkaŭ la sama bankedo kaj sub la sama tegmento.

La familio estas ĉiam marŝanta, ĉar ĉiuj kreskas, en daŭra donacado-ricevo, kiu tenas profunde la ligojn kaj subtenas en la momentoj malfacilaj.

Kiam en iu familio ĉiu komencas iri laŭ sia propra bontrovo, la damaĝo estas al unu kaj al la familio mem: neniu gajnas per tio. Jen, kial estas malbenitaj la ekonomikaj profitoj kaj la ĵaluzoj, kiuj rompas la familiojn kaj aridigas la korojn.

La festoj de la familio

Dum ĉi tia kunmarŝado de la familio, ekestas apartaj etapoj, kiujn oni devas gardi, ĉar ili enhavas reciprokan fortan kohero- kaj eduko-puŝon. Temas pri la festoj (nomtagoj, naskiĝ-datoj, jarrevenoj), temas pri geedziĝoj, temas ankaŭ pri mortoj; estas tiuj etapoj kristanaj, kiuj etendiĝas de la bapto al la unua komunio-ricevo, de konfirmacio ĝis geedziĝo... aŭ disiĝo pro aparta alvoko, temas pri doktoriĝo, aŭ pri la unua laboro, aŭ pri forveturo por longa vojaĝo, aŭ pri feliĉa reveno post jaroj de foresto...

Temas pri momentoj de granda spirita elano, kiuj devus esti travivataj ankaŭ en la religia dimensio de la preĝo, de speciala sinkonfeso, de kompakta ĉeesto ĉirkaŭ la Eŭkaristio.

Ĉi momentoj benaj povas repagi jarojn de malfacilaĵoj kaj de zorgoj aŭ de dividiĝoj aŭ malkomprenoj.

En la familio ĉiam enestas iu, kiu posedas pli da sentemo aŭ takto, kiu preparas la suprajn momentojn kaj tiujn riĉigas per amo-elmontrado kaj ĝojo; iu animo pli sentema kaj saĝa, kiu antaŭvidas la eventojn, kiu inventas apartajn afablajn gestojn aŭ eĉ nur simplan elpensajon por orientigi la renkontiĝojn al interrilatoj de simpatio kaj de sereneco.

La irado de la espero

Ĉi tiu «stato de daŭra antaŭeniĝo», kiu karakterizas kaj inter ili kunligas la momentojn de la vivo de familio, donas ankaŭ al ĉiuj konscion, ke oni neniam la finon atingas, kaj ke la vera fino estas nur la regno de Dio.

Tiom multe estis sentata la atendo de la regno de la unuaj generacioj de kristanoj, eble ĉar ĉiuj metis en sian kapon la ideon, ke Jesuo baldaŭ estus reveninta.

Dudek jarcentoj forpasis, kaj ĝis nun Jesuo ne re-alvenis, kaj ni - kristanoj - iomete imitas tion, kion la hebreoj faris dum la kvardek tagoj dum kiuj Moseo haltis sur monto Sinajo; laciĝintaj pro la atendo, ili al si konstruis oran bovidon, kaj al tiu ili turnis siajn esperojn kaj siajn korinklinojn.

Ekzistas ankaŭ hodiaŭ la danĝero, ke la kristanoj ne sentu la emon al la vivo trans la morto, kaj ke, konsekvence, ili konstruadu al si idolojn.

Konsumismo estas la plej videbla formo de ĉi tia freneza festo ĉirkaŭ la ora bovido. Kiel vera vermo, ĝi korodas ne nur la koron de la homo kaj forgesigas al li la kredon, sed ĝi ankaŭ korodas la amon kaj la esperon, kiuj estis la gluaĵo, kiu kununuigis la familion.

La emo al Dio estas ĉiuokaze subtenenda en la familio; tia emo estas fakte la atendo de la plena realiĝo de tiu beno, kiu descendas de Dio al la homo, ekde la unuaj momentoj de la kreado.

Familio kaj pilgrimado

Pilgrimado al la sanktejoj kaj al la lokoj, kiuj aparte memorigas pri religiaj eventoj estas simbolo de la supre menciitaj atendo kaj marŝado, ili estas la rememorigo de la beno, kiun Dio neniam forprenis, kaj kiun Li daŭre al ni proponas.

Oni ne devas forgesi tiajn pilgrimadojn, kaj ĉiu familio devus, almenaŭ unu fojon en la jaro, entrepreni unu el ili; tiuj estas pilgrimadoj de kredo, kelkfoje de pentofaro, ĉiam, krome, de konvertiĝo kaj de prisakramenta plifirmiĝo.

Temas pri momentoj, dum kiuj Dio parolas al la koro de la homo, kaj dum kiuj la koro de la homo estas sufiĉe disponebla por Lin aŭskulti.

Kompostelo, Ĉestohovo, Gvadelupo, Jerusalemo, Lurdo, Fatimo, Pompejo, Romo, Loreto...

En epoko, en kiu la distancoj plietiĝas kaj la pluraj migrado-formoj atingis nivelojn, kiuj estis nekredindaj antaŭ kelkaj jardekoj, pilgrimado ne perdas sian karakterizaĵon de enkreda marŝado, de marŝado ankaŭ fizike laciga kaj malkomforta, de komunuma kaj interfrata marŝado, de marŝado, kiu - serĉante celon de devoteco, de memorigoj, de gracoj - antaŭ ĉio faras la paŝon la plej malfacilan: la atingo de la plej intima eno de ni mem, de nia propra koro, por trovi en ĝi la Dion de la Paco.

DUA PARTO LA BEATECO

BEATECO KAJ BEATECOJ

Al mondo, kiu estas turmentata de perfortoj kaj streĉoj, traŭmatizita de la penso pri la morto, ni proponas la *Evangelion*, la *sav-anoncon* de la beateco-promeso.

La mondo estas kreita por la beateco, kaj, se ĝi ne estus destinita al feliĉo, ne estus ekzisto-kialo por ĝi.

Pruvo de tio estas, ke tiuj, kiuj plenigas la kuraco-domojn estas homoj, kiuj ne plu sukcesas doni ian sencon, ian celon al sia ekzistado.

La rekupero de ĉi homoj povas okazi nur pere de la remalkovro de la ekzisto-signifo kaj de iu celo de la ekzistado. Oni devas remalkovri ian fidon en la ebleco vivi feliĉaj.

Kiam infano ploras, la gepatroj klopodas lin konsoli; kiam kreskas la zorgoj por la sano, por la laboro, por la domo, aŭ kiam okazas akcidento, ni tuj kaj laŭinstinkte provas trovi solvon serenan, kiu alportu sanon, bonstaton, pacon, justecon, t.e. beatecon.

Ni povas pensi, paroli, fari, voli, nur en la kadro de la beateco, de la feliĉo; kaj ne temas ĉi-okaze pri feliĉo mallongedaŭra, sed pri feliĉo kontinua, ĝenerala, eterna, nedetruenda.

Nevenkeble allogataj ni estas de la beateco. De tiu origina, praa instinkto neniu kaj nenio havas la kapablon nin forlogi. Ĉar ni havas enstampita en la profundo de *nia memo* la *dian senton* de la feliĉo kaj de la beateco.

Se la beateco estus nur homa produktaĵo, verŝajne je ĝi ni povus rezigni; sed *la beateco estas la vivo mem de Dio!*

Dio, nin kreante, nin destinas al Lia beateco mem!

... Sed en kio konsistas Lia beateco?

Estas la ena stato de tiu, kiu konscias, ke li posedas la pozitivan rezulton de la tuta realo: eterna vivo, perfekta feliĉo kaj, kiel celo de ĉio: Dio. Li estos «ĉio en ĉiuj» (1 Kor. 15, 28).

Kiu ajn primedito rilate la homon kaj la mondon estas farota interne de ĉi tiu dia realaĵo: la beateco de tri personoj en Amo ununura.

*Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito,
 ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.
 Feliĉaj estas la plorantaj,
 ĉar ili konsoliĝos.
 Feliĉaj estas la humilaj,
 ĉar ili heredos la teron.
 Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon,
 ĉar ili satiĝos.
 Feliĉaj estas la kompatemaj,
 ĉar ili ricevos kompaton.
 Feliĉaj estos la kore puraj,
 ĉar ili vidos Dion.
 Feliĉaj estas la pacigantoj,
 ĉar Filoj de Dio ili estos nomataj.
 Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco,
 ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.
 Feliĉaj estas vi, kiam oni vin riproĉos
 kaj persekutos
 kaj false vin kalumnios pro mi.
 Ĝoju kaj raviĝu,
 ĉar via rekompenco estos granda en la ĉielo. (Mt 5, 3-12)*

Se Dio beatulo *fariĝas homo*, li ne povas ne esti malriĉa, milda, submetita je la aflikto, kompatema, korpura, soifema kaj malsata je justeco, paciga... persekutata!

Jesuo, eĉ antaŭ ol proklami la feliĉegojn, tiujn travivis dum sia ekzistado mem.

La parolado de la feliĉegoj ne estas legota kaj interpretota laŭ pure morala senco, kiel sinsekvo da imitotaj ekzemploj. Ĝi estas certe io ege pli granda kaj pli profunda.

Pere de la feliĉegoj, Jesuo preskaŭ radiografiis nian pli profundan realaĵon. Nome, li nin puŝis decidi ne pri la sentoj tuj-percepteblaj kaj supraĵaj (pro kiuj ni taksas feliĉaj la riĉulojn, la subpremantojn, la ĝuemulojn...), sed pri la *profundaj kialoj de la koro*, en kiuj ni nin sentas en harmonio kun Li.

Je tiu nivelo ni malkovras, ke la vera feliĉo ne venas de la mono, de la ĝuo, de la sukceso, de la povo...

Tio, kion oni diras pri la homo unuopulo, same estas dirota pri la geedziĝo kaj pri la familio, nome pri tiu origina formo de komuneco de vivo, en kiu homo realiĝas tutece kaj plene.

Estas ĉefe en la geedziĝa kaj parenca komuneco, ke akiras reliefon kaj konturojn la feliĉegoj; en tiu okazo ili trovas fruktodonan grundon por enradikiĝi kaj por kreski.

La komuneco familia per si mem estas malfermita je la malriĉeco, je la mildeco, je la kompatemo, je la kor-pureco, je justeco, ankaŭ al ploro kaj persekuto, kaj, fine, al la paco!

Sekve, la feliĉegoj estas:

- okuloj por legi la veron de la geedziĝo kaj de la familio;
- modeloj por studi kaj pli profunde ekzameni, por malkovri de ili la motivojn kaj por

- ilin aliŝanĝi al projektoj de vivo originalaj kaj kuraĝaj;
- ekir-punktoj por tiu marŝado, kiu devas fariĝi propra de la tuta familio;
 - vojoj por trairi la homan kaj socian, religian kaj kulturan, ekonomikan kaj politikan universon; vojoj, kiuj malfermiĝas al novaj horizontoj, kiuj programadas novajn superajn sintezojn, ĝis la lasta sintezo, tiu de la karitato... kiu enfermas, kaj kune kunligas ĉiujn feliĉegojn;
 - Fine, ili esence estas donaco, graco, ili estas la sigelo, la garantiaĵo, la signo de la ĉeesto de Jesuo en la vivo de la unuopulo, de ĉiu familio; ili estas la Amen de Dio pri Lia projekto de amo: viro kaj virino *laŭ lia bildo kaj similo, sanktaj kaj senmakulaj je lia ĉeesto, en la karitato* (Gen. 1, 26; Ef 1, 4).
Finfine, ili estas la animo de nia konsekriĝo al la Amo, de nia interligo kun Dio Triunuo-Unuo.

La feliĉegoj estas "por la regno de Dio". Nur celante al tiu regno ili povas plene realiĝi kaj ili sencon akiras.

Ĉi tie, surtere, se oni volas konstruadi la regnon de Dio, oni devas elserĉi homojn pretajn: temas pri la homoj de la feliĉegoj!

Dio realigas la regnon:

- kun la malriĉuloj, ne kun la riĉuloj;
- kun tiuj, kiuj estas mildaj, ne kun la subpremantoj;
- kun kiu kapablas suferi, ne kun tiuj, kiuj serĉas disipemon kaj ĝuon;
- kun kiu malsatas je justeco, nome, je la valoroj de Dio, ne kun tiu, kiu facile kaj volonte alvenas al kompromitaĵoj rilate la veron;
- kun tiu, kiu havas puran koron kaj estas okul-pura, kaj kun tiu, kiu estas sklavo je la pasioj kaj malica;
- kun kiu kapablas kompateme pardoni, ne kun tiu, kiu ofendiĝas kaj celas al venĝo;
- kun kiu amas la lumon, ne kun tiu, kiu semas malpacon;
- kun kiu kapablas alfronti persekuton kaj kalumniadon, ne kun tiu, kiu ĉiam estas aranĝema...

La regno de Dio ne estas ĉi-monda, sed ĉi tie ĝi devas komenciĝi, semita ĝi devas esti en niaj koroj.

La familio estas la plej eta bildo de la regno de Dio. Sed tio ne signifas, ke ĝi estas malpli kapabla akcepti en sin mem la tutan riĉaĵon de ĉia feliĉego. Akvoguto estas esence kaj plene akvo, tiel kiel oceano.

Kiel arbarego kunmetita estas de miloj da plantoj,
kaj ĉiu planto surhavas milojn da folioj,
kaj ĉiu folio estas teksaĵo de miloj da ĉeloj,
tiamaniere, sen vivaj familioj, familioj malfermitaj al la feliĉegoj,
ekzistus nek kristanaj komunumoj,
nek repaciĝintaj socioj,
nek eklezio, unu, sankta, katolika kaj apostola.

Je la ok feliĉegoj, kiujn Mateo metas je la komenco de la predikado de Jesuo, ni aldoni povas aliajn, kiujn ni trovas dise en aliaj libroj de la Nova Testamento.

Feliĉaj estas tiuj, kiuj aŭdas la vorton de Dio kaj observas ĝin. (Lk 11, 28)

*Feliĉaj estas la leganto kaj la aŭskultantoj de la vortoj
de la profetaĵo
kaj la observantoj de la skribitaĵoj en ĝi;
ĉar la tempo estas proksima. (Ap. 1, 3)*

*Ĉar mi donis al vi ekzemplon,
por ke vi ankaŭ faru tion, kion mi faris al vi. [...]
Se ĉi tion vi scias, vi estas feliĉaj,
se tion vi faras. (Jo. 13, 15-17)*

Feliĉaj estas la okuloj, kiuj vidas tion, kion vi vidas. (Lk 10, 23)

Feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis, kaj tamen kredas. (Jo 20, 29)

Feliĉaj estas la mortintoj, kiuj de nun mortas en la Sinjoro. (Ap. 14, 13)

1. - Aŭskultado

Feliĉaj estas tiuj, kiuj aŭdas la vorton de Dio kaj observas ĝin. (Lk 11, 28)
Feliĉaj estas la leganto kaj la aŭskultantoj de la vortoj de la profetaĵo
kaj observas la vortojn de ĉi tiu libro,
ĉar tio devos okazi baldaŭ. (Ap. 1, 3: 22, 7)

AMO IĜAS AŬSKULTADO

Por paroli al ni pri la vivo de Dio, Sankta Johano utiligas du esprimiĝo-manierojn:
* la vorton
* la lumon

En la komenco estis la Vorto
kaj la Vorto estis kun Dio,
kaj la Vorto estis Dio. (1.1)

En Li estis la vivo,
kaj la vivo estis la lumo de la homoj;
kaj la lumo brilas en mallumo,
kaj la mallumo ĝin ne venkis. (1.4-5)

Dio estas lumo, kiu brilas, vorto, kiu reeĥas.

Jam en la interno de la vivo de Dio realiĝas la aŭskultado de la vorto kaj la kontemplado de la lumo.

Ni tro multe al kutimiĝis vidi la lumon kaj aŭdi la vortojn, tial ni forperdis la emocian senton, kiun portas la ekstazo de la aŭskultado aŭ la ekstazo de ia vizio.

Oni devus kelkfoje elprovi la blindecon kaj la surdecon, por remalkovri poste la grandiozan fascinon de la lumo-radio, de la brilego de iu koloro, de la sono de vorto...

En Dio estas la silento de la aŭskultado, plenigita de la eterna Vorto de la vero.

La nerakontebla ĝojego de la diaj Personoj naskiĝas ĝuste el ĉi tia aŭskultado de la Vorto. Ĝi estas Vorto senfina, kiu bezonas senfinan aŭskultadon.

De la aŭskultado de la vorto, elŝprucas la amo. Sed la vorto jam en si mem estas esprimiĝo de amo: ĝi estas jam amo! *En la komenco estis la amo!*

Jesuo mem ĉi maniere al ni parolas pri sia vivo en Dio:

La Filo ne povas per si mem fari ion,
krom tio, kion li vidas la Patron faranta;
kion ajn Li faras, tion la Filo tiel same ankaŭ faras. (Joh. 5, 19)

*Ĉion, kion mi aŭdis de la Patro
mi sciigis al vi. (Joh. 15, 15)*

Jesuo estas la unua kaj la plej granda - kaj iasence la ununura - kontempladanto kaj aŭskultanto de la Patro, kaj la tutan riĉaĵon de lia vivo kaj de lia misio elaĉeta li *ricevis* de la Patro.

Ĉio ajn, kion la Patro havas, estas mia. (Jo 16, 15)

La vivo de Jesuo estas unue *ricevo*, *aŭskultado*, *vido*; kaj poste ĝi fariĝas *donado*, *parolo*, *agado*.

Ĉi stilo karakterizas la vivon kaj la personecon mem de Jesuo kaj ĝi en nin descendas, por nin vivigi kaj por nin inviti agi en la sama maniero.

Unue ricevi kaj poste doni tion, kion oni ricevis.

Unue aŭskulti kaj poste paroli.

Unue rigardi kaj poste fari.

ASKETECO DE LA AŬSKULTADO

Silento-aŭskultado aparte karakterizas tiun unuan realaĵon de la vivo, kiu estas la familio. En la familio oni unue ricevas kaj pli poste oni donas.

La gepatroj ricevas la filojn, ne elektas ilin.

Kiom saĝas ĉi leĝo! Ve al la tago, en kiu la genetika manipulado eksukcesus: la malbono ne troviĝas nur en la perforto de la leĝoj de la reproduktado, kiuj bezonas nenian genon kaj nenian manipulado,

sed ĝi troviĝas en tio, ke la homo *ne plu akceptas la substancan etikan kaj antropologian datumon, nome lian «esti de Dio»-n, lian absolutan «ricevo»-n.*

Rompi ĉi fundamentan, originan datumon, enradikiĝinta en la esenco mem de la kreado... signifus meti sin en la lokon de Dio.

... kaj jen la filoj: tiuj ne elektas la gepatrojn, ilin *ricevas*.

En la familio oni devus aŭskulti pli multe unu la alian. Ĉi *asketeco* de la aŭskultado estas la necesa vorto ekde la unua renkontiĝo inter du junuloj. La aŭskultado antaŭvidas multan atenton kaj primediton.

Sed sen amo kaj bonvolemo, oni ne sukcesas kapti ĉion, kio estas ene en la vortoj de tiu, kiu al ni sin turnas.

Se mi ne amas tiun, kiu al mi parolas, ege malmulte mi komprenos pri ties mesaĝo.

Sed, se... necesas, ke tiu, kiu aŭskultas amu jam antaŭe tiun, kiu al li parolas, estas ankaŭ necese, ke tiu, kiu parolas, amu ekde antaŭe la homon al kiu li sin turnas.

La *nekomunikebleco* ekzistas inter geedzoj, ekzistas inter gepatroj kaj filoj: ĝi estas la malbono de nia jarcento.

DIO PAROLAS AL NI EN SENNOMBRAJ MANIEROJ.

La aŭskultado etendiĝas ankaŭ al la vortoj, kiuj venas de la ekstero: letero, gazet-informo, ies vizito, iu evento, malĝoja okazaĵo, eraro...

Dio havas senfinajn manierojn por paroli al ni; se ni kapablas Lin aŭskulti (tiucele, tamen, ni devas trejniĝi je la silento, ĉefe je la silento ene de ni), ni povas kapti ĉiutage multajn mesaĝojn, kiuj estas riĉaj de saĝo kaj de boneco.

Ekzistas krome senpera Dia mesaĝo; ĝi estas Lia Vorto, la Biblio, «la libro de Dio». Tiu estas libro, kiu de tro multe da tempo estas preskaŭ forprenita de la legado kaj de la primedito de la kristanoj, sekvo de kio estas seriozaj konsekvencoj, kiujn eĉ hodiaŭ oni povas konstati.

La vorto de Dio estas malfacila en la unuaj momentoj, ĝi postulas trejniĝon en la aŭskultado kaj en la kompreno-kapablo, kio ne estas io, kion oni konkeras simple kaj rapide; oni devas komenci, oni devas pluelteni, oni devas serĉadi kun granda emo... iom post iom oni sentas soifon je tio, naskiĝas interne de ni ia neforigebla neceso; kaj la Dia vorto estas laŭgrade asimilita, amata, travivata, kunĝuata.

Temas pri vorto, kiu fariĝas eĉ ĝena, absoluta, kiu devigas nin re-pridiskuti multajn niajn konvinkiĝojn kaj konduto-manierojn. Ĝi, antaŭ ĉio, devigas nin konvertiĝi al la Sinjoro, honeste starigi nian animon «okulon-kontraŭ-okulo» antaŭ Li.

Pli poste, se ni estas fidelaj kaj persistemaj en la aŭskultado de la parolo de Dio, tiu malaperas kiel sono, ĉar ĝi fariĝas la *vizaĝo de Jesuo*. La Evangelio fariĝas la spegulo de Kristo, por iom post iom iĝi ankaŭ spegulo nia.

Du geedzoj, se ili volas malkovri la eblecon kaj la profundon de la pli kaj pli kreskiĝanta dialogo de la paro, bone farus, se en la dialogon ili enŝovus ĉi tiun «trian kunparolanton»: Jesuon, kaj se ili sin lasus gvidadi de lia parolo.

La dialogo plilarĝiĝas krome al la filoj, kaj la familio malkovras, ke ĝi estas aŭskultanto de la Sinjoro.

Alvenas poste la neceso konsulti la Sinjoron, ĉiun fojon, kiam oni devas pridecidi, kiam oni devas agi, kiam oni devas trapasi malfacilan situacion, kiam oni devas kunpartopreni en ia doloro aŭ en iu ĝoja momento.

Tiu, kiu lernis aŭskulti Dion, aŭskulti Jesuon, tiu, kiu serioze konsideras ĉi parolon venantan de la alto, iĝas kapabla aŭskulti ĉiujn, sed iĝas ankaŭ kapabla taksi vortojn kaj juĝojn, distingante eraron disde vero, supraĵemon disde esenco, ŝajnon disde realaĵo, hipokritecon disde sincero, efemeron disde seriozeco.

2. - Kredo

Feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis, kaj tamen kredas. (Joh. 20, 29)

La epizodo de Tomaso nekredema antaŭ la anonco, kiun al li donis la aliaj apostoloj, ke ili vidis Jesuon resurektinta, estas aparte signifoplena por nia epoko: nia estas epoko kiu tro multe al kutimiĝis kontroli kaj mezuri, prikalkuli kaj antaŭvidi, ĝi estas epoko ja nerevema fronte al la malkovroj kaj al la plej rafinitaj inventoj....

La apostolo Tomaso instruas:

“Se mi ne vidos en liaj manoj la truon de la najloj, kaj se mi ne metos mian fingron en la lokon de la najloj, kaj ne metos mian manon en lian flankon, mi tute ne kredos” (Joh. 20, 25)

Hodiaŭ ŝajnas, ke la ununura certaĵo estas tio, kion oni vidas, tio, kion oni tuŝas, kion oni mezuras, kion oni radiografas, kion oni malmuntas.

Kaj tamen estas ja la scienco la plej *ekzakta*, kiu agnoskas, ke ekzistas nenio certa, ke morgaŭ ĉio povos ŝanĝiĝi; la maksimuma pesimismo venas al ni hodiaŭ de la sciencoj *ekzaktaj!*

Tio estas paradokso: hodiaŭ, tamen, *estas ĝuste la scienco, kiu helpvokas la kredon!*

Ĝi ekkonscias, ke ju pli multe ĝi progresas en la malkovroj kaj en la aplikado des pli multe ĝi plilarĝigas la limojn de la scio kaj de la homa povo...

Sed samtempe, ĝi sentas ke ĝi estas iu malliberigito interne de ĉi limoj, kiuj ne permesas al ĝi doni sencon lastan al la aĵoj, al la homoj, al la vivo, al tiuj profundaj sentoj, kiel amo, ĝojo, espero, beleco, harmonio, poezio... kiuj obstine forfuĝas de kiu ajn enketo aŭ scienca priserĉado.

La kredo permesas al ni atingi ĉiujn tiujn realaĵojn, kiuj ne malkaŝiĝas sub la enketema okulo de la sciencaj aparatoj. Kaj estas la scienco mem - tiu serioza - kiu pli kaj pli konstatas, ke ĝi ne elĉerpas la arkon de la realo, de la vero, de la postuloj la plej elementaj de la homo-individuo, de la homo-homaro.

La scienca kodo ne estas la ununura homa lingvaĵo. Ni parolas ankaŭ pere de la koro, pere de la sentoj, pere de la intuicioj de la animo: ne nur pere de la alfabeto-literoj kaj de la numeroj. Ni parolas unue pere de la malfermiĝo de la spirito al la senlimaĵo, al la absoluto.

La kredo ne humiligas nin, la kredo ekzaltigas nin, ĉar ĝi igas nin kapablaj trafi la

nevideblon, la ne-pridireblon, la ne-pruv- eblecon.

Kaj estas ja ĉi tiu la senco de la feliĉo, kiun Jesuo esprimas al Sankta Tomaso:

"Ĉar vi vidis min, vi kredas.;

Feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis, kaj tamen kredas." (Joh. 20, 29)

Ĉi tiu "kredi eĉ se oni ne vidis" estas la vera kredo. Kaj ĝi estas feliĉo. Feliĉuloj oni ne estas, pro tio, ke oni vidis aŭ oni konas la aferojn, feliĉuloj oni estas, ĉar oni kapablas *preteriri* la percepteblan vizion kaj la racian konon, ĉar oni kapablas *akcepti* la *konon* de Dio, vidi per Ties okuloj, ĝis tie, kie la homa okulo kaj la homa racio ne sukcesas alveni.

Kiom da homoj kredas en Dio simple, ĉar ilia raci-kapablo ne havas barojn en la agnosko de la ekzisto de iu Supera Estaĵo (oni diras tiele).

La samaj homoj, tamen, fronte al kontraŭaĵo aŭ al situacio drama, estas tuj kapablaj moralumi al Dio, kaj al Tiu sugestis, kiel Li estus devinta konduti. Kaj pri la morala leĝo ili akceptas nur tion, kion ili sukcesas facile plenumi aŭ kompreni, rifuzante siaflanke la plej malfacilajn preceptojn.

Kaj pri Dio ili imagas ege homecan bildon, atribuante - eĉ se senkonscie - al la Sinjoro multajn limojn kaj neperfektaĵojn, kiuj estas apartaĵoj de la kreitaj uloj.

Sed se mi akceptas Dion laŭ la dimensio laŭ kiu, mi Lin komprenas kaj mi sentas, ke Li estas *racia*, Dion mi limigas al la dimensio de homo.

Mi ne kredas en iu Dio, Kiu estas al mi facile komprenebla. Ĉar "facile komprenebla" Dio estas iu Dio laŭ-dimensie homa, kaj pro tio temas pri Dio terure limigita. Nome, tute ne temas pri Dio.

Dion mi akceptas ĝuste, ĉar Lin mi ne komprenas, mi Lin akceptas pro tio, ke Li ne permesas, ke mi Lin fermu interne de la horizonto de mia perceptado, ĉar Li estas senlime supera rilate la konceptojn, kiujn mi sukcesas formuladi pere de mia propra racio.

La saman aferon oni povas diri pri ĉiuj aliaj veraĵoj, kiuj rilatas la kredon.

Ni konsentas, ke *kredo* ne signifas *naivecon*. Kredo bezonas *fundamenton de fidindeco*. La kredo bezonas, ke la racio igu kredebla mian konfidiĝon al la Evangelio, al la Eklezio, nome al *kredebla atestanto*.

Ĉi tie ne estas la taŭga loko por pritrakti konsiderojn rilate la kredeblecon de la atestanto-Evangelio kaj de la atestanto-Eklezio.

Estu sufiĉe diri, ke ĉiu plenkreskinta kristano vokita estas - en la kritikaj momentoj de la vivo kaj sen ebleco al prokrasto - kontroli la bazojn de sia kredo.

La jaroj preparaj al la geedziĝo estas ideala periodo por la kontrolado de la kredo kaj de la altaŭgiĝo de sia propra vivo al tiu kredo.

Petante de la Eklezio, ke ĝi validigu ilian ligan de amo bazita sur la amo al Jesuo, la

gefianĉoj ne povas ne reekzameni - kun zorgo aparta - sian konkretan rilaton kun Jesuo kaj kun la Eklezio.

Tie komenciĝas la kredo, kie oni akceptas la lumon de Dio *kiel donacon*. Jes, ja, la kredo estas donaco, kiun Dion plenmane al ĉiuj disdonadas, komencante de la plej etaj, kiuj kapablas akcepti la limojn de la homa racio, kaj malfermiĝi al la el la alto venanta revelacio.

Tia kredo, pro tio, ke ĝi estas donaco, ne elĉerpiĝas en arida akcepto de la vero, en ia speco de akiro de la respondoj de la katekismo.

La kredo estas viva realaĵo, la kredo estas aliĝo al la persono Jesuo Kristo, ĝi estas amo plenpasia por tio, kion mi taksas la kialo de mia ekzistado kaj de ĉiu deziro de mia koro, ĝi estas aliĝo al tiu, kiun mi taksas la Sinjoro de la mondo kaj de la historio, tiu, kiu malfermas la libron de la vivo kaj juĝas homojn, naciojn kaj tempojn.

La kredo estas akcepto plena de tiu, kiu eniras en mian koron kaj pravigas la esperon, kiu estas en mi, ĉar Li estas la *resurektinto*, nome la vivanta persono, kiu supervenkis la morton.

La kerno de la kristana kredo estas en tio, ke *la vivo iras preter la morton kaj la morto elplenumiĝas dum la vivo*. Ĝi ne estas simple aliĝo al Jesuo, ĉar Tiu estas bona, ĉar Tiu faris miraklojn kaj, ĉar por ni Li mortis.

Ĝi estas aliĝo al Jesuo, ĉar Li supervenkis la morton, ĉar Li estas viva, kaj eĉ pli multe: *Li estas la resurekto kaj la vivo!*

La aliĝo al Jesuo-vivo - kiu estas donaco kaj sekve devas esti daŭre petata dum la preĝo - portas al vivo-stilo, al tuta serio de sintenoj:

al la kono kaj de la vortoj kaj de la agoj de Jesuo,
al la penetrado en la misteron de la Dia vivo, al la akceptado de la tuta leĝo de la Evangelio ĝis la lastaj sekvoj,
al la partopreno en la vivo de la Eklezio kaj ĉefe en la prisakramenta vivo,
al la engaĝiĝo por la misiista disvastiĝo de la Evangelio...

LA FAMILIO, VARTEJO DE LA KREDO

Tio ĉi estas la kredo, kiun la geedzoj estas vokitaj kune travivi, helpante unu la alian pere de la preĝo, per la instigo, pere de la ekzemplodonado; ĉi tia estas la kredo, kiun la gepatroj havas la devon kaj la gracon transdoni al la filoj.

La kredo estas ja Di-donaco, sed la filoj ĝin rimarkas en la konduto kaj en la vivostilo de la gepatroj: ĝin ili spiras kune kun la aero de la enfamilia vivo.

Ĉi tiun kredon, iom post iom dum la kreskado de la filoj, la gepatroj devos klarigi kaj pliprofundigi, ili ĉefe devos ĝin videble traduki okaze de la grandaj decidoj kaj en la etaj ĉiutagaj elektoj.

Ĉi tiu kredo maturiĝos en la individua kaj familia preĝo, kaj dum la laŭkazaj interparoloj.

Ĉi tia kredo kreskos ĉefe en la momentoj de la provo, de la sufero, de la tento, se ĝi estos nutrata ĝuste de la preĝo.

Ankaŭ la preparo - pli aŭ malpli apuda - al la socia vivo, al la profesio, al la geedziĝo estas precipe frukto de ia vivostilo entrempita en la kredo kaj en la evangelia sperto, kiun la gepatroj komunikis al la tuta familio.

Ankaŭ la duboj kontraŭkredaj, ankaŭ la emo akcepti nur tion, kion oni vidas kaj tuŝas (kiel Tomaso), povas esti feliĉe alfrontataj, se en la familio oni vivas tiun dimension superan, aŭ pli profundan, kiu vidigas la aferojn pere de la okuloj de Dio kaj ne nur pere de niaj okuloj.

Paĉjo kaj Panjo aŭskultos la objetojn kaj la dubojn de la filoj; ili kreos tiun atmosferon de reciproka fido, kiu favoras en la filoj la konfidon kaj la malkaŝon de iliaj pli delikataj kaj turmentaj problemoj.

En aparte malfacilaj momentoj fariĝas nepre la sinturno al la sperto de iu sacerdoto aŭ de iu alia aparte sentema persono, kiu ĝuas la fidon de la familio... kaj de tiu filo, de tiu filino.

Oni nun komprenas, kial la fido estas unu el la feliĉegoj. Vere nefeliĉa estas tiu homo - ni aldonu ankaŭ. tiu familio - kiu estas nur kaj ĉiam defende kuntiriĝinta en rezonadoj, kiu kutimas pri ĉio diskuti kaj ĉion kritiki, kiu ne kapablas agnoski sian etecon kaj akcepti lumon superan, senkaŝe dirite, "la Dian donacon".

Kiu eĉ ne de Dio kapablas akcepti la donacojn, neniam estos kapabla kredi; sed ĉi okaze temas pri intelekta aroganteco, kiu eble estas la aroganteco la plej terura...

Estas ĝuste la infanoj, la etuloj, tiuj kiuj povas helpi la kreskadon de la kredo en paĉjo kaj panjo.

En la naiva simpleco de la infanoj ne estas nur nesperto pro infana aĝo: en ĝi enestas preskaŭ ia *rememoraĵo de Dio*, ia kapablo *intuicii la nevideblon*, kio en la plenaĝuloj ekmankas jen pro ia akriĝinta kritika prizorgo, jen pro la malico, kiu malpurigis ilian koron.

La aĝo de la malfermiĝo al la kredo estas ĝuste la knabeco, pli precize la infaneco, ĉar - kiel diras Jesuo (Mt 18, 10) -:

iliaj anĝeloj ĉiam rigardas la vizaĝon de la Patro.

Kreskante, la filoj devos trovi kialon al la fundamentoj de la kredo, sed estus malbonaĵo, se ili perdus tiun kapablon *iri trans (ne kontraŭ) la racion*.

Jen estas la tasko de la gepatroj, tasko, kiu postulas ĉiutagan trejniĝon en la kredo, kaj ĉi tia trejniĝo daŭre bezonas la preĝon kaj la sakramentojn; se eblas, ĝi bezonas ankaŭ prispiritan zorganton.

Oni ludas grandan ludon; tiun ludon valoras la peno ludi.

3. - Malriĉeco

Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo (Mt 5, 3)

LA EVANGELIA MALRIĈECO NASKIĜAS EL LA AMO

La malriĉeco-mizero estas la manko de ĉio, kio igas ebla kaj inda la homan vivon. Ĝi devas esti finvenkita utiligante ĉian eblan rimedon.

Sed alia afero estas la *evangelia malriĉeco*, tiu travivata kaj predikata de Jesuo kaj de la apostoloj, pro kiu "la malriĉuloj estas feliĉuloj".

Sankta Mateo, parolante pri la malriĉaj "en spirito", komprenigas, ke la evangelia malriĉeco posedas karakterizaĵojn, kiuj estas propraj al ĝi:

- ĝin oni malkovras, ĝin oni amas, ĝin oni evangelizadas, ĝin oni disvastigas, ne parolante pri ĝi sed ĝin travivante, atestante ĝin;
- ĝi naskiĝas el tiu amo, kiu estas partopreno en la amo dia kaj estas esenco, sen-kompensaĵo, humilo, vivo-simpleco;
- ĝi ne estas rifuzo de la bono de la aĵoj, sed aliĝo plena, sen disdividoj kaj sen ŝanceliĝoj, sen kompromisoj, al la bono la plej alta, al la amo la plej granda, al tio *subordigante ĉion alian*.

Laŭ formoj malsamaj, la evangelia malriĉeco estas engaĝiĝo de la sacerdotoj kaj de la religiuloj, sed ĝi povas - kaj devas - esti engaĝiĝo ankaŭ por la edziĝintoj kaj por la familioj.

La vera malamiko de la evangelia malriĉo estas la materia riĉo. Tiu, se utiligata por la bono integra (t.e. por la bono materia kaj spirita) de la homo, estas bonaĵo.

Sed tioma estas la altiro-forto de la materiaj bonoj, ke la homo, kiu ilin posedas de ili estas facile subjuga.

Tro ofte la homo estas sklavo de la aĵoj, kaj lasas, ke tiuj lin kondiĉu: en persona uzo, en klopodado al kariero kaj al prestiĝo, en negocoj, en administrado, ĝis li estas plene enretigita - ankaŭ en la maniero paroli, pensi, ami - de ĉi *logiko* de la *profito*.

Malriĉulo laŭ-Evangelia estas libera, li estas ia sinjoro. Nenion li posedas, sed li kapablas pri-ĝui (kun koro, kiu ne permesas al si emociojn) ĉion. Kiel diras Sankta Paŭlo:

*Homoj nenion havantaj,
tamen posedantaj ĉion. (2 Kor 6, 10)*

LA KONSUMISMAJ TENTOJ DE LA FAMILIO

En familio, ekde la tempo kiam la geedzoj estas ankoraŭ sen filoj, la tento al la riĉeco sin prezentas fortega.

La filoj kostas, kaj tial oni volas kiel eble plej malmulte da ili; oni prokrastigas la naskon de la unua (eble de la ununura!), ĉar oni ne finpagis la ŝuldojn faritajn por la hejmo kaj por ties ornamado...

Hodiaŭ *oni devas havi ĉion*: temas pri la logiko de la merkato, kiu kreas fuŝajn bezonojn, kiuj estas parto de socia kodo, sed ne laŭ la vera senco de la vivo. Sekve, ĉiam aperas io aĉetenda, io, kio estas pli urĝa, kion oni amas pli multe ol filon.

Kiam la filoj estas konsiderataj kiel bonaĵoj akirotaj, kaj ne estas kontraŭe *la signo de la konsekriĝo-interligo* - kiu ripetas tiun dian - kiam la filoj ne estas dezirataj kaj amataj "kiel la Patro amas la filon en la Sankta Spirito", tio estas signo, ke estas forbruliĝonta la vera amo. La riĉaĵoj fariĝis la kriterio por juĝi kaj por agi.

Statistikoj diras al ni, ke kutime la pli bonstataj familioj estas la malpli feliĉaj, ĉar posedo de pli granda bonstato neniigas la amon, kaj, kie amo mankas, tie mankas ĝojo, tie mankas la vivo.

FAMILIO, LERNEJO DE LAŬ-EVANGELIA MALRIĈECO

La vera riĉaĵo de la familio estas la amo; estas la filoj, serĉataj, dezirataj kaj amataj per si mem, kiel Dio ilin amas (temas pri tio, kion ni legis en la antaŭa paĝo).

Oni povas je multo rezigni, je la amo oni ne povas rezigni.

Se la filoj naskiĝas ĉar paĉjo kaj panjo ilin atendis kun grandega deziro kaj al ilia alveno ili sin preparis pere de rezignoj kaj oferoj, ilia naskiĝo portas tiom da ĝojo-forto, da feliĉo, ke tio daŭre plutenos en la gepatroj la kapablon kontentigi je malmulto, je la ĝuo kune disdividi la etajn ĉiutagajn zorgojn.

Filo estos por ili premio kaj riĉaĵo, kiu kreskos de tago al tago.

Por ili ne estos necese eldiri paroladojn pri la laŭ-evangelia malriĉeco: ĉi tia malriĉeco kun sindonemo travivata de la gepatroj, en la filoj fariĝos afablo kaj kontaĝo.

Ĉu ni neniam pridemandis nin, kial, en la Evangelio, Jesuo estas tiom pardonema rilate tiujn, kiuj pekas pro la malforteco de la karno (li pardonas la adultulinon, li la prostituitinon absolvas), kaj kontraŭe li estas tiom severa kaj necedema koncerne la riĉulojn?

Oni povas kun certeco aserti, ke en situacio de digno-montra, akceptata kaj amata malriĉo, estas eĉ pli facile ami sin reciproke en la pureco kaj en la ĉasteco, kontraŭe, la geedzoj, kiuj metas en la unuan lokon la serĉadon de bonstato kaj de riĉaĵo forte hipotekas sian amon: facile renversata tiu estos de egoismaj interesoj.

Riĉaĵon oni ja devas timi. Kaj tiel same, pri la ekonomiaj malfacilaĵoj oni ne devas tro multe zorgi. Kune, pli bone ol se oni estas solaj, oni kapablas elteni la suferojn; kaj kune oni sukcesas ankaŭ eltiri geniajn solvojn, kiuj permesas preteriri la konjunkturojn.

En la ŝlosilo-momentoj de la evoluo de ilia personeco, oni devas tamen diri al la filoj vortojn klarajn pri la amo al la malriĉeco. Oni devas komenci ege frue. Al la infanoj oni ne permesu ĉion ajn, kion ili deziras; ni donus al ili edukon, kiu kreskigus ilin perfektaj egoistoj kaj ili ne estos kapablaj je amo kaj je sobreco.

Se diri la veron, kiam la gepatroj *permesas* ĉion al la filoj, tion ili faras pro ia tre subtila formo de posedema egoismo: ili permesas tion, kion ili mem estus volontaj havi - se ili estus povintaj -: ili projekcias en la filojn siajn inklinojn...

Kiom da familioj estas celtrafaj lernejoj de egoismo!

Helpi la filojn sin senigante je io por tion doni al la aliaj, al la Tria Mondo, por la nehavantoj... Ankaŭ ĉi tio estas maniero por sin ligi al Dio, maniero por vian vivon travivi kiel konsekriĝon.

4. - Afliktiĝo

Feliĉaj estas la plorantaj, ĉar ili konsoliĝos. (Mt 5, 4)

Jesuo ne diras: "feliĉaj la plorantoj, ĉar ili suferas". Jesuo ne metas la feliĉegon en la stato de ploro, sed ĝin metas en la superado de la ploro, tiun *akceptante*.

La feliĉego ne koincidas kun la bonfarto, sed pli precize kun la venko de la malbono pere de la bono.

Jesuo diris al la apostoloj:

*Vi ploros kaj lamentos,
sed la mondo ĝojos;
vi estos malĝojaj,
sed via malĝojo fariĝos ĝojo.*

Kaj li poste aldonis mirindan komparon:

*Virino, kiam si akuŝas, havas malĝojon,
ĉar ŝia horo venis;
sed kiam ŝi naskis la infaneton,
ŝi jam ne memoras ŝian doloregon,
pro ĝojo,
ĉar homo naskiĝis en la mondon!
(Joh. 16, 20-21)*

Kiu ne kapablas suferi, ne kapablas riski, kaj, kiu ne riskas, neniam ion kreas. Ĉar tiu ne amas.

Jesuo, dum sia surtera vivo, sanigis multajn malsanulojn, ploris apud la ĉerko de mortinto... li ankaŭ revivigis iun mortinton. Sed tio, kio estas la karakteriza trajto de lia misio estis sur sin surpreni la suferojn de la homaro, tiel kiel tra la jarcentoj rakontis la Evangelio de Mateo:

*Kaj kiam vesperiĝis,
oni venigis al li multajn demonhavantojn;
kaj li elpelis la spiritojn per vorto
kaj sanigis ĉiujn malsanulojn;
por ke plenumiĝu tio,
kio estis dirita per la profeto Jesaja, nome:
"Li mem prenis niajn malfortaĵojn*

kaj portis niajn malsanojn".
(Mt 8, 16-17)

Ankaŭ por Jesuo venis *la horo* (kp Joh 17, 1). Kaj temis pri terura horo, kiu koincidis kun *la horo de liaj malamikoj* ("ĉi tiu estas via horo, kaj la potenco de mallumo." Lk 22, 53). Sed el tiu horo, Jesuo elvenis venkinta kaj resurektinta. La Paska ĝojo estus eĉ ne ekzistinta - kaj ĝi ne estus fundamento de nia savo kaj de nia kredo - se Jesuo ne estus antaŭe konatiĝinta kun la kruco kaj kun la morto. Sen morto, resurekto ne estas, kaj sen resurekto, ne ekzistas vera vivo.

La afliktiĝo ĉiam naskiĝas pro ia kontrasto, aŭ pro ia malfunkciado, en la persona aŭ en la komunuma vivo; ĝi estas parto de la malmulteco kaj de la malfortiko de nia naturo.

La Biblio al ni ankaŭ instruas, ke la doloro eniris la mondon pro la peko. Dio, en Lia senfina bonvolemo kaj providenco, nin liberigis de la peko (pere de la morto de Kristo), sed ne de la suferoj.

Kial?

Ĉar sufero, kiam ĝi estas alrigardata sen angoro, kiam ĝi estas akceptata kaj ne ribele forpelata, povas fariĝi nia aliancano, en la senco, ke ĝi spronas nian kuraĝon kaj nian amon al la serĉado de ĝusta kaj ŝatinda solvo. En ĉi tiu senco, suferado naskas konsolon:

Ĉar, kiel la suferoj de Kristo abundas ĉe ni, tiel same abundas ankaŭ per Kristo nia konsolo.

Sed se ni afliktiĝas, tio estas por via konsolo kaj saviĝo; aŭ se ni konsoliĝas, tio estas por via konsolo,

kiu energias, per la pacienca elportado de la samaj suferoj, kiujn ni ankaŭ suferadas.
(2 Kor. 1, 5-6)

Nu, la amo estas tio, kio transformas la doloron al konsolo. Kaj Dio nin kreis, por ke ni amu, kaj ne por ke ni ploretadu aŭ por ke ni rezignu, aŭ por ke ni protestadu: neniam ni kreskos, se ni tiel kondutos.

Edukadi kaj suferadi estas arto mirinda, sed malfacila. En kiuj familioj la gepatroj edukas la filojn al rezigno, al eltenemo, al la serena akceptado de la provoj?

Aŭ, pli vere, ĉu ne okazas, ke la gepatroj unuaj sin elmontras antaŭ la filoj ploremaj, scenon farante kaj blasfemante, tuj kiam malfeliĉo frape trafas la familion?

Kaj eĉ pli frue, kiam du gefianĉoj kapablas akordiĝi pri la maniero bone ordigi la malfacilaĵojn? Kiamaniere ili kapablas akcepti malagrabraĵon, riproĉon, oferon?

Kiom da paroj de gefianĉoj sukcesas resti eĉ ne duontagon sen vidi unu la alian, por diri kaj rediri al si reciproke la samajn vortojn, kaj por senhalte interkisiĝi, daŭre serĉante nur facilajn emociiĝojn, facilajn amindumadojn....

Sed kie, kiam ili lernos suferi, sin bremsi, rezigni ankaŭ je permesitaĵoj, elteni la forecon? Morgaŭ, kiam ili estos geedzoj, ili sentos naŭzon, ĉar ili ĉiun tagon kunadis: *kutimiĝo*. Neevitebla kaj perversa rezultato de sperto, kiu ĉiam eskapis kaj de rezignemo kaj de kruco.

Oni ne devas esti masohistoj. Kontraŭe! Kiel ni jam vidis, Dio nin kreis por la feliĉego. Sed feliĉego ĉiam estas frukto, kiu venas poste, kiu estas konkerota, dezirata kaj - tion ni klare diru - trasuferata.

Ĝi estas universala kaj ĉiutempa leĝo. Leĝo el kiu ne povis foriĝi - ne nur ne volis - eĉ la Filo de Dio.

"Dio estus povinta savi nin ĉiujn sen la sendo de sia ununaskita Filo sur la teron"; tiel ni diras, ĉar ni opinias, ke Dio estas ĉiopovo kaj pardonemo, kaj ke, konsekvence, per ununura esprimo de volo li povas forviŝi ĉiujn punojn kaj ĉiujn pekojn de la homoj.

Se oni bone pripensas, tio ne estas vera. Dio ne povas forgesigi la tutan tragedian eventon de la peko per simpla viŝil-froto, pro iaspeca amnestio, kiu forviŝas la punon, sed ja ne ŝanĝas la koron de la homo.

Kaj je la senlima feliĉego de Dio - feliĉego al kiu ni ĉiuj estas vokitaj - ne eblas, ke partoprenu koro, kiu ne estas plene pura kaj kiu ne perfekte amas.

Pardonitaj pekintoj, kiuj tamen ankore ankoraŭ estas makulhavaj, ne rajtas ĉeestadi antaŭ Dio; ne nur, ĉar Dio ne povas toleri vidi ilin antaŭ si, sed ĉar ili mem ne povas esti feliĉaj - en kontakto kun la senfina feliĉego - se ankore ili estas ankoraŭ pekuloj...

Nu, la kulpo estas forpelota pere de la konvertiĝo de la koro, kaj la koro ne konvertiĝas, ne fariĝas amanta, se ĝi ne pasas tra la krisolo de la provo. Jesuo *devis* suferi, por malfermi en la koro de la homo itineron de pentofaro, de interna maceriĝo, cele ke, fine, el tiu maceriĝo naskiĝu sparko de amo, la komenciĝo de la elaĉeto.

Necesa estas la suferado, por lerni ami. Kiu ne suferas pro malsato ne provas la ĝojon ĝui satiĝon. Kiu ne suferas subkruce, neniam povos provi la ĝojon fari agon bonvolan, de amo, de pardonemo.

KIAM MALSANO VIZITOS LA FAMILION

Iun tagon venos en la familion malsano, malfeliĉaĵo, la morto. Kiu sin preparis por alfronti tiujn malfacilajn momentojn, trejniĝante la koron je eltenemo kaj la spiriton je klarvidemo? Familio estas taŭga loko por akcepti malsanulon; kaj enhejma kurac-prizorgado estas ĉiam preferinda, ĝis ne estos vere necesaj malsanulejaj strukturoj.

Hodiaŭ la hospitala terapio havas enormajn avantaĝojn - se oni prikonsideras tion el pure prikuracista vidpunkto - por la kuracado de multaj malsanoj, kaj sekve oni kutimas sin orienti al en-hospitaliĝo.

Sed la moderna medicino unuanime diras, ke koeficiento tute ne malgrava, profite al resaniĝo, estas la asistado de la familianoj kaj ties ĉeesto flanke de la paciento; havi la

eblecon vidi konatajn vizaĝojn, ricevi amajn, prizorgajn atentojn de personoj, kiuj apartenas al la sama familio, estas realaĵoj, kiuj tre ofte favore agas sur malsano pli multe ol kuraciloj, ĉar la homo ne estas nura korpo, la homo estas ankaŭ spirito, animo, koro, amomontro. En familio, krome, oni havas la avantaĝon, ke - kutime - pluraj homoj alfrontas la saman provon; oni povas helpi unu la alian, oni kuracas sin reciproke; ĉi unueco en la alfrontado de la provoj fariĝas, siavice, okazo por ke la familio fariĝu (aŭ malkovru, ke ĝi estas pli kununuigita, ĉar la fideleco refortikigas... kaj la malfidelaĵoj malaperas.

Facila eksedziĝemo estas pruvo evidenta, ke hodiaŭ la societo estas absolute nekapabla prepari siajn filojn esti kuraĝaj okaze de alfronto de suferado kaj de malfacilaĵoj. La amo estas konkero, kiu naskiĝas, ĉar oni kapablas suferi. Suferado fariĝas ne nur eltenebla, sed ankaŭ benata, kiam ĝi estas vivigita, kaj ĝi estas kialo de amo. Jen ni alvenas je la sublimigo de la afliktiĝo. Tiu neeviteble transfiguriĝas, kiam ĝi estas akceptata kun fido kaj kun amo, en ĝojo kaj kun danko.

Oni povus prezenti multajn atestojn - senperajn atestojn de tiu, kiu estas nun skribanta - pri eventoj dum kiuj la provo taksata estis kiel sendita aŭ permesita de la Sinjoro, kaj je tio dankon oni diris al la Sinjoro.

La homa koro estas ankaŭ kapabla laŭdi kaj gloradi Dion kun larmoj en la okuloj kaj suferante en la korpo kaj en la spirito; la kredo estas - se ĝin konsideri homece - tenebro, sed ĝi malfermas la lumojn de la animo al senlima lumo kaj donas la *certecon, ke la Sinjoro ĉeestas*, ke la Sinjoro kun ni estas kunportanta la krucon; eĉ, Li estas portanta nin mem, Li nin subtenas per Sia brako kaj Li nin portas en Sia mano. "Mi vin ne vidis, sed poste mi eltrovis, ke Vi ĉeestis... kaj, se mi ne spertis mankon, tio signifas, ke Via amo min subtenadis."

Aliflanke, nia kristana kredo proponas al ni tiun neatingeblan altsignifan celebradon, kiun ni nomas "*eŭkaristio*" (kaj tio ja signifas: danko), kio estas ĝuste la danko, kiun la homaro levas al Dio de la kruco de la krucumita Filo, sed kio ne estus perfekta danko se en si mem ne kunportus la ĝojon de la resurekto.

Ni povus tial diri ankaŭ:
Feliĉaj tiuj, kiuj mortas,
ĉar ili releviĝos!
Feliĉaj la familioj vizitataj de la provoj,
ĉar ili estas instigataj malfermiĝi al la amo
... kaj al la ĝojo"

Pli bone ni ne povus fini ĉi tiun mediton, se ne aŭskultante unu el la paĝoj de la Floretoj (de Sankta Francisko) (el la 8.a ĉapitro:)

... daŭrante ĉi tiu maniero bone paroli dum du mejloj, fratulo Leono kun granda admiro lin demandis dirante: "Patro, mi petas vin en la nomo de Dio, ke vi diru al mi, kie estas perfekta ĝojo". Kaj Sankta Francisko al li respondis: - Kiam ni alvenos ĉe Sankta Maria de

la Anĝeloj, tiel malsekiĝintaj pro la pluvo kaj pro la malvarmo frostiĝintaj kaj kovritaj je koto kaj pro malsato afliktiĝintaj, kaj ni alfrapos la pordon tiean kaj la pordgardisto venos en kolero kaj diros: "Kiuĵ vi estas" kaj ni diros: "Ni estas du el viaj fratuloj" kaj tiu diros: "Vi la veron ne diras, vi estas kontraŭe du malbonagantuloj, kiuj iras trompante la mondon kaj ŝtelante la almozojn de la malriĉuloj; iru for", kaj li ne malfermos al ni, kaj nin lasos ekstere, sub la neĝo kaj en la akvo, kun la sento de malvarmo kaj de malsato, ĝis noktiĝos; en tiu okazo, se ni tiom da riproĉoj kaj da kruelaĵoj kaj tiom da forpeloj kun pacienco eltenos sen senti perturbon kaj sen grumblado, kaj ni humile pensos, ke tiu pordogardisto vere konas nin, kaj, ke estas Dio, kiu lin paroligas kontraŭ ni; ho Fratulo Leono, skribu, ke en tio estas la perfekta ĝojo.

- Kaj se ni daŭrigos la frapadon, kaj se li elvenos ĝenata kaj kiel maloportunulojn li nin malbonmaniere forpelos kaj li nin vangofrapados, dirante: De ĉi tie iru for, nekonsiderindaj etaj ŝtelistoj, iru al la gastejo, ĉar ĉi tie vi nek manĝos nek tranoktados. Se ni ĉi tion eltenos kun pacienco kaj kun gajeco kaj kun granda amo: ho Fratulo Leono, skribu, ke en ĉi tio estas la vera ĝojo.

- Kaj se ni, des pli devigitaj de malsato kaj frostoj kaj de la nokto, ankoraŭ frapados kaj vokos kaj propetos pro la Dia amo kaj kun forta ploro, ke li al ni malfermu kaj, ke li enirigu nin, kaj tiu pli multe estos skandalita kaj diros: "Ĉi tiuj estas maloportunaj fiuloj, kaj mi ilin pritraktos laŭkonvene" kaj li eliros kun nodo-riĉa bastono, kaj nin prenos je la kapkovrilo kaj nin terenĵetos, kaj en la neĝon li nin enrulos kaj li nin batos utiligante la nodojn de tiu bastono; kaj ni ĉion tion eltenos pacience kaj kun gajo, pensante pri la suferoj de Kristo benata, kiujn ni devas subteni pro la amo al Li: ho fratulo Leono, skribu, ke en tio perfekta estas la ĝojo.

- Kaj aŭskultu nun la konkludon, fratulo Leono; super ĉiuj aferoj kaj favoroj kaj donacoj de la Sankta Spirito, kiujn Kristo permesas al Siaj amikoj, estas tio, ke ni venku nin mem, kaj volonte, pro la amo al Kristo ni eltenu suferojn, mokojn, malhonorojn, malagrablojn. Sed pri ĉiuj aliaj donacoj de Dio ni ne povas fieri, por ke ili ne estas niaj, sed de Dio ... sed pri la kruco de la turmantiĝo kaj de la afliktiĝo ni povas fieri, ĉar tiu estas nia.

5. -Mildeco kaj ne-perforto

Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron. (Mt 5, 5)

La tero, pri kiu parolas Jesuo, estas la "promesita lando"; ne temas tamen pri tiu lando - Palestino -, kiun la hebreoj konkeris en la tempoj de Moseo kaj de Josuo, revenante al la lokoj de Abrahamo kaj de la patriarkoj, sed la nova lando kaj la novaj ĉieloj pri kiuj al ni parolas Sankta Petro kaj la Apokalipso: nome, la estonta patrujo. Kaj tamen la mitoj estas jam ĉi tie, sur la tero, konkerantoj. Ili tenas en siaj manoj ĉies koron.

Ĉi feliĉego ŝajnas kontraŭdiri alian diron de Jesuo:

*la regno de la ĉielo estas perfortata,
kaj perfortuloj kaptas ĝin. (Mt. 11, 12)*

La perforto al kiu ĉi tie aludas Jesuo estas la perforto kontraŭ ni mem, kontraŭ egoismo, kontraŭ la peko, kontraŭ la nekredemo. La regno de la ĉieloj - nome - ne estas donaco: oni devas ĝin meriti kaj oni devas suferadi por ĝin konkeri.

Kontraŭe, la invito kaj la voko al la feliĉego de la mildeco indikas sintenon novan de la disĉiplo de Jesuo rilate al la fratoj; la superfortuloj ne taŭgas por konstrui la regnon de Dio.

Ni iru al la radikoj de ĉi realaĵo: kiam Dio havis sian kunpuŝiĝon kun la mondo - pere de la enkarniĝo de Lia Filo Jesuo - li sin vestis per malforteco kaj mildeco. Li volis naskiĝi en staltrogo kaj ricevi la saluton de la paŝtistoj. Li ĝenis nenium *potenculon*. Li volis sin trudi al neniuj kaj imponi sur neniuj.

Kaj kiam Li komencis prediki, sin trovante en kontakto kun la homamaso, Li plej amis la kunestadon kun la etuloj, kun la humiluloj, kun la malriĉuloj, kun tiuj, kiuj *havis nenian rolon*. Tiele Li sin difinis:

"milda kaj korhumila" (Mt 11, 29)

Aliflanke, jam Maria, Lia patrino - lumigita de la Sankta Spirito - kantis antaŭ Elizabeta la triumfon de la mildeco de Dio sur la perfortemo de la mondo:

*"Li montris forton per Sia brako,
Li dispelis fierulojn en la penso de ilia koro.*

*Li malaltigis potenculojn de iliaj tronoj,
kaj Li altigis humilulojn.
Malsatulojn Li plenigis per bonaĵo,
kaj riĉulojn Li forsendis malplenaj."*
(Lk 1, 51-53)

Dio supervenkis - pere de la mildeco de Maria kaj de Lia Filo - la tri fierajn perfortaĵojn de la mondo:

- * la kulturan arogantecon
- * la politikan povon
- * la ekonomikan povon.

Kulturo, politiko kaj ekonomiko estas nerezigneblaj por laŭjusteca kunvivado inter la homoj, sed oni ilin devas serĉi kun humileco kaj mildeco, alimaniere ili fariĝas rimedo de subpremado de la homo sur la homo, ia formo de sklaveco kaj de regemo.

La tuta vivo de Maria - kiel tiu de Jesuo - estis kohera kun ĉi tiu spirito de mildeco. Maria estas ĉiam diskreta, ankaŭ kiam en Kanao ŝajnas, ke ŝi devigas iamaniere Jesuon de li petante miraklon; ŝi nur petos la servistojn "fari tion, kion Li diros al ili". Pere de ŝia mildeco, ŝi ricevas.

Maria neniam aperas protagonisto, la nura escepto estas sub la kruco. Kaj tamen "ĉiuj generacioj ŝin proklamos beata".

Ricevas ĉiam pli multe tiuj, kiuj postulas pli malmulte. Niaj koroj spontanee malfermiĝas al la mildkoruloj, kaj kontraŭe ili fermiĝas kaj rigidiĝas fronte al la sintrudemuloj.

Jesuo sendas en la mondon siajn disĉiplojn, kiel ŝafaron inter lupoj. Lia diro valoras laŭ tio, ke ŝafo restas ŝafo kaj ne cedas je la tento uzi la armilojn de la lupo.

Carlo Carretto (pr. Karlo Kareto), komentariante la epizodon de la lupo de Gubbio (pr. Gubjo), skribis (en sia tre trafa, eta biografio de Sankta Francisko el Asizo laŭ la titolo *Io, Francesco (Mi, Francisko)*), ke la miraklo de Francisko konsistis en tio, ke li konvinkis la loĝantaron de Gubbio bone kondukti al la lupo, al tiu donante manĝaĵon; la lupo tiamaniere mildiĝis, kaj ĝi ne plu prirabadis la ŝafejojn.

Sugestia interpreto! La veraj mirakloj, kaj - ni povas tion diri, la plej malfacilaj - estas humilaj gestoj, kiuj rilatas bonecon kaj mildecon...

La devo esti mildaj estas devo de ĉiuj. Sed ja estas en la familio, pro la instruoj de la karesemo de paĉjo kaj panjo, ke la infanetoj havas la okazon lerni ne fariĝi perfortemuloj.

En etoso de mildeco, ili kreskadas serenaj kaj sekuraj, dum - kontraŭe - antaŭ streĉoj kaj perfortoj ili fariĝas timemuloj kaj nesekuraj: la malgajajn konsekvencojn koncerne la karakteron, oni konstato pli malfrue, dum kaj junaĝo kaj la aĝo matura...

Milda ne signifas malforta; malforteco estas malkuraĝo kaj originas de la manko de amo.

La amo plifortikigas, plikuraĝigas, sed pere de la armilo de la alrideto kaj de la konvinkemo. Antaŭ ĉio, ĝi ne envultas la konsciencojn (envulto estas perforto subtilega,

sekve ege danĝera).

La forto de la mildeco ne kuŝas nur en la maniero aŭ en la metodo: ĝi estas la forto de la vero kaj de la amo: ĝi imponas per si mem, ĝuste pro ĝia kohereco kun la vero. La vero, je stato pura, estas ĉiam vero de amo.

Kiu kredas en la forto de la vero kaj de la boneco vivas en paco profunda. Pro tio, tiu neniam povas ekscitiĝi kaj restas ĉiam primajstranto de si mem. En silento, laŭkondute diskreta kaj malaplomba, sen pretendoj.

Superfortulo plilaŭtigas sian voĉon por doni al siaj vortoj kaj al siaj agoj surogaton de tiu aŭtoritato morala, kiun li ne posedas.

Se la edzo hejmenvenas incitiginta kaj koleriĝema, la edzino povas fariĝi por li serenigilo, se ŝi lin bonvenigas montrante ĝojon kaj afablon.

Ĉiuj kvereloj naskiĝas de momentoj de nekontrolita koleremo; kelkfoje iu ne sukcesas sin regi. Kaj estas la filoj, tiuj, kiuj pagas, tiuj, kiuj antaŭ scenoj de perforto suferas kaj estas traŭmatizitaj.

La tiom multe malŝatata profesio de dommastrino estas kontraŭe - se ĝi estas travivata en milda simpleco - la unua profesio familia, kaj ĝi estas la plej meritplena.

La dommastrino estas tiu, kiu gardas la etoson dolĉan kaj afablan de la familio, kaj ŝi kapablas esti bona, serena kaj trankvilega, antaŭ ĉiaj provokoj: ĉar al ŝi interesas protektadi, defendi, kreskigi la pacon kaj la konkordon inter la hejmaj vandoj.

Nur tiu, kiu kapablas silenti kaj cedi, havas sufiĉajn rimedojn por rekonkeri la ŝajne perditan grundon.

Se vi plilaŭtigas la voĉon, la alia rebatas.

Se vi silentas kaj pardonpetas, la alia rimarkas, ke li transcendis, kaj ne plu scias al kiu sin turni. Li estas senarmiligita.

Restariĝas la paco, revenas la rezon-kapablo... Oni povas sin reciproke kompreni, oni rekomencas ami... Kaj - laŭ vi - tio estas malmulto?

Pere de ĉi tiuj mitoj oni povas konstrui la urbon, restarigante la pacon en la familioj,

Resume: *heredi la teron!*

6. - Servado humila

Feliĉaj estas tiuj, kiuj lavas la piedojn al siaj fratoj. (Kp Joh. 13, 12-17)

En familio, amo fariĝas servado

Ĉi feliĉego - en la laŭlitera esprimo citita ĉi tie - troviĝas en neniuj paĝoj de la Biblio; ĝi tamen eltiriĝas el la kunteksto de la rakonto pri la lavado de la piedoj, kion Jesuo faris dum la lasta vespermanĝo.

Lavinte la piedojn al la apostoloj, Jesuo klarigis la geston, kiun li faris:

*"Ĉu vi scias, kion mi faris al vi?
Vi nomas min Majstro kaj Sinjoro,
kaj prave vi diras, ĉar tia mi estas.
Se do mi - la Sinjoro kaj la Majstro -
lavis viajn piedojn,
vi ankaŭ devas inter vi lavi la piedojn.
Ĉar mi donis al vi ekzemplon,
por ke vi ankaŭ faru tion, kion mi faris al vi.
Vere, vere, mi diras al vi:
Sklavo ne estas pli granda ol lia sinjoro,
nek estas la sendito
pli granda ol la sendinto.
Se ĉi tion vi scias,
vi estas feliĉaj, se tion vi faras".
(Joh. 13, 12-17)*

Interese estas rimarki kiel Johano enkondukas la humilan geston de Jesuo, kiu lavas la piedojn al la apostoloj, pere de iuj indikoj pri nekutima soleno:

*"Antaŭ la Paska festo
Jesuo, sciante, ke lia horo venis,
por ke li transiru el ĉi tiu mondo al la Patro,
aminte siajn proprulojn, kiuj estis en la mondo,
amis ilin ĝis la fino.
Kaj dum la vespermanĝo, (...)
Jesuo, sciante, ke la Patro donis ĉion
en liajn manojn,*

*kaj ke li venis de Dio kaj iras al Dio,
leviĝis de la vespermanĝo kaj demetis siajn vestojn;
kaj li prenis viŝtukon,
kaj sin zonis.
Poste li verŝis akvon en la pelvon,
kaj komencis lavi la piedojn de la disĉiploj
kaj viŝi ilin per la tuko,
per kiu li estis zonita.
(Joh. 13, 1-5)*

En ĉi tiu paĝo, Johano tre bone konscias, ke li estas anoncanta al la eklezio revolucion geston. Jesuo volis radikale renversi ian pensomanieron, ian kutimon, ian kulturon. Priskribita estas servado tre humila, tiom humila, ke ĝi estis rezervita al la sklavoj; la tiamaj stratoj estis kutime polvo- aŭ koto-plenaj, kaj kiam gasto eniris domon, tuj sklavo al li lavis la piedojn.

Ĉi okaze la resonado de la gesto havas universalajn proporciojn kaj severe malaprobas la manieron, laŭ kiu de ĉiam oni ordonas kaj estradas, ofte ankaŭ en la kadro de la familiaj interrilatoj.

Jesuo volas, en la maniero la plej nepridiskutebla (tio rilatas liajn lastajn volojn, rilatas la testamenton, kiun li al ni lasis antaŭ ol morti), ke en la eklezio, tiu, *kiu regadas estu servisto al la aliaj*.

La epizodo de la piedlavado raportita estas nur de Johano; sed en Luko ekzistas peco paralela, enmetita ĝuste okaze de la lasta vespermanĝo; valoras la peno, ke ĝin ni legu, ĉar ĝi certe aludas al tiu fakto de la lavado de la piedoj, kiun Johano rakontas.

*"Kaj fariĝis ankaŭ inter ili disputo,
kiun el ili oni opinias
la plej granda.
Kaj Li diris al ili:
'La reĝoj de la nacioj faras sin sinjoroj super ili;
kaj tiujn, kiuj potencas inter ili,
oni nomas bonfarantoj.
Sed vi ne estu tiaj;
sed, kiu estas la pli granda el vi,
tiu fariĝu kiel la pli juna;
kaj tiu, kiu estas ĉefa, kiel la servanto.
Ĉar, kiu estas la pli granda,
la sidanto ĉe manĝo, aŭ la servanto?
ĉu ne la sidanto ĉe manĝo?
sed mi estas meze de vi,
kiel servanto!'"
(Lk. 22, 24-27)*

Sed ĉi tie estas ne nur principo, kiu renversas la universalan kulturon: ĉi tie estas iu principo, kiu starigas novan dignon!

Konklude de la rakonto de Johano, Jesuo diras:

"... vi estas feliĉaj, se tion vi faras".

Temas pri solena feliĉego, temas pri deklaro de digno, de grandeco, de feliĉo, kiu estos ratifita enĉiele!

Ĉi tiu rimarko povas ŝajni troigo. Sed temas pri la *feliĉego de la humila servado*, kiu fariĝas eĉ pli signifoplena, pli penetranta en nian spiriton, se ni aŭskultu tion, kion Jesuo - ankoraŭ en la Evangelio de Johano - diros pli poste:

*"Mi jam ne nomas vin sklavoj,
ĉar la sklavo ne scias,
kion lia sinjoro faras;
sed Mi nomis vin amikoj,
ĉar ĉion, kion Mi aŭdis de Mia Patro,
Mi sciigis al vi.
Vi ne elektis Min,
sed Mi elektis vin..."*
(Joh. 15, 15-16)

Ĉi tiu nova interrilato de amikeco - kaj Jesuo, iom antaŭe, diris: *"Neniu havas amon pli grandan ol tio, ke iu demetas sian vivon por siaj amikoj. Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion mi al vi ordonas"* (Joh. 15, 13-14) - ne almetiĝas por malplenigi je senco la rilaton de la servisto, kiu lavas la piedojn, kio kontraŭe tiun egiĝas.

Nu, por Jesuo amiko = servisto. La vera amiko fariĝas servisto, kaj la servado iĝas vehiklo de amikeco, signo de amikeco, ĝis la demeto de sia vivo.

Ĉar la servado humila, tiu, kiu antaŭvidas la surgenuiĝon por lavi la piedojn al siaj propraj disĉiploj, kialigita estas de interrilato eĉ pli profunda, eĉ de interrilato dieca: la interrilato de la senfine feliĉega amo, kiun la tri diaj Personoj eterne travivas!

Nome: la interrilato mastro-servisto, kiu naskiĝas ekstere de rilato de amikeco, difinita estas pere de la leĝoj de la nacioj kaj de la reĝoj. La mastro ordonas kaj la servisto plenumas; kaj tion oni ne pridiskutas! Temas pri la kulturo de la jarcento, t.e. pri la kulturo de la mondo.

Sed tie, kie ekzistas rilato de vera amikeco - des pli multe se tiu estas bazita sur la Di-triunua amo: *"Kiel la Patro Min amis, tiel Mi vin amis!"* -, la plej granda, kun amo kaj humilo, servas la plej malgrandan.

Temas pri paradokso, sed estas nepridubeble vere, ke la gesto, kiun Jesuo faras lavante la piedojn al la disĉiploj estas preciza reflektiĝo - ĉi tie, sur la tero - de *kiamaniere*, en Dio, sin

amas la tri diaj Personoj!

LA KARAKTERIZAĴO DE LA ETAJ ENFAMILIAJ SERVOJ

Estas ja en la familio - kiu naskiĝas pro la geedziĝa interligo, laŭ bildo kaj similo de la dia interligo-konsekro -, ke ĉi tiu feliĉego trovas sian plej realan konkretiĝon; estas ja en la familio, ke la plej granda sin metas je la servo de la plej malgranda.

Paĉjo kaj panjo submetiĝas, por la ĵus naskiĝinta bebo, je la servoj la plej humilaj, kun senlima mildeco, kun amo kaj kun ĝojo, neniam laciĝante kaj kun plena partopreno, preskaŭ enmemiĝante en la infanon.

Estas proverbaj la paroladetoj, kiujn patrino adresas al infano en tiuj momentoj: ŝi eldiras vortojn per ŝi mem eĉ stultetajn, ŝi inventas terminojn, kiuj en nenia vortaro ekzistas, ŝi dorlotadas kaj havas sintenojn, kiuj pruvus ŝin freneza en kiu ajn alia situacio... kaj tamen neniam okazis, ke iu patrino hontis, ĉar ŝi diris aŭ faris tion, kaj neniam ajn iu, aŭskultante aŭ vidante, miris pri tio.

Ĉu ne estas grandioze? Ĝuste en la familio ni malkovras, ke la veraj rilatoj naskiĝas de tiu interligo, kiu metas je la bazo de ĉio - nur kaj ĉiam - la amon, tiun amon, kiun oni donas, tiun amon senkostan, nekalkuleman, nemezuratan.

La senkosteco estas la karakterizaĵo de la amo humila, kiu naskiĝas kaj kreskas interne de la familio. Oni ĉion pagas, ekster la hejmo; *nenion oni pagas*, enhejme. Ĉi tiu stilo de senkosteco estas la aŭtentika fundamento de la feliĉego.

Je la bazo de la edukado, la gepatroj devas meti la plenan pretecon plenumi kian ajn servon. Enhejme ankaŭ senatano aŭ ministro povas lavi la telerojn aŭ purigi la plankon (cetere, la termino *ministro* devenas de la latina *ministrari*, kio signifas ĝuste *servadi*).

La gepatroj ne hontu plenumante humilajn servojn por la filoj (sen, pro tio, fariĝi stultaj servistoj de filoj kapricemaj...); nur tiel ili povas orientigi iliajn korojn fariĝi pretaj por la plej humilaj kaj kaŝitaj agoj, kaj ĉi-foje, ne nur hejme, sed ankaŭ ekstere, senkaŝe antaŭ la mondo!

Sankta Paŭlo, skribante al la fidela disĉiplo Timoteo, laŭdas la vidvinon, kiu

*"estas bone atestata pri bonfarado,
edukis infanojn,
gastigis fremdulojn,
lavis la piedojn de la sanktuloj,
helpis la suferantojn,
kaj sekvis ĉian bonfaradon".
(1 Tm 5, 10)*

La vidvinoj, je la tempoj de la apostoloj, estis aparte alte taksataj kaj tiuj, kiuj kapablis

konduki dum sia vidveco simple kaj laŭ evangelia sindonemo, plenumis en la komunumo delikatajn taskojn kaj formis ian apartan kategorion, kiu estis ŝatata kaj respektata.

Finfine, ĉi tiuj vidvinoj portis internen de la kristana komunumo tiun stilon, kiu signis la vivon de ilia enhejma familio.

Tio, kio igas granda la familion aŭ la eklezion ne estas la ekstera ŝajno de la aferoj, kiujn oni faras, sed la spirito de amo kaj de servado laŭ kiu tiuj aferoj estas plenumitaj.

7. - La pureco de la koro

Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion. (Mat. 5, 8)

Kiam Jesuo proklamis la feliĉon de la korpuroloj, li volis frapi tiun, kiun tiam oni nomis "laŭleĝan purecon".

Ĉi tia pureco estis afero tute ekstera, kiu ofte aliformiĝis al hipokriteco. Laŭleĝe, iuj agoj alpreniĝis al homo, kiu ilin plenumis ian nepuraĵon, kiel ekzemple: preni manĝaĵojn, kiujn oni konsideris fiaj (ekz. viando de porko), tuŝi kadavron, tuŝi sangon de homo...

Alpreninte la laŭleĝan malpurecon, tiuj personoj devis submetiĝi je skrupulaj purigo-ritoj. Se la leĝo pri la nepureco havis - je la tempo de Moseo - la celon teni la hebreojn for de iuj agoj de profanado kaj respektigi la harmonion de la naturo (hodiaŭ ni parolus pri ekologiaj leĝoj), kun la antaŭeniro de la jarcentoj, ĝi alprenis formojn absurdajn kaj ĉefe perdis la originalan signifon kiu koncernas la respekton de la persono kaj la honoradon de Dio.

Jesuo volas konduki la disĉiplojn al sincereco kora, al ia animpretiĝo al amo sincera kaj sindona por la bono, por la belo, por tio, kio estas justa, por tio, kio estas vera.

En alia okazo, Jesuo diras, ke ne estas la *nepuraj* manĝaĵoj, kiuj infektas la homon, sed pli multe la pensoj kaj la malbonaj agoj, kiuj venas el la koro.

Jesuo multon insistas pri la koro, invitante nin konsideri kun pli granda atento, kiuj sentoj enestas en nia eno, kie situas nia vera *mi*.

En ĉi tiu kunteksto situas la *ĉasteco*, kiel fundamenta virto de la geedza vivo; kaj konsekvence, la feliĉo de la *korpureco*.

Pureco kaj ĉasteco ne estas nur virtoj de tiu, kiu volas vivi en senedzeco aŭ en stato virgeca. Ili estas virtoj de ĉiuj, kiuj volas fari el sia ekzistado *donacon, amo-oferon*.

Inter geedza vivo kaj elekto de virgeco-needziĝo ja estas klara diferenco, kiu konsistas en la uzo, aŭ en la ne-uzado, de sia propra seksemo, genero-kapablo.

Ne estas ĝuste vidi en la vivo senedzeca-virgeca ian specon de manko de homeco (tiu estus tiamaniere humiligita en unu el ĝiaj fundamentaj kapabloj, kiuj formas la personecon mem).

Simile, oni ne devas vidi en la vivo geedza ian specon de lando de Bengodi, kie ĉio licas kaj oni povas trovi amuzon, sen danĝero de pekado.

La afero estas ege malsama. En unu okazo, kiel en la alia, kaj ni diru senhezite, en ĉiuj okazoj (ĉar nenia ekzistado surtera estas sen amo), la ĉasteco estas virto respektota, amota kaj realigota; kaj tion oni diru ankaŭ por la pureco de la koro, kiu estas la animo de la

ĉasteco.

La virto de la ĉasteco konsistas en tio: *vivi la seksemon kun la ununura kialo de la amo.*

Needziĝinto aŭ virgulino, kiu estas konsekrinta al la Sinjoro sian vivmanieron vivi la seksemon tute ne estas malpli homeca ol la geedziĝintoj.

Kiu rezignas je la uzado geedza-generopova de la seksemo pro kialoj, kiuj ne estas amaj (ekz. por ne elteni la ĝenon kaj la zorgojn de familia vivo), restas ja persono manka, kiu ne maturiĝis.

Sed, kiu rezignas je edzino, edzo, filoj, por sin doni al pli vasta helpota familio de fratoj kaj fratinoj, (malriĉuloj, malsanuloj, handikapuloj, ekzilitoj, malsatantoj... nekredantoj) ne nur povas fari grandan bonaĵon, sed tiu mem - kiel homo - kreskas.

Tio supredirita validas ankaŭ kiam la formo de vivo, kiun oni elektas estas preĝado kaj kontemplado interne de la muroj de monaĥejo. Tiuj animoj estas fakte mirinde *malfermitaj* al Dio. Kaj en tio partoprenas ankaŭ iliaj korpoj, evoluiĝante dimensiojn, kiuj ne forlasas la sekson (ankaŭ se tiuj dimensioj ekskludas ĉian interrilaton kaj kontentiĝon priseksan).

Oni ne pensu - nur por doni ekzemplon - ke en la mistika Tereza el Avila aŭ en la mistika Johano de la Kruco la sekseco ne donis sian kontribuon, ankaŭ se ekster la kutima signifo, kiun ni - malpliige - donas al la priseksa energio.

Ili amis kaj preĝis pere de sia tuta estaĵo, pere de la animo kaj de la korpo, de la spirito kaj de la sekso.

ANKAŬ LA GEEDZA SEKSEMO ESTAS KONSEKRIĜO

Ankaŭ, kiu amas evoluiĝante sian tutan seksan povon ene de la geedza stato, vivas konsekriĝon. Se ne estus tiel, geedziĝi estus peko.

Kiu edziĝas, konsekras sian seksecon al la geedza kaj al la generopova amo, kaj en ĉi tio edziĝinto estas bildo de la komuneco de la Dio Unuo-Triunuo.

Bona priseksa edukado devas ĉiam esti antaŭata, akompanata kaj sekvata de daŭra kaj akurata *edukado* al la amo.

Sen-ama seksemo estas terura devojiĝo. Ĉiun tagon sub niaj okuloj prezentiĝas epizodoj de perforto aŭ de seksa perversio, aŭ de forfuĝo al la drogo: temas pri forvojiĝoj, kiuj ofte originas pro erara interpreto de la sekseco.

Seksemo estas instinkto, kiu en la malsuperaj animaloj estas gvidanto saĝa kaj longevida. En la homo ĝi estas konfidita al sento, al racieco kaj al libereco, kiu estas konstitu-rilate bone orientigita kaj bone orientiganta.

Laŭ la biologia vidpunkto, seksemo estas per si mem nek bona nek malbona. Sed etike, orientigenda ĝi estas al la amo, ĝi estas edukenda laŭ la senco de la sinofero. Kreinte nin liberaj, ĉi tiun vojon Dio al ni malfermis.

EDUKI DO AL LA AMO

Tiuj junuloj (kaj iliaj gepatroj), kiuj opinias, ke je ia aĝo bone estas havi priseksajn spertojn kaj, ke nur poste oni lernas vere ami, faras seriozan eraron, ĉar ili radikale renversas la celojn kaj la leĝojn de la kreado.

La sekso devas ĉiam esti gvidata de la amo, kaj ne devas okazi la kontraŭo: ke la amo estas gvidata de la sekso. Hipoteze al vivo perfekta, junulo kaj junulino devas antaŭe lerni ami en maniero profunda, perfekta kaj malprofitema; kaj nur kiam ili scios, pro sperto kiu venos el maturiĝo, kio estas amo kaj kion signifas ami (sed ili ne pensu, ke estas facile tion lerni), nur tiam ili kapablos decidi, kiamaniere ili orientigos tian amon dum sia vivo: aŭ en la geedziĝo aŭ en alia formo de konsekriĝo, aŭ en unu profesio aŭ en alia, aŭ kun tiu homo aŭ kun alia...

SEKSA SILENTO KAJ NASKIĜ-REGULADO

Ni prikonsideru nun la problemon de la respondeca patreco kaj - dualoke - de la utiligo de artefaritaj rimedoj - aŭ de la laŭnaturaj metodoj - en la regulado de la naskiĝoj.

Unu el la aspektoj de la problemo - tiu rilatanta la malfermon de la geedzeco al la filoj, sen timoj kaj egoismoj - estis jam de ni alfrontita parolante pri la malriĉeco laŭevangelia. Ĉi tie, anstataŭe, ni parolos pri la konduto de la geedzoj, kiam, pro pravaj kialoj, ili opinias, ke ili ne devas - almenaŭ dum iu periodo - pensi al nova naskiĝo.

En *Humanae vitae* Paŭlo VI, treege klare, subtenadis la moralan nelicecon de la artefaritaj kontraŭkoncipiloj, dum kontraŭe li legitimis la *periodan abstinon*, kiel respektomontran formon de la digno de la homo kaj de la ordo de la kreitaro.

En la praktiko, ne ĉiam la sacerdotoj, dum la konfesopreno aŭ en la spirita gvidado, povas malfermi klaran diskuton pri ĉi tiu temo, pro la stato de nescio (pri la fido) aŭ de spirita malforteco, aŭ pro objektiva graveco de la geedza situacio de la pentofaranto aŭ de la pentofarantino, kiu alproksimiĝas por doni sian konfeson.

Estas tamen klare dirende, ke *Humanae vitae* vere savis la perfektecon kaj la riĉecon de la geedza konsekriĝo kaj de la Dia plano pri la geedzeco.

La kuniĝo de la geedzoj havas sian propran formon kaj sian propran kuntekston, kiuj ne povas esti malobservataj. Ne temas nur pri materiaj elementoj, sed pri kreskado kaj pri am-esprimiĝo, kio ne povas esti humiligita pro artefaritaj elementoj, al kiu ajn tipo tiuj apartenas.

La geedzoj samopinias agnoskante, ke objektive korekta kaj perfekta kuniĝo estas ankaŭ la plej kontentiga kaj komforta.

Ĉi kuniĝo ne estas ia speco de distriĝo aŭ de amuzo, kiun la bona Dio permesas al siaj filoj por ilin deturni de la laciĝoj kaj de la zorgoj de la vivo.

La kuniĝo, ankaŭ se plivigligata kaj akompanata de fortaj sentesprimoj, kiuj portas ĝuon, havas ian propran sakramentan - kaj - sekve - sakralan celon, *kaj ĝi estas, kiel tia, serĉota.*

"Amori" estas mirinda fonto de ĝuo, *sed neniam ĝi estas spaco aŭ kialo de nerespondeco!*

Sindeteno de la geedza kuniĝo en pluraj okazoj, povas esti vere helpa por la paro, kompreneble, se temas pri geedzoj, kiuj taksas la geedziĝon ama donaco, kiun ili devas

kreskigi laŭ la spirito de la konsekriĝo kaj de la interligo.

Dumperioda paŭzo (kiun ni povas nomi *seksa silento*) helpas pli bone konsekriĝi kaj trovi pli poste, en la kuniĝo, pli grandan kapablon de amo kaj de generopovo.

La seksa aktiveco, fakte, havas siajn ritmojn laŭnaturajn, dum la amo estas daŭra povo, malfermita al la donaco.

La priatento al la ritmoj de la fekundeco perfekte eniras en la planon de la Kreanto, kiu ja volis, ke ĉio dum la vivo havu ian ritmon, ian kadencon, paŭzojn, atendo-momentojn.

Estas tasko de la scienco pliprofundigi la konon kaj la kontrolon de ĉi tiuj ritmoj kaj de la konsekvenca fekundebloco de la edzino.

Estas tasko de la geedzoj kapabli utiligi kun inteligento kaj kun fideleco ĉi tiujn regulojn, kiuj enskribitaj estas en la naturo mem de la homa specio.

Estas devo de la edukantoj kaj de la paŝtistoj malfermi al la gefianĉoj kaj al la geedzoj ĉi tiujn horizontojn, kiuj savas la vivon kaj stimulas la amon.

La eklezia instruo estas klarigota kaj ilustrata en maniero, ke la gefianĉoj kaj la geedzoj, de ĝi malkovru la raciecon kaj la bonecon.

SED LA VERA AMO RESENDAS AL LA KREDO

Konklude, ĉio devas naskiĝi de la amo kaj ĉio devas porti al la amo; kaj ĉio - por la kristanoj - devas kreski kaj maturiĝi en etoso de kredo profunda.

El tio supre dirita, jen la neceso, ke la geedza vivo ricevu subtenon de intensa preĝo kaj de partopreno en la sakramentoj: konfeso kaj komunio.

Ne utilas paroli pri geedza ĉasteco kaj pri perioda abstino al geedzaj paroj, kiuj vivas ege malriĉan kred-ateston, kiuj sin apogas sur konvinkoj supraĵaj kaj necertaj, kiuj havas vivokutimojn sufiĉe sensplezurajn kaj acelantajn nur ĝuadon.

Rekomencante ami Dion el tuta koro, fervore preĝadi, sin konfesi pri la pekoj de leĝereco kaj de malĉasteco, oni denove aprezos la purecon de la ĉasteco ankaŭ en la geedziĝa vivo.

Ĉasta amo povas atingi la celon de la oraj kaj de la diamantaj nuptaj jubileoj laŭ daŭraj malkovroj ĝojaj, de kontentiĝo, de interna paco, kiujn la ĉampionoj de la amo facila eĉ ne kapablas imagi.

Ĉio, do, revenigas al la amo, ĉio revenigas al la kor-pureco. Nur la kor-pureco estas vera generanto de amo.

8. - Malsato je dio

Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos. (Mat. 5, 6)

En la sinsekvo de feliĉegoj, pri kiuj al ni raportas Sankta Mateo, tiu pri "malsato kaj soifo de justeco", kutime estas interpretata laŭ la tuj-perceptata sento, kiun ni donas al ĉiuj vortoj: Jesuo nomas feliĉaj tiujn, kiuj volas ĉiurimede, ke justeco regu sur la tero. Sed, pri kia justeco parolas la Sinjoro?

En la lingvaĵo de la Sankta Skribo, la termino *justeco* estas unue atribuita al Dio, kaj estas sinonimo de la termino sankteco. Dio estas la senlime justa, la senlime sankta, tiu, kiu transdonas sian justecon-sanktecon al la homoj, allogante ilin al lia perfekteco mem.

Kiam, en sia Evangelio, Mateo diras al ni, ke Jozefo estis "homo justa", tio signifas, ke li tutkore klopodis obei al Dio kaj agi laŭ Ties volo: li "malsatis kaj soifis la justecon de Dio". Ĉi feliĉego substrekas do la grandegan gravecon, kiu venas al ĉiu homo, kiu sin metas en staton de justeco-rilato kun Dio; kaj ĉi rilato kun Dio estas precipe rilato de malsato kaj de soifo.

Jesuo ne petas, ke ĉiu el ni havu en la kapo precizan difinon de Dio, ke ni sciu parkere la respondon de la katekismo, kiu instruas al ni, ke Dio "estas perfektega Estaĵo, kreanto de la ĉielo kaj de la tero".

Scii tion estas ja utile kaj bele, ni eĉ povas diri, ke tion scii estas necese. Sed io estas, kio eĉ pli multe interesas al Jesuo, kaj temas pri tio: ke ĉiu el liaj disĉiploj "malsatu kaj soifu je Dio", Tiun tutkore serĉadu, tiun serĉadu per la tuta forto de ilia deziro, per la tuta ardo, de iu, kiu serĉas trezoron.

Ĉi tio validas ĉefe hodiaŭ, ĉar multe da homoj sin metas antaŭ Dio kun ekstrema indiferenteco; ne ekzistas nur tiuj, kiuj neas Dion, sed pli multenombraj estas tiuj, kiuj pluan paŝon faras, la lastan: ili montras *absolutan indiferentecon* pri la problemo de Dio!

Multaj tiomnivele estas elsatiĝintaj de bonaĵoj surteraj, ke ili estas malpleniĝintaj rilate kiun ajn penson, aŭ emon aŭ intereson, kiu ilin levu al io pli supera, al io transcenda: pli precize, al Dio.

Kaj estante indiferentaj rilate Dion-Personon, ili fariĝas indiferentaj ankaŭ rilate tiujn absolutajn valorojn - t.e. vero, justeco, bono... - sen kiuj neniu sukcesas maturiĝi sian homan personecon, kaj manke de kiuj estas preskaŭ neeble organizadi indan kunvivadon surteran.

Malsato kaj soifo je justeco estas konsekvence rekteco de animo kaj de koro, kaj tio ne devas esti taksata kiel nura natura honesteco, sed kiel deziro unuiĝi kun Dio, kiel volo

identiĝi kun Jesuo Kristo, en Ties perfekta konsento je la volo de la Patro.

"Fari la volon de Dio"

Dio volas nur nian bonon kaj nian feliĉon, kaj tion Li volas kun decidiĝo absoluta, laŭ ĉiopova volo... sed, kio estas nia vera bono?

La Sinjoro donas al ni koron kaj menson cele, ke ni lernu *"kio estas la bona kaj aprobinda kaj perfekta volo de Dio."* (Rm 12,2).

Ofte, tamen, ni ne sukcesas deĉifri tian volon, ĉar ĝin ni ne amas.

Ni estas tro malsatemaj kaj soifemaj je nia volo, ni estas fermitaj ene de niaj horizontoj, ni estas entiriĝintaj sur niaj interesoj, kaj ni ne kapablas pli alten vidi, pli vasten, pli "supren rilate nin". La volo de Dio reeĥas al ni fore, ekstere de niaj interesoj, kelkfoje nekomprenebla kaj eĉ absurda.

Por kompreni kaj legi la volon de Dio, estas necese enhavi samtempe animan grandon (*magnanimitas* de la latinoj) kaj kor-humilon. Ĉar

*Dio kontraŭstaras al la fieruloj,
sed al la humiluloj Li donas gracon".* (Jak. 4, 6)

En familio la filoj lernas sufiĉe frue malkovri, kia estas la profunda orientiĝo de la koro de la gepatroj:

- se la gepatroj vere serĉas Dion, ili submetiĝas kun amo kaj dankemo al Lia bonintenca volo,
- se, kontraŭe, ili serĉas sian propran volon, al Dio ili montras respekton precipe eksteran, reziĝeman kaj supraĵan, formalan.

En malmultaj familioj la filoj vidas, ke la gepatroj estas cedemaj kaj serene disponeblaj je la Dia volo. Oni eĉ devas sin pridemandi: kiam, en iu familio, oni parolas pri ĉi tia dia volo?

Kaj kiam tio okazas, laŭ kiuj kondiĉoj, laŭ kiaj tonoj oni pri tio parolas? La filoj, kiamaniere vidas, ke la gepatroj sin konformiĝas, samlimiĝas kun tia volo ĝis la punkto, ke ili faras ĝin sia?

Kaj kiamaniere edzo kaj edzino sin reciproke helpas por malkovri la dian volon kaj por ĝin realigi? Ĉu ili kapablas foroferi sin mem kaj submeti siajn proprajn volojn, siajn proprajn emojn, je la supera kaj pli saĝa volo de la Sinjoro?

Temas pri simplaj, sed malkvietigaj demandoj. Oni povas diri, sen timo de eraro, ke preskaŭ la tutan aron da ĉagrenoj, kiuj nin angorigas, ni mem al ni akiras, pro tio, ke ni antaŭmetas nian volon al la volo de Dio: ni ne kapablas ami kaj konformiĝi al tiu volo de amo.

La kuraco-domoj gastas multajn homojn, kiuj ja ne bezonas medikamentojn, trankviligilojn - terapioj, kiuj kun la paso de la tempo malfortikigas - sed fidoplenan sinforlason al la sankta volo de Dio (Kiu volas ĉiam kaj nur, kaj nepre nian veran bonon).

Travivante la sinforlason al Dio, ĉi tiuj homoj povas facile neniigi angorojn, maltrankvilaĵojn, kiuj originas de la daŭra emo postkuri sian propran volon kaj siajn proprajn planojn.

LA TERAPIO DE LA PREĜO.

Preĝo estas la ideala itinero por tiu, kiu malsatas kaj soifas je la justeco de Dio kaj je ties sankta volo. Jesuo efektive diris:

*"Ne ĉiu, kiu diras al mi: "Sinjoro, Sinjoro!"
eniros en la regnon de la ĉielo;
sed tiu, kiu plenumas la volon de mia Patro,
Kiu estas en la ĉielo."
(Mat. 7, 21)*

Jesuo, pere de lia ekzemplo kaj de liaj instruoj ofertis al ni modelon de preĝo, kiu bedaŭrinde tiom multe malĉeestas en niaj kutimoj, kaj kiu estas malsama rilate tion, kion ni lernis.

Jesuo al ni instruis, ke preĝado estas kiel daŭra spirado de la animo: ni devas ĉiam preĝadi, sen ia ajn momento de laciĝo; nome, ni devas konsideri preĝadon, kiel kutiman sintenon de fidoplena ripozo en la Sinjoro (ankaŭ se kelkfoje preĝi estas preskaŭ luktadi kun Dio, kiel faris Abrahamo, Jakobo, Moseo, Jesuo en Getsemano...).

Kiel la koroj de paĉjo kaj de panjo ĉiam donas atenton al la filoj, kiel la penso de la edzino ĉiam adresita estas al la edzo, tiel la koro de la filo de Dio estas kutime orientita al la "Patro, Kiu estas en la ĉielo" (kaj la Sankta Spirito estas tiu, kiu ĝin tiel orientigas).

La interrilato gefiloj-Patro estas ja la fundamento de la kristana preĝo. Kaj estas ankoraŭfoje la Sankta Spirito, tiu, kiu ĝustoplenigas ĉi dialogon.

Jesuo al ni instruis ankaŭ, ke, antaŭ ĉio, ni petu de Dio la gravaĵojn: ke Lia regno venu, ke la homoj amu unu la alian, kiel veraj fratoj, ke al ni estu donita la pardono de niaj pekoj, ke ni estu pretaj akcepti Lian volon...

Jesuo ankaŭ garantiadis, ke la aferoj duarangaj al ni estos donitaj kiel superfluaĵo, kaj, ke ni ne devas pri ili tro multe zorgi.

Li krome nin certigis, ke - se ni preĝos kun fido, t.e. kun en-kora konvinko, ni estos kontentigitaj - nia preĝo certe estos elaŭskultita.

Kial? Ĉar al filo, kiu panon petas, nenia patro donus ŝtonon; al filo, kiu fiŝon petas, neniun patro donus serpenton.

*"Se vi do, estante malbonaj,
scias doni bonajn donacojn al viaj infanoj,
des pli via Patro ĉiela
donos la Sanktan Spiriton
al tiuj, kiuj petos al Li."
(Lk 11, 13)*

"Doni la Sanktan Spiriton"; Dio al ni donas sian Spiriton mem, sian propran vivon de amo,

se tion de Li ni petas.

Sed, plue, Jesuo postulas ion tre gravan, de nia preĝo: ke antaŭ preĝi ni *repaciĝu kun la proksimulo* kun kiu ni estas en kontrasto; ĉar, se ni ne amas nin reciproke, kiel fratojn, ni nin senigas je nia digno de "filoj de Dio"; la Patro de la ĉieloj ne plu vidas en ni la vizaĝon de filo; li volas, ke ni sciu *kununuigi kaj esti en akordo*, en la preĝo; preĝi solaj estas kiel eliri el la familio; pro tio la Eklezio nin invitas kunveni dimanĉe por preĝi: ĉar ni estas "la familio de Jesuo".

La preĝon la plej belan Jesuo al ni instruis, kiam dum tri horoj de terura agoniado, li diris al la Patro:

*"Patro, se Vi volas, formetu de mi
ĉi tiun (doloran) kalikon;
tamen, plenumiĝu ne mia volo,
sed Via!"*
(Lk 22, 42)

Laŭ ĉi premisoj, klare konturiĝas, kiom grava estas *la preĝo en la familio*. Ĉiu devas kapabli preĝi sola, sed antaŭ Dio grandegan valoron havas *la preĝo unuanima* de du geedzoj, kaj ankaŭ akiras apartan grandon la preĝo de gepatroj kaj de gefiloj, kiuj kune konkludas la tagon.

Estas ĝenerale malfacile konvinki du geedzojn kune preĝi. Oni devus komenci jam ekde la tempo de la fianĉiĝo; sed "neniam estas tro malfrue". Pro tio, oni devas trovi la kuraĝon por provi tion fari.

Oni povas komenci de la kuna legado de unu el la paĝoj de la Evangelio, aŭ de iu konversacio pri iu pri-kreda problemo; estas poste facile sin turni al la Sinjoro por danki, por pardonpeti, por peti helpon, prilumigon, pri ia prenota decidiĝo.

Preĝi enfamilie povas konkretiĝi pere de la recitado de la tradiciaj formuloj; sed tion oni povas fari ankaŭ pere de spontaneaj frazoj, kiujn ĉiu, simple, esprimas, laŭ la maniero, kiun li konas. Ĉi-okaze, pli spontaneaj estas infanoj ol plenaĝuloj: ili ne hontas elmontri siajn sentojn. Sed la familia etoso devas ebligi ĉi spontanee preĝon.

Kiam oni iom progresis, oni povas ankaŭ preĝi kun la helpo de la psalmaro aŭ de aliaj libroj el la Biblio. La Evangelio ĉiam estas la unua, ankaŭ por preĝi.

La preĝo de la rozario, se oni limigas ĝin al peza kaj meĥanika ripetado de "*Avemaria*", certe rifuzata estas: kaj prave. Sed kiam oni havas la trankvilon por malrapide prononci *Pater* kaj la dekon da *Ave* kaj kun la menso kaj kun la koro, kiuj metas sian atenton al ia ago de la vivo de Jesuo, aŭ kun la penso kaj la amemo, kiuj sin turnas al Jesuo aŭ al la Virgulino, tiam ĝi fariĝas preĝo mirinda: kaj Dio ŝatas ĝin, kiel kiu ajn patrino ne kapablas ne ebriiĝi je la unuaj parolsonoj de sia propra infano.

La preĝo al ni komprenigas, ke *nur se ni iĝas etaj, kiel infanoj, ni eniros la regnon de la ĉieloj!*

9. - La kompatemo

Feliĉaj estas la kompatemaj, ĉar ili ricevos kompton. (Mat. 5, 7)

Kompatemo estas temo, kiu ofte ripetiĝas en la paĝoj de la Evangelio. Jesuo ne nur diras feliĉaj estas la kompatemuloj, sed Li petas de ni, ke *"ni estu kompatemaj, kiel la Patro estas kompatema"*.

En la Evangelio enestas parabolo, kiun la Sinjoro aparte dediĉas al la dia kompatemo kaj al la homa kompatemo: temas pri la parabolo de la servisto, kiu, ricevinte plenan punnuligon de sia mastro (dek mil talantojn, sumo kaptturniga), ne kapablas punliberigi je etaj ŝuldoj unu el siaj kolegoj.

Jesuo estas ege severa, kiam temas pri kompatemo; li fiksas kiel kondiĉon, por ricevi la pardonon de Dio, ke ni kapablu pardoni unuj al la aliaj. Eĉ ne niaj preĝoj kaj niaj oferoj akceptataj estas de la Patro, se tiu, kiu ilin proponas antaŭe ne repaciĝis kun sia propra frato.

Jesuo enŝovas la kondiĉon de la kompatemo en la internon mem de la fundamenta preĝo de la filoj de Dio:

*"Vi do preĝu jene:
Patro nia, kiu estas la en la ĉielo...
Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj..."*
(Mt 6, 9-13)

La kialo de ĉi tia severo de Jesuo rilate la kompatemon estas serĉenda en la koro mem de Dio.

Dio - Patro, Filo kaj Spirito - estas en si mem, konstitucie, kompatema! Kompatemo estas la vivo de Dio, Lia ekzisto-kialo, ĝi estas la videbla vizaĝo de Dio kreanto. Kaj krome, de Jesuo Kristo, kiu savas.

La tri paraboloj al ni rakontataj de Luko en la 15.a ĉapitro de lia Evangelio, estas simbolaj. La unuaj du (la forperdiĝinta ŝafido kaj la perdita monero) enlumigas Dian sintenadon, kiu por ni estas nekutima kaj ekestigas miron: Dio *iras serĉadi* tiun, kiu perdiĝis.

La sama temo ripetiĝos ankoraŭ en Luko (19,9-10) koncerne la konvertiĝon de Zakheo. Je la fino de la festeno, Jesuo tiun konvertiĝon komentarias dirante:

*"Hodiaŭ venis savo al ĉi tiu domo,
ĉar li ankaŭ estas filo de Abrahamo.
Ĉar la Filo de homo venis,
por servi kaj savi la perditajon."*

En la tria parabolo - la plej konata -, tiu de la perdiĝinta kaj retrovita filo, la patro ne iras serĉi la filon, kiu forlasis la domon; kontraŭe, li eĉ ne oponas kiam la filo eldiras la intencon iri for.

Ĉi filo, fakte, estas pli multe ol monereto, aŭ ŝafido: li havas inteligenton kaj koron homajn kaj kapablas memoriĝi pri la varmeco de la patra amo; paĉjo scias, ke li revenos.

Sed la sama paĉjo lasas meze la feston por la reveno de la pli juna filo, por eliri el la vilao kaj konvinki la pli aĝan filon hejmenreveni por festi la "retrovitan kaj resurektintan" fraton. La patro ne povas toleri, ke je lia kompatemo ne respondu ankaŭ la kompatemo de la pli aĝa filo.

Misteroj de la homa koro.

Jesuo bazigas la kredeblecon de sia misio, de sia enkarniĝo-pasiono-resurekto, sur la kompatemo.

"Dio tiel amis la mondon

- jen la origina kompatemo:

la koro de la Patro! -

ke Li donis Sian solenaskitan Filon,

por ke ĉiu, kiu fidas al li,

ne pereu,

sed havu eternan vivon.

(Joh. 3,16)

Sed je ĉi tiu punkto ni devas mediti pri la vera signifo, pri la enhavo de la kompatemo. Pri kio temas? Ĉu ĝi estas simpla indulgemo? Ĉu ĝi estas io, kio venas post la justeco, ia speco de donaco aŭ de premio? Kaj kion provokas, aŭ devus provoki la kompatemo en la homa koro?

Oni devas senmitigi iajn distorditajn ideojn, kiuj preskaŭ fariĝis komuna opinio de la homaro.

Vere ne estas, ke unue venas justeco kaj poste kompatemo, kvazaŭ escepto, kvazaŭ malobeo al la regulo, kvazaŭ ia pardono: konklude, kvazaŭ io, kio haltigas la ir-itinon de la justeco.

Imagi justecon kiel senemocian kalkulon prikompetentecan, kaj pardonemon kiel bonvolan rompon de la rigidaj rilatoj inter kredito kaj ŝuldo, signifas enfermi Dion en la malvastaj dimensioj de la homa prikalkulo.

Justeco estas la brilego, estas la pleneco de la vero de Dio, kiu venas por loĝi en la homa koro. Homo justa estas tiu, kiu kapablas surmeti kiel veston la justecon-sanktecon de Dio.

Ĉi tia justeco ne rolas improvize per si mem, ĝi naskiĝas nur el koro, kiu amas senlime: el koro, kiu estas kompatema.

Justaj gepatroj ne estas tiuj, kiuj sen ia fleksebleco disdividas en egalajn partojn inter la filoj, sed tiuj, kiuj sindoneme kaj lojale amante ĉiujn kaj la unuopulon inter la filoj, kapablas egaligi, altaŭgigi la donacojn laŭ la bezonoj kaj la kapablo de ĉiu. *Nur la kompatemaj gepatroj scias ĝuste konduki al la filoj.*

Tial, Dio estas justa, ĉar Li estas kompatema. Kaj Li estas kompatema, ĉar Li estas sankteco kaj justeco.

Ni pli bone komprenas ĉi aserton, se ni pensas pri tio, kion realiĝas - en tiu, kiu ĝin ricevas - la kompatemo. Ne temas pri simpla indulgemo: la kompatemulo ne havas limon en la punsuspendo aŭ, se eblas, en la nuligo de kulpo.

Kulpo povas ja esti pardonita, nur kiam la kulpulo ŝanĝas la sintenon de sia koro, "li havas koron novan" (Jez. 36, 26).

Kompatemo, konsekvence, estas la dia ago pere de kiu la Patro pardonas al ni ŝanĝante nian koron. *Ŝanĝi la koron al la homo* estas dia ago, estas preskaŭ kiel nova kreado.

Kiam ni limigas je la konsento pri amnestio, kiam ni estas nur indulgemaj, ni konkrete deprenas la punon, lasante la kulpon, nome lasante la kulpulon en ties peko!

Se ni volas esti kompatemaj kiel Dio (preskaŭ kun-kreantoj kun Li!), ni devas helpi la koron de nia frato, cele, ke tiu malfermiĝu al pripento, al konvertiĝo.

Kompatemaj gepatroj ne facile pardonas, sed ili provas, utiligante la grandan forton de la amo, ŝanĝi, preskaŭ refari la koron de la filoj.

... Sed la supredirita valoras ankaŭ por la rilatoj inter edzo kaj ties edzino...

FAMILIO, LERNEJO DE KOMPATEMO

La familio estas la vera hejmo de la kompatemo, la ideala loko por tiun lerni: hejmo kaj kompatemo-lernejo.

La unua prizorgo de la geedzoj antaŭe, kaj pli poste de la gepatroj, estas kune sperti la ricevitan kompatemon.

Nun ni zorgas preskaŭ nur defende al la personaj rajtoj. Ĉiuj havas rajton al domo, ĉiuj havas rajton al instruado, ĉiuj havas rajton al laboro, al kuracista asistado, al informado, al jura kuratoreco, ĉiuj rajtas... ĉiuj rajtas...

Kaj tio estas bona, sed ĉi tia troigo de la rajto - en la senco, ke se oni parolas ĉiam kaj nur pri rajtoj oni kaŝas aliajn facetojn de la realo - kunportas la forigon de ĉio, kion iu povas fari kiel bonaĵon, spontanee, senkompanse, nur pro boneco.

Ne nur, sed, *kiu konkeris por si la rajtojn?* Ĉiuj ĉi rajtoj proklamitaj estas, ni posedas ilin ekde la naskiĝo, eĉ kelkaj (ni pensu ekzemple pri la rajto al la vivo) ekde la koncipiĝo. Ĉu ni ilin akiris, aŭ ili venas al ni de la alto?

Niaj rajtoj estas *antaŭ ĉio donacoj*, donacoj, *kiujn neniu per si mem meritis!* Ili estas donacoj de la Dia kompatemo.

Meti la tutan ekzistadon sub la lumon de ricevita kompatemo: jen estas la unua paŝo por rekta antaŭ-planado de la vivo.

Konstitucie ni estas *gracricevintoj* kaj ni bezonas, ekde la naskiĝo ĝis nia morto, aldanki plurfoje ĉiun tagon: unue ni devas danki la bonan Dion, kaj poste la proksimulon: gepatroj, instruistoj, kuracistoj, industriistoj, negocistoj, manlaboristoj, profesiuloj, ni ĉiuj ĉiujn bezonas....

Nur konsciante, ke ni ricevis kompatemon, ni povas starigi homan kunvivadon. La infanoj devas kompreni - konkrete ili tion komprenas, la malbona afero estas, ke pli poste, kreskinte, ili tion forgesas - ke ili ĉion ricevis.

Malgraŭ la vertiĝodonaj progresoj de la scienco kaj de la tekniko, iaj realaĵoj ĉiam estas al ni donitaj kaj ne dependas de ni: kaj komence de la vivo.

Kiu *donis al si la vivon*? Kiu *elektis por si la gepatrojn*? Kiu *elektis por si la filojn*?

La problemo de la artefarita ensemigo kaj de la genetikaj manipuladoj ne nur havas etikan flankon; ĝi havas ankaŭ gravecon kaj rimarkindecon kulture, ĉar ĝi montras rifuzon de la ekzistado kiel *donitaĵon*. Tio, kio donita estas neniam povas esti alprenita kaj manipulita. Jen estas la kialo de ĝia ne-liceo.

Ne estas ĉiam facile esti kompatemaj, ne nur en la senco tuja, nome, esti kapablaj pardoni, sed ankaŭ laŭ pli profunda senco: pasie deziri la plikreskon de la alia:

"Mi volas, ke vi ĉeestu.

Mi volas, ke vi bone fartu.

Mi volas, ke vi havu la plej bonajn ecojn.

Mi volas por vi ĉion bonan..."

Ĉi tia "mi volas" ne elvenas el koro, kiu kapablas nur postuli: temas pri *ama volo*. Tion mi volas, ĉar mi vin amas!

Kaj tion mi ne *postulas*. Eventuale, mi disdividiĝas kvaropen por helpi vin tion atingi...

Enamiĝintaj esti unu de la alia signifas simple ĉi tion: "mi, por via bono, preta estas fordoni mian vivon; kaj se vi ne estas sufiĉe bona, mi ne riproĉas tiom multe vin, sed pli multe min, kiu ne kapablis vin ami tiom bone por plibonigi vin." Oni ja rimarkas la diferencon!

Ĉi tio ne validas nur por la geedzoj, ĝi validas ankaŭ kun la filoj, kaj en la inter-filaj rilatoj, tre multe ami unu la alian, tiamaniere, ke ĉiu sentu esti sia devo sin meti je la servo de la homa kaj kristana kresko de la aliaj.

En ĉi tiu maniero riproĉo kaj puno havas ian kialon, sed interne de la fidemo-rilato, de rilato de amo, de ia sincera kaj sindona pliboniĝo; neniam devas ekzisti puncela-puno, venĝo-puno, ĉiam la puno devas esti instiga, fidiga, subtena.

LA SAKRAMENTO DE LA KOMPATEMO.

Spontanee estas por ni, ĉi-okaze, rilati al tiu mirinda sakramento de la eklezio, kiu iam estis nomata *konfeso* kaj hodiaŭ estas pli korekte nomata "repaciĝo".

Ĉi sakramento estis laŭgrade malriĉigata, iomete je la vidpunkto de la doktrino kaj ege pli multe laŭ la kutimo, kaj pro tio hodiaŭ ĝi estas facillanime forlasata kaj - en la okazoj kiam oni ĝin aliras, ĝi estas nur supraĵe komprenata.

Unu el la kialoj, la plej gravaj de tioma dekadenco estas la preskaŭ absoluta malapero de la koncepto kaj de la sperto pri la indulgemo.

En la familioj, en kiuj oni vivas en ia etoso de kompatato, la sakramento de la konfeso trovas ian spacon. Oni pardonas fratojn kaj fratinojn, edzon kaj edzinon, gepatrojn kaj gefilojn.

De ĉi tio ĝis la sakramento de la konfeso ege mallonga estas la paŝo. Patro kaj patrino amigis ĉi sakramenton, laŭ la mezuro laŭ kiu ili estas la unuaj, kiuj ĝin aliras.

Malgajige estas vidi patrinon, kiu portas infanojn al la konfesprenanto, sed kiu ne iras mem

por konfeso; kaj se estas maloftaj la virinoj (plenaĝaj kaj, precipe, junaj plenaĝulinoj), kiuj konfes-diras, oni preskaŭ ne plu vidas virojn apud la konfesejoj.

Ĉi tiajn aferojn la filoj rimarkas, kaj tion ili memoras, por eltiri koherajn konsekvencojn kelkajn jarojn poste: ili ne plu sin konfesos!

Se en la familia medio ĉiun vesperon oni unuope petus la pardonon unu de la alia kaj poste petus la pardonon de la Sinjoro, konkludante per ia profitiga intenco, la problemo de la sinkonfeso fariĝus pli facile solvebla.

Se oni al kutimiĝas je la ĉiutaga momento de la kompatemo, la laŭperioda sinturno al la sakramento fariĝas deziro.

Sinkonfeso estas la sakramento de la fido. La *kulpokomplekso*, kiu tiom multe hodiaŭ disvastiĝis, devojiĝas, ĉar ĝi ne portas al fido sed nur al konscienco-riproĉo; ĝi malapudigas de la konfesejo kaj apudigas al la kurac-restadejoj, al drogo... al sinmortiĝo.

Kreante la taŭgan etoson por la fido, la familio povas esti la realaĵo de kiu komenciĝas la remalkovro de la sakramento de la repaciĝo kaj de ties bonefika fekundeco.

10. - Ekaktivigi la pacon

Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj. (Mat. 5, 9)

La donaco kaj la deziro de paco donas substancon al la tuta evangelia mesaĝo kaj al la vivo de Kristo. Kiam Jesuo naskiĝis, kantis la anĝeloj en la groto de Betlehemo:

*"Gloro al Dio en la supera alto,
Kaj sur la tero paco,
inter homoj Di-favoro.
(Lk 2, 14)*

La donaco de la paco estis la lasta, kiun Jesuo konfidis al siaj apostoloj, antaŭ la Pasiono, kvazaŭa testamento:

*"Pacon mi lasas al vi;
mian pacon mi donas al vi;
ne kiel la mondo donas, mi donas al vi.
Ne maltrankviliĝu via koro, nek senkuraĝiĝu.
(Joh. 14, 27)*

Kaj, krome, la donaco de la paco estis la unua, kiun Jesuo resurektinta proponis al la disĉiploj kunvenintaj en la manĝosalonon la vesperon Paskan:

*"Kiam do estis vespero en tiu sama tago,
la unua de la semajno,
kaj kiam estis fermitaj la pordoj,
kie la disĉiploj estis, pro timo antaŭ la Judoj,
Jesuo venis kaj staris meze de ili,
kaj diris al ili: Paco al vi.
Kaj dirinte tion, li montris al ili siajn manojn,
kaj sian flankon.
La disĉiploj do ĝojis vidante la Sinjoron.
Jesuo denove diris al ili:
Paco al vi; kiel la Patro sendis min,
tiel ankaŭ mi vin sendas."
(Joh. 20, 19-21)*

Nu, paco estas Dia donaco, la donaco de la elaĉeto alportita de Jesuo Kristo: tipa kristana

donaco.

Inter la paco de la homoj kaj la paco de Kristo estas kvalito-salto.

La paco de la homoj preskaŭ ĉiam estas rigardata kiel malĉeestigo de konfliktemo, de juraj konfliktoj. La paco de la homoj estas sufiĉe malfirma, ĉar ligita ĝi estas je la bonvolemo de la unuopuloj, el unu kaj el la kontraŭa parto.

La kristana paco ĉiam estas donaco de la Sinjoro, eĉ se - memkompreneble - nepras la kunlaboro de nia bonvolemo.

Estas nia tasko akcepti la donacon de Jesuo, ne malhelpi - la— planoj, kiuj estas niaj - lian faron de paco.

La paco, kiu venas de la Sinjoro, kuŝigita estas en la koro de la kredanto, kiel disponeblo akcepti la interrilaton paco-unueco, kiu inter ili kunigas la tri Personojn en la sino de Dio Triunuo-Unuo.

La kristana paco estas vera kaj konkreta partopreno en la vivo de Dio, kaj tial la mondo ne povas ĝin doni. Ĝin ĝi povas *ricevi* - pere de la kredo - sed ĝin ĝi ne povas *doni*.

Ĉi tia paco igas nian koron disponebla por la "bona" volo de la Sinjoro.

La "bona volo" - kiun kantadis la anĝeloj en Betlehemo kaj estas ligita je la anonco de paco - estas antaŭ ĉio la bona volo de Dio, nome Ties komplezo al ni doni la pacon.

Venante en la mondon, Dio ne trovis la pacon, sed ĝin alportis.

La homa koro, ekokupita kaj posedata de la paco de la Sinjoro, iĝas ilo por disvastigi ĉi tian pacon en la koron de la gefratoj.

La paco de Kristo povas esti kontaĝe transdonata de koro al koro; ĉiu kristano, kiu lasas, ke la paco lin posedu, iĝas "aganto porpaca", peranto de la donaco de Dio al la homoj.

La kristano posedata de la paco havas la taskon komuniki, transdoni la pacon, kiun li posedas, ĝin anoncante; kiel faris la anĝeloj en Betlehemo kaj Jesuo resurektinta, en la ĉambro de la lasta manĝo.

Ne estas io signifanta, anonci la pacon.

Pacon ne povas anonci tiu, kiu je paco ne vivas. Esti anoncantoj de paco signifas, ke oni akceptis ĉi pacon en sian propran koron, kaj, ke oni direktis al ĝi siajn proprajn sentojn.

Ŝajnas do neebla entrepreno disvastigi kaj agigi ĉi tiun pacon, se tio ne dependas de Tiu, Kiu ĝin donas al ni, Kiu ankaŭ igas nin kapablaj je kontaĝa interproksimula komunikiĝo.

Pro tio, Jesuo, diras, ke estas feliĉaj la agantoj por la paco, ĉar ili ne atingis tiun per siaj propraj fortoj, sed pere de Lia graco kaj mizerikordo.

LA FAMILIO MALFERMIĜAS JE LA DONACO DE LA PACO

En kredanta familio, la feliĉego de la paco estas parto de la valora trezoro, kiun ĉiu portas en si mem ekde la bapto kaj - por geedzoj kaj gepatroj - ekde la sakramento de la geedziĝo.

Sed, sen la kredo, la kristana paco povas esti nek komprenata nek dezirata.

Por fruktigi ĉi donacon de la paco, antaŭ ĉio la familio devas malfermiĝi je la donaco de la fido, devas akcepti, ke Jesuo estu la Majstro, la Vojo, la Vero, la Vivo.

Kelkfoje sufiĉas, ke unu el la membroj de la familio - eble la patro aŭ la patrino, aŭ unu el la filoj - vivadu en ĉi tia paco, por ke ĝi disvastiĝu inter la familianojn. Kutime, estas al virino (edzino, aŭ patrino, aŭ filino), ke la Sinjoro konfidas la feliĉegon "agadi por la paco".

Ĉi paco - donaco de la Sinjoro - estas la unua edukodona koeficiento. Eĉ la plej bonaj pedagogiaj intervenoj falas en la nenion, se en familio ne estas paco; kontraŭe, ankaŭ la minimumaj pedagogiaj konoj de iu patro aŭ de iu patrino malmulte kleriĝintaj estas ja sufiĉaj por bone kreskigi la filojn... sub la kondiĉo, ke la enhejmaj interrilatoj inspiritaj estu de la vera paco de Jesuo.

RE-ENMETADO DE LA PACO EN LA FAMILION

... Kaj kiam kompromitiĝis la paco, oni tamen povas agadi por repaciĝo. Estas kiel reveni al la fonto, kaj la fonto estas la amo de paĉjo kaj de panjo, kiu ekstarigis la familion.

La graco de la repaciĝo elliberigas pro la forto kohera, kiun la tri diaj Personoj praktikas unu sur la aliajn en la interligiĝo de la sanktega Unueco.

La voko de tiu amo ebligas la volon superi la malsamaĵojn kaj alvoki la pacon.

Jes, *alvoki*, ĉar en tiuj momentoj la kutima bonvolemo de la homoj ne estas sufiĉa, oni bezonas apartan helpon, kiun nur Dio povas allasi.

Se en iu familio oni estas al kutimiĝintaj je la kuna preĝo, ne fariĝas malfacile kunveni por peti pacon. Kiam la paco revenas, oni ĝin festas, ĉar la paco estas kaj devas ĉiam esti travivata kiel festo.

La kristanaj komunumoj ne transdonas facile la pacon en la familiojn. La eŭkaristiaj dimanĉaj kunvenoj kelkfoje prezentiĝas kiel ritaj, rutinaj gestoj, ne kiel momentoj de festo kaj de ĝojo en la paco de la Sinjoro. Kaj, sekve, kion hejmen-portas la fideluloj?

La *signo de paco* antaŭ la komunio revokas gravan instruon de Jesuo rilate la repaciĝon interfratan kaj ĝi metas nin en la ĝustan sintenon por ricevi la Sinjoron, kiel la apostoloj okaze de la lasta vespermanĝo, por ricevi la donacon kaj la feliĉegon de la paco.

Hodiaŭ ĉi tiu signo ofte reduktiĝas al kutimo, aŭ fariĝas okazo de malordemo; kelkfoje ĝi transformiĝas al bruema ĥaoso, kiu ĝenas kaj deturnas ĝuste en la momento en kiu la engaĝiĝo cele al la paco devus naski pensojn pri granda respondeco kaj sintenojn de seriozeco profunda.

La asembleoj de la kristanoj povas - se ili estas bone celebrataj kaj travivataj - kontribui je la etoso de paco kaj de repaciĝemo en la familioj; kaj siavice la familioj, kiuj vivas la pacon kaj la repaciĝon, partoprenante je la vivo de la komunumo, tiun pliriĉigas per ĉi dia donaco. Tiamaniere la familio fariĝas signo de repaciĝo meze en la socio, en la hejmoj, en la kvartalo, en la lernolokoj, finfine, en la ĉiutaga vivo.

Ĉi tiu estas la unua, nerezignebla evangelizado. Serenaj kaj pacamantaj koroj povas anonci Jesuon kaj konverti obstinajn korojn ege pli multe ol kleraj disertacioj pri la kredo kaj pri la Evangelio.

*La familio estas la hejmo de la paco,
ĉar ĝi estas la hejmo de la Sinjoro,
ĝi estas Ties eta preĝejo.*

11. - Nekompreneado kaj persekuto

*Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutataj pro justeco,
ĉar ilia estas la regno de la ĉielo. (Mat. 5, 10)*

Ĉi tiu estas, verŝajne, la plej nekomprenebla el la feliĉegoj; ŝajnas ja absurde, ke oni taksu feliĉa tiun, kiu estas kalumniata, mistraktata, kaj mortigita pro la Evangelia vorto kaj pro la fido en Jesuo Kristo.

Ĉio vere restus nekomprenebla kaj absurda, se ni ne havus la ateston mem de la Sinjoro Jesuo, kiu predikadis kaj spertis la malmildecon de la persekutado, silente kaj ame, ĝis la morto, eĉ ĝis la morto perkruce.

*"Se la tritika grenero ne falas en la teron
kaj ne mortas, ĝi restas sola;
sed se ĝi mortas, ĝi donas multe da frukto.
Kiu amas sian vivon, tiu ĝin perdas;
kaj kiu malamas sian vivon en ĉi tiu mondo,
tiu ĝin konservos ĝis eterna vivo."
(Joh. 12, 24-25)*

Sankta Paŭlo reeĥas al li, priskribante la parabolon de la vivo de Kristo: de la gloro al la humiliĝo ĝis la morto, por reeniri poste en la gloron.

*"Kristo Jesuo, ankaŭ estante en la formo de Dio.
ne rigardis kiel ŝatindaĵon
la egalecon kun Dio;
sed sin malpleniĝis
alprenante la formon de sklavo,
fariĝante laŭ la bildo de homoj;
kaj troviĝinte laŭfigure kiel homo,
li sin humiliĝis
kaj fariĝis obeema ĝis morto,
eĉ ĝis la morto per kruco.
Pro tio do Dio tre alte superigis lin,
kaj donis al li nomon,
kiu estas super ĉia nomo,
por ke en la nomo de Jesuo kliniĝu ĉiu genuo,
de enĉieluloj kaj surteruloj kaj subteruloj,
kaj ĉiu lango konfesu,
ke Jesuo Kristo estas Sinjoro,*

al la gloro de Dio, la Patro."
(Fil. 2, 6-11)

Ankoraŭ Sankta Paŭlo estas tiu, kiu priskribas la staton de la disĉiploj de Jesuo, aparte de la apostoloj kaj de la misiistoj, tiuj, kiuj de pli proksime asociiĝas al la misio de Jesuo, kiu finiĝas en la provon, la plej superan, de la amo: per la forofero de la vivo.

*"Ĉar ŝajnas al mi, ke Dio elmetis nin, la apostolojn,
la plej lastajn, kiel mortkondamnitajn;
ĉar ni fariĝis spektaklo al la mondo,
al la anĝeloj kaj al la homoj.
(.....)
Eĉ ĝis la nuna horo ni malsatas
kaj soifas, kaj ni estas nudaj,
kaj ni estas batataj
kaj senhejmaj;
kaj ni penadas, laborante per niaj propraj manoj;
insultate, ni benas;
persekutate, ni eltenas;
kalumniate ni petegas;
ni fariĝas kiel la balaĵo de la mondo.
la forĵetaĵo de ĉio, eĉ ĝis nun.
(1 Kor. 4, 9-13)*

Sankta Paŭlo revenas al ĉi tiu temo en sia Dua letero al la Korintanoj, kiam tamen apud ĉiu sufero la apostolo metas ankaŭ respondon de espero, kiu venas el la alto:

*Ni estas premegataj ĉe ĉiu flanko,
tamen ne enanguligitaj;
embarasataj, sed ne konsternataj;
persekutataj, sed ne forlasataj;
faligataj, sed ne detruataj;
ĉiam portante en la korpo la mortigon de Jesuo,
por ke la vivo ankaŭ de Jesuo elmontriĝu
en nia korpo.
Ĉar ni, la vivantoj,
ĉiam estas submetataj al morto pro Jesuo,
por ke la vivo ankaŭ de Jesuo elmontriĝu
en nia morta karno.
(2 Kor. 4, 8-11)*

La supraj malsamaj citaĵoj ne estas simplaj kejoj. La mesaĝo de la morto, en Jesuo kaj en la Evangelio, estas fundamenta: la tuta elaĉeto farita de Jesuo *devas trapasi tra la morto, por poste sukcesi naski la vivon.*

La feliĉego anoncata de Jesuo - la lasta el la ok prezentitaj de Mateo je la komenco de la

surmonta parolado - ne estas laŭlekta, preskaŭ rezervita al la super-apostoloj aŭ al la plej glorohavaj misiistoj, kiuj trapasis la martiron, *sed ĝi estas feliĉego ordinara, destinita al ĉiuj disĉiploj*, ankaŭ se ĉe malmultaj ĝi atingas la sinoferon la plej superan.

Ĉiuj kristanoj, iam aŭ tiam, *devas trapasi* persekutadon.

Ni kune relegu en ĝia tuto ĉi tiun feliĉegon, kiun Mateo - eble por substreki de ĝi la esencan gravecon - reinsistis prezenti en du postaj asertoj:

*Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco,
ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.*

Feliĉaj estas vi, kiam oni vin riproĉos

kaj persekutos

kaj false

vin kalumnios pro mi.

Ĝoju kaj raviĝu,

ĉar via rekompenco estos granda en la ĉielo;

ĉar tiel oni persekutis la profetojn,

kiuj estis antaŭ vi.

(Mt 5, 10-12)

Tio, ke ĉi feliĉego - la plej heroeca kaj malfacila - estas metita konklude kaj krone en la okopan katalogon, estas iamaniere indiko, ke ĝi enhavas ĉiujn aliajn kaj de tiuj reprezentas la konkludon logikan.

Se iu ne estas submetita je ia formo de persekutado "pro justeco" (tio estas kialo de la fido en Dio kaj en Jesuo Kristo, la Justulo), tiu devas pripensi ĉu li vere observis ĉiujn aliajn feliĉegojn, ĉar tiu, kiu observas la unuajn sep feliĉegojn, iam aŭ tiam, vole nevole, estas persekutata.

*Se la mondo malamas vin,
vi scias, ke ĝi malamis min pli frue ol vin.*

Se vi estus el la mondo,

la mondo amus siajn proprajn;

Sed ĉar vi ne estas el la mondo,

kaj mi elektis vin for de la mondo,

tial la mondo vin malamas.

Memoru la vorton, kiun mi diris al vi:

"Sklavo ne estas pli granda ol lia sinjoro".

Se ili min persekutis,

vin ankaŭ ili persekutos;

se ili observis mian vorton,

ankaŭ vian ili observos.

(Joh. 15, 18-20)

"MI VENIS POR DISIGI PATRON KONTRAŬ PATRINO"

La disdividiĝo, inter kiu estas disĉiplo de Jesuo, kaj kiu lin kontraŭas, tuŝas ankaŭ la enon de la familiaj interrilatoj.

Pri ĉi tio, la parolo de Jesuo estas konsternante drameca.

*Ĉu vi supozas, ke mi alvenis
por doni pacon sur la tero?
Mi diras al vi: Ne; sed pli vere disigon;
ĉar de nun estos kvin el unu domo disigitaj,
tri kontraŭ du, kaj du kontraŭ tri.
Estos disigitaj patro kontraŭ filo kaj filo kontraŭ patro;
patrino kontraŭ filino, kaj filino kontraŭ patrino;
bopatrino kontraŭ bofilino, kaj bofilino kontraŭ bopatrino.
(Lk 12, 51-53)*

Ĉi tiun paĝon oni devas konsideri paradokso.

Jesuo proklamis la feliĉegon de tiuj, kiuj laboras por la paco kaj li mem venis por doni al ni pacon; se ĉi-okaze li parolas pri disigo, tio estas por substreki, ke lia paco estas paco supera, al kiu oferotaj estas la pacoj dubosencaj, tiuj, kiuj estas starigitaj sur nur materialaj aŭ sangaj interesoj, sed ne laŭ justeco kaj amo.

Se temas pri la okazo, kiam en iu familio ekzistas fortaj kontrastoj pri la kredo, tiu, kiu estas kredanto - nome: disĉiplo de Jesuo - devas esti kuraĝa, kaj elteni miskomprenojn, humiligojn, ironiojn, diskriminaciojn; li montros je la maksimumo sian bonemon kaj mildemon, kunigante silenton kaj humiligon, kunirigante firman kred-ateston kaj mizerikordan mildon.

La kredanto, tamen, ne rajtas retroiri, ne rajtas ŝajniĝi. Devigata li estas doni sinceran ateston al Jesuo Sinjoro.

Konkreteĝas ankaŭ hodiaŭ malfacilaj situacioj en la familioj, pro la "justeco" de Kristo alportita. Ili estas - tio ŝajnas absurda, sed ĝi estas vera! - feliĉego, ĉar pere de la kruco akceptita kun amo, malfermiĝas por ĉiuj pli vasta evangelia horizonto. En la hejmon, venas la Dia regno!

La grava afero estas, ke la Evangelio estu anoncata, ke Jesuo estu amata, ankaŭ de ununura familiano. En tiu hejmo, ĉion-malgraŭe, *Jesuo regnas*, ĉar tiu estas akceptata de unu koro. Tie regnas iu Jesuo persekutata, kalumniata, ofendata, sed de ĉiam tia estas Jesuo...

Grenero, terenfalinte, morti devas, por ke estu eble, ke ĝi donu frukton. Temas pri tre kruda *devo*, sed temas pri la *leĝo de la vivo*. Nur la semo, kiu mortas, donas vivon. Tiu semo devas *malfariĝi*, por *fari*.

Tiele, la kristano devas akcepti, ke oni lin *malkunmetu*, se li volas kunlabori por la alveno de la regno de Dio.

Aliajn fojojn persekutado trafas la homojn ekster la familio. La familio povas fariĝi la pacejo, kie kredanto - dolorŝirita pro la malfacilaj bataloj, kiujn li devas elteni eksterhejme defende kaj ateste de la kredo - povas retrovi la kialojn de la persistemo, de la fidoplena

sinforlaso al Jesuo kaj de la paco.

Kiam iu familio estas profunde kristana, ĝiaj membroj fariĝas atestantoj de Jesuo ekster la muroj de la domo; la preĝokunvenoj enfamiliaj iĝas, kiel la momentoj, kiujn travivadis la unua kristana komunumo en Jerusalemo, kiu estis kununuiĝinta familio, "ununura koro kaj animo ununura", kaj de tiu unueco ĝi eltiris forton kaj kuraĝon por daŭre atesti Jesuon meze inter persekutadoj.

Tiu unua komunumo en Jerusalemo kapablis kununuiĝi en la preĝo por peti de Jesuo, ke li donu al ili la forton por "*paroli Vian vorton kun plena kuraĝo*" kaj "*etendi la manon por sanigado, kaj signoj kaj mirakloj fariĝos per la nomo de Via sankta Servanto Jesuo*" (Ag. 4, 29-30).

Tiu preĝo estis tiam elaŭdita. Fakte:

*..... Kaj post ilia preĝado skuiĝis la loko,
en kiu ili kolektiĝis; kaj ili ĉiuj pleniĝis
de la Sankta Spirito, kaj parolis kuraĝe la
vorton de Dio.*

(Ag. 4, 31)

Tiu renovigita Pentekosto estas io, kio ankoraŭ hodiaŭ ripetigatas, kiam en la familioj oni tiel preĝas, kaj oni ne petas la liberigon de la bariloj, sed la koron, la volon, la kuraĝon, la amon por ilin superi!

12. - Feliĉa fratino morto

*Feliĉaj estas la mortintoj, kiuj mortas en la Sinjoro.
Feliĉaj estas la invititaj al la edziĝa festeno de la Ŝafido.
(Ap. 14, 13; 19,9)*

"Morti en la Sinjoro" estas fidoriĉa esprimo, kiu hodiaŭ malmulte uzatas kaj eĉ pli malmulte estas komprenata. *Morti en la Sinjoro* signifas partopreni je la morto de Kristo kaj doni al sia propra morto la saman sencon, kiun havis la morto de la Sinjoro. La morto de Jesuo estis majstro-verko de amo. Ĝi estis ago senlime perfekta kaj pura, kiun oni igas daŭra en la sakramento de la eŭkaristio.

En ĉiu eŭkaristio *nenio* plu restas pri la fizika suferado de Kristo, sed ankoraŭ en ĝi enestas la *tuta* amo per kiu Jesuo, en tiu posttagmezo, kiu antaŭis la Paskon, oferis sian vivon al la Patro.

Morti en la Sinjoro signifas "morti pro amo", "morti ĉion foroferante".

La morto ne estas simpla ĉeso de la ekzistado, ia fadeno, kiu rompiĝas, ia salto al la nenio. La morto ĉiam estas *plenumiĝo*.

En la momento de la morto, ni humile, sed tute, nin liveras al la Sinjoro.

La morto estas la signo la plej granda de la senpoveco de la homo antaŭ la vivo kaj antaŭ Dio. Sed ĝi estas ankaŭ la signo la plej granda de la patreco de Dio, kiu pere de la morto *vokas al la vivo*, eĉ pli multe ol en la momento, kiam Li nin kreis kaj ekestigis.

Ĉi tio estas *kredo-vidmaniero* pri la morto; aliflanke, ekster la kredo, je kio reduktiĝas la morto, se ne al nura biologia fenomeno, aŭ - se tion oni volas - ankaŭ emocia, homeca, sed absolute sen espero?

Nenio pli absurda ekzistas ol la morto, ekster la optiko de la kredo. Se ne ekzistus la resurekto, t.e. se la morto estus la lasta kaj fina stadio de la homa ekzistado, Dio estus nekomprenbla, ĉar Li sin montrus senlime saĝa kreinte la homon, kaj samtempe senlime mallerta por savi ĉion, kion Li kreis.

SIN PREPARI KAJ PREPARI AL LA MORTO

Pro tio, la peno valoras *sin prepari al la morto*. Sed ekzistas nur unu maniero por sin prepari "morti en la Sinjoro": "vivi en la Sinjoro".

Ne ekzistas tempoj por sin prepari, aŭ - pli bone dirite: la ununura tempo estas la tuta vivo. Kaj dum la tuta vivo: lerni ami, por poste kapabli, okaze de la morto, eniri la plenecon de la amo.

La paradizo estas esence la partopreno - konscia, kontentiga - en la dialogo de amo, kio estas la vivo de Dio Patro, Filo kaj Spirito.

La infero esence estas la nekapablo de la homo partopreni en tiu vivo de amo. Estas la kolero de la homo, kiu dum la vivo malestimadis la amon, kaj tial troviĝas en la absoluta nekapablo eniri en la dialogon de amo kun Dio, dum samtempe li sentas nesubpremeblan neceson ami kaj kunpartoprenigi la amon.

La morto estas la transpaso de la potencialo de la amo al la konkreta realiĝo de la amo.

Estas ja vere, ke jam dum ĉi tiu vivo nia amo ne estas sur potenciala, ĝi estas konkreta. Ni ne povas etigi al simpla potencialo la amon de Francisko el Asizo aŭ de iu patrino Tereza el Kalikato!

Tamen, tiu grandega amo atingita de la sanktuloj ĉi tie, surtere, estas - fronte al la fina perfekteco de la amo paradiza - semo, kiu, por iĝi vigla planto bezonas trapasi la krisolon de la morto.

Nin prepari *morti en la Sinjoro* estas do aventuro, kiu okupas nian tutan ekzistadon.

Sed la finaj momentoj de la homa dramo meritas apartan atenton kaj prizorgon; dum tiuj momentoj ni devas esti kapablaj koncentriĝi en nin mem kaj elesprimi el ni la plej bonon.

Kaj en tia situacio, ni bezonas esti helpataj.

Se ekzistas momento en la vivo, dum kiu ni vere bezonas esti tre klarvidaj kaj plenkonsciaj je ni mem, la momento estas ja tiu de la morto.

La nuntempa tendenco kaŝi la morton al la mortontoj estas restaĵo de la pagana ignoranteco, de tiuj, kiuj havas nek kredon nek esperon, estas sinteno pereiga, kiu povas provoki ege gravajn domaĝojn al la mortonto.

Resti apud la mortontoj ne ĉiam estas facile, kaj ili ne devas esti terurigitaj; sed ilin oni devas ja helpi! Helpataj, cele ke ili esperu, helpataj koncentriĝi en la spiriton kaj cele, ke ili esprimu sentojn de amo, de fidoplena sinforlaso al Dio, de arta alvoko al Jesuo Kristo kaj al Maria.

Dio estas kun sia favoro ĉe la mortontoj kaj Li ne lasas senrezulta la servon, kiun ni povas fari al ili.

La familio estas la ideala medio por asistadi la mortontojn; ili sentas grandegan neceson sin ĉirkaŭi je amikaj vizaĝoj; ofte oni eĉ ne bezonas paroli; sufiĉas resti apude, fari etajn servojn, proponi ameman kaj simplan mienon, kune kun ili preĝadi...

Se ekzistus tensioj ordigotaj, riparotaj maljustaĵoj, negocoj plenumotaj, estus necese tiujn alfronti kun granda sereno (kompreneble, oni ne devas atendi la lastan momenton).

Tiaj intervenoj devas esti faciligitaj kaj plejeble esencaj; sed ili ***estas farendaj!*** Se inter du homoj ekestis malkonsento, montriĝis maljustaĵoj, ĉio estas reordigota antaŭ ol unu el la du transiru al la alia vivo.

Neniu el ni povas gardi en si mem konscienco-riproĉon sekve de tio, ke li ne helpis

mortonton transpasi en paco kun sia konscienco kaj repaciĝinte kun sia proksimulo.

La enhospitala restado - kio multajn fojojn estas nerezignebla por savi vivekziston aŭ por depreni dolorojn kaj permesi intensivan kuracadon - estas se eble ĉesigota okaze de la fina kaj neinvertigebla fazo, por depreni la pacienton de la anonimeco de malsanuleja ĉambro kaj reporti lin al la varmo de la familia medio.

En tia okazo - la familianoj vokitaj estas por afable lin kuracadi, eĉ malavare elspezante por doni al li pli daŭran kaj spertulan asistadon, precipe se presentiĝas situacio, en kiu ili ne povas absolute interveni unuapersono.

En familio, oni ne improvizas ĉi valorajn servojn de kredo kaj de karitato; se familio ĉiam estis disdividita, aŭ se en ĝi preskaŭ neniam ekzistas momentoj de kredo, de preĝo, de kristana sereneco, antaŭ la morto la situacio neniel ŝanĝiĝas, kaj iu povus eĉ morti kiel forlasita hundo...

Se, kontraŭe, familio kapablas travivadi momentojn de kredo, de preĝo, de bona harmonio, de repaciĝo, eble de suferoj kuraĝe kaj en komuneco eltenataj, de ĝojoj kunpartoprenataj simple kaj de ĉiuj, tiukaze, kiam oni troviĝas antaŭ baldaŭa mort-alfronto de iu, ĉio fariĝas facila, preskaŭ normala.

Kelkaj mortoj en kristanaj familioj estis ĉefverko de kredo, de preĝo, de preskaŭ ĝoja sereno. Kaj la mortinto lasis longe memoraĵon de graco kaj de beno ĉe la parenkaro kaj ĉe tiuj, kiuj lin asistadis.

En tiuj momentoj de graco oni permane tuŝadas la dimension de la dia feliĉego.

Konkludo: Beata tiu, kiu kredis

Maria, kesto de la interligo

La antikva Interligo - la granda *konsekro* de la popolo de Israelo al la vera Dio - konsistis en la observado de la Leĝo, laŭ la garantiado de la Sinjoro ne forlasi sian popolon. Ĉi Interligo skulptita estis sur du ŝtonotabuloj, kiuj perdiĝis kaj estis detruitaj kune kun la templo, preskaŭ por indiki, ke la popolo de Israelo estis nefidela kaj rompis la interligon kun Dio. Ili ne plu estis la popolo *konsekrita* al Dio.

La nova Interligo (Nova Testamento) ne konsistos simple en iu nova leĝo, kaj ne estos skulptita en ŝtonoj. La nova Interligo, kiu estos konsekrinta kaj kununuiĝinta la homojn al Dio, konkretiĝos en unu homo, en Jesuo Kristo. Li, la fidela, kiu elmontras kaj vivas en si mem la duoblan fidelecon: la fideleco de Dio rilate sian engaĝiĝon kun la homoj, la fideleco de la homoj al sia engaĝiĝo kun Dio.

Skulptita en la koro de Kristo, neniam plu estos rompita ĉi nova interligo. Jesuo restos ĉiam *fidela*: al la Patro kaj al la gefratoj.

Maria estas la kesto, kiu akceptis, generis, kreskigis, gardis Jesuon, la novan Interligon. Estas en la purega sino de Maria, ke Jesuo konsekrita estis al la Patro kaj al la homoj.

Kun virga koro, Maria akceptis Jesuon kaj fidelege konsekriĝis je lia volo.-

Kun koro patrina, ŝi - laŭ amo-kresĉendo - plurfoje oferis sian filon:

* en *Nazareto*, akceptante, ke en ŝi plenumiĝu la vorto de la Sinjoro;

* en *Betlehero*, kiam ŝi prezentis al la paŝtistoj (reprezentantoj de la popolo de la promeso) ŝian filon;

* al la *magoj*, kiuj iris al ĉiuj gentoj de la tero, serĉante ian lumon de vero;

* en la *templo*, kiam ŝi lin oferis al la Patro, ricevante interŝanĝe de maljuna Simeono la profetaĵon pri la nerakontebaj suferotaĵoj de Jesuo;

* denove en la *templo* - post dek du jaroj - kiam ŝi komencis kompreni, ke ŝia filo ne estis por ŝi, sed por la

Patro;

* fine ĉe la piedoj de la *kruco*.

De tiu momento ŝi ŝin vidis senigita de la ido por fariĝi patrino de nenombrebla amaso da filoj.

Ĉi tiu *itinero de konsekriĝo kaj de interligo* estas modelo kaj komenciĝo de la itinero de ĉiu konsekrado, kiu okazas en la eklezio.

Ĝi estas antaŭ ĉio modelo por ĉiuj kristanoj, kiuj pere de la bapto konsekritaj estas al Jesuo kaj al tiu apartenas, ĝis la punkto, ke vivo de kristano estas la vivo, la pasiono, la ofero, la

sufero, morto kaj resurekto de Jesuo mem.

Kaj krome, ĝi estas modelo kaj komenco de konsekriĝo, por la virgaj, por tiuj, kiuj sin konsekras al Dio kaj al la gefratoj por vivo religia kaj misiista.

Ĝi estas modelo por la sacerdotoj, kiuj vokitaj estas daŭrigi en la mondo la mision de Jesuo, ĉefe kaj paŝtisto, rezignante je si mem por aparteni - kiel Maria kaj kun Maria - al ĉiuj, por ĉiuj kaj kun ĉiuj.

Ĝi estas ankaŭ modelo por la geedzoj, en la geedza vivo kaj en la familio, ĝis ties plena sinofero en la vivo-edukado de la filoj.

En Maria, kaj kun Maria, la amo de la geedzoj transpasas al la filoj por ne halti en ili.

Ĉiuj gepatroj devas trapasi la sperton de la templo kaj kompreni, ke iliaj filoj ne estas por ili, sed por la Sinjoro, por la kristana komunumo, por la homaro tuta.

En Maria - kesto en kiu konkretiĝis la perfekta interligo de la ĉielo kun la tero, inter Dio kaj la homo - ĉiu kristano trovas helpon, ekzemplon kaj forton por pludaŭrigi la realigon kaj la fruktojn de tiu interligo.

En Maria ĉiu familio trovas helpon, ekzemplon kaj forton cele ke la konsekriĝo al Dio fariĝu apartenaĵo de ĉiu membro kaj de la familio mem.

Ĉi tio klarigas, kial la papoj plurfoje invitis la kristanajn familiojn sin konsekri al Maria. Ĉiu familio, kiu sin konsekris al Maria, pli intime apartenas al Jesuo kaj fariĝas nova *kesto de la Interligo*, por gardi Jesuon kaj al li esti fidela.

Kiel Maria kaj kun Maria.

MARIA, EN LA ITINERO DE FIDO DE LA POPOLO DE DIO

Maria ricevis de Dio vere apartajn donacojn, kiuj malpli valoraj estas nur rilate al la donacoj, kiuj estas propraj de ŝia Filo Jesuo.

Maria ricevis la donacon esti *Patrino de la Filo de Dio* fariĝinta homo.

Ŝi fariĝis patrino, sed ŝi restis *tute virga*.

Ŝi estis forgardita de la origina peko - *Senmakula* - depost la unua momento de ŝia ekzistado, nome ekde ŝia koncipiĝo.

Ŝi estis *ĉielenprenita* anime kaj korpe, tuj post ŝia morto.

Ĉio, kio estas dirita pli supre, tamen ne liberigis la virgulinon Maria de la devo laŭiri la malfacilan itineron de la kredo, en kiu ŝi estis fidelega je la favoroj, per kiuj la Sinjoro ŝin riĉigis.

En Nazareto, kiam Anĝelo Gabrielo diris al ŝi, ke Dio ŝin elektis por ke ŝi estu la patrino de la savonto de la mondo, Maria estis ja helpata kompreni, ke estas vere Dio, kiu pridemandas ŝin, kaj helpata krome intuicii la substancon de la kunlaboro, kiu estas al ŝi petata.

Fronte al tia lumigo Maria ne hezitas doni ŝian plenan kaj kompletan disponeblecon, laŭ pleje humila interna sinteno; ŝi ne diras: "mi faros ĉion, kion Dio de mi petas"; ŝi simple diras: "*fariĝu* al mi laŭ via parolo".

Maria tute ne pensis peti de la anĝelo ian pluan informon, aŭ eĉ ian detalon. Se la anĝelo diris al ŝi tion - kaj nur tion - tio signifis ke al ŝi, por la momento, devis sufiĉi tiu mesaĝo.

Kiam Dio komunikas kun la animoj, al kiuj Li konfidas ian apartan mision, tre sopra Li estas laŭvorte; li diras tion, kio estas nepre necesa, ĉar li volas elprovi la fidon de la kreitulo.

Kaj bone estas, se okazas tiel, ĉar ni povas apudiĝi al Dio nur pere de la fido, kaj nur la fido estas tiu, kiu malfermas nian animon al la kompreno de la mesaĝoj kaj de la intervenoj de la Sinjoro.

Konsekvence en Nazareto Maria trovis ŝin antaŭ multaj ankoraŭ nefermitaj problemoj: ŝi devis atendi la eventojn, unu tagon post la alia, kaj klopodi deĉifri pere de ili la volon de la Sinjoro.

Pruvon de tia fidosinteno ni ricevas en ŝia rilato kun la edzo Jozefo. Maria nenion diras al li pri la apero kaj la mesaĝo de la anĝelo; kaj kiam Jozefo rimarkas, ke la edzino estas graveda, neniel li pridemandas ŝin.

Iaj misteroj - la misteroj de Dio! - malkaŝitaj povas esti nur de Dio! kaj Dio denove intervenas pere de la anĝelo, por trankviligi Jozefon.

Ni asertas - kaj prave -, ke geedzoj ĉion devas diri unu al la alia; la sinteno de Maria kaj de Jozefo ŝajnas kontraŭdiri ĉi tiun nian aserton, kiu tamen plu-entenas sian tutan validon. Silento estas deviga, kiam endas gardi kaj pliprofondiĝi en la kredo kaj en la oboe al dia mistero. Klarigo estas, ke la aferoj, kiuj koncernas Dion estas home nedireblaj.

Maria kaj Jozefo - la edzo - pluiris en la fido, kaj multajn fojojn devis atendi - en sufero ankaŭ se en plena sinforlaso kaj fido -, ke Dio sendu ian lumigaĵon pere de la anĝeloj, aŭ pro la eventoj.

Mateo raportas al ni pri pluraj komunikoj, kiujn Jozefo ricevas dumsonĝe, kiam Jesuo estas eta (forkuro al Egiptujo, reveno al Palestino...). Dramaj travivaĵoj surverŝiĝis sur la malgrandan sanktan familion laŭ maniero ege peza kaj neatendite.

La ĝojo okaze de la ricevo de tiaj mesaĝoj venis kaj premiadis la longan kaj penigan atendon.

"Bone estas atendi en silento la savon de la Sinjoro."

(Jer. 3, 26)

Sankta Luko raportas al ni alian el ĉi okazintaĵoj, kiam li parolas pri la angoro de Maria kaj de Jozefo, ĉar ili perdis Jesuon en Jerusalemo.

Maria milde riproĉas la Filon kaj aŭskultas la respondon, ke li devas unue zorgi pri la aferoj de la Patro, kiu estas en la ĉielo. Sankta Luko diligente notas, ke Maria kaj Jozefo ne komprenas la respondon de Jesuo, sed kun same egala diligento, li notas, ke Maria

"konservis ĉiujn tiujn dirojn en sia koro".

(Lk 2, 51)

Dum la tuta periodo de la infaneco kaj de la adoleska aĝo de Jesuo, Maria gard-esploras lin patrinzorge, por pliriĉigi ŝian kredon kaj por pli bone kompreni la misteron.

Ŝi ĉion devas memori, ŝi devas ĉion gardi en la "memoro de la koro", ĉar tie ŝi ĉerpos lumon al ŝia kredo; kiu scias, kiom da demandoj levis ŝia preĝo, kiu tamen estis plena de

fido en la Patro, kun la konscio, ke Dio, kiu jam tre multon al ŝi komunikis, neniam estus ĉesinta interne al ŝi paroli.-

Sed Maria atendis kaj silentis, akceptadis kaj ŝin metis je dispono. Kaj ĉiam, eĉ je la piedoj de la kruco, ŝi montris ŝin preta fronte al la ne-antaŭvideblaj komunikoj de la Sinjoro. Kaj ja tie, ĉe la formortonta Filo, ŝi ricevos la lastan mesaĝon, tiun, kiu al ŝi malfermos la okulojn rilate ŝian destinon en la eklezio: patrino de multenombro da disĉiploj, en ĉiu el kiuj Jesuo volas, ke ŝi agnosku sian Filon! Sed ankaŭ en tiu momento Maria, tre verŝajne, ne taksis la grandon de tiu misio, ankaŭ se jam multajn jarojn antaŭe - je la komenciĝo de ŝia nekredebla travivotaĵo - ŝi kantis, ke

"ĉiuj generacioj proklamos ŝin beata".

Jen ĉi tie abundo da sugestoj por primeditado al geedzoj kaj al gepatroj. Vokitaj ili estas plenumi mision, kiu laŭ multaj aspektoj, similas al tiu de Maria kaj de Jozefo.

Kiom da fido necesas al tiuj geedzoj, por ne tro ekscitiĝi en la feliĉaj momentoj kaj por ne deprimiĝi fronte al kelkfoje nesupereblaj malfacilaĵoj!

Ni pensu pri okazaĵoj ne tro maloftaj: pri serioza malsano de infaneto, pri la antaŭtempa perdo de filo, pri financa bankroto, senlaboreco aŭ salajro-helpla kaso, pri domelpelo kaj pri angora serĉado de nova domo, pri miskomprenoj kaj kvereloj inter parencoj...

En tiuj spasmigaj momentoj, la geedzoj estas vokitaj kredi, serĉadi, fidi, ĉar *Dio neniam forlasas la filojn, kiuj konfidis je li.*

Kompreneble, se la geedzoj ne estas al kutimiĝintaj preĝi, se ili neniam laŭiris ian *itineron de fido*, en tiuj momentoj ili senesperigas kaj ili donas la kulpon de tio al la Sinjoro, eĉ alvenante al la decido forlasi la kristanan kredon, preskaŭ por sin venĝi je Dio... kaj eble ili fariĝas nekapablaj alpreni kuraĝan decidon.

Ĉar al ili mankis la fido, kaj ili ne kapablis tiun serĉadi kaj alvoki.

La humilo ne konfidi tro multe je si mem kaj la kapablo ĉiumomente ricevi lumon kaj gracon de la alto, estas grandega donaco, kiun la Sinjoro pretas meti je dispono de ĉiuj, kondiĉe, ke tion oni de li petu.

Dio vokas ĉiujn al fideleco, de ĉiuj li petas kredon, fidemon, sinforlason. Al ĉiuj li ripetas la bonvoleman riproĉon, kiun li adresis al Petro: *"homo malmulte fidema, kial vi dubis?"*

La devoteco al Maria ne devas konsisti en la meĥanika ripetado de rutinaĵoj kaj formuloj, en la malfacilaj momentoj; la devoteco al Maria konsistas en la *kunirado kun ŝi*, serĉante fidon plenan.

La rozario (kiu estas mirinda sed bedaŭrinde malbone plenumita preĝo) ne devas limiĝi je meĥanika dirado de multaj *Maria-preĝoj*; ĝi kontraŭe estas kvieta kaj serena kunirado kun Maria en ties "legado fido-plena interne de la misteroj de la vivo de Jesuo".

La rozario fariĝas momento neanstataŭigebla de ĉiu tago kaj de la vivo tuta: temas pri la plena kaj justa eniro de ĉiu familio en la Sanktan Familion, por ĝui la fruktojn de la fido de Maria kaj de Jozefo, por lerni aŭskultadi Jesuon kaj sin igi pretaj submetiĝi je lian volon.

La devoteco al Maria fariĝas valora rimedo por konkretigi nian konsekriĝon; kaj por la geedzoj, ilian nuptan konsekriĝon, ilian konsekriĝon de gepatroj kaj de edukantoj.

Je la lernejo de Maria ili lernas, ke

* *ĉio naskiĝas de la amo*

* *ĉio devas reveni al la amo*

* *ĉio devas resti en la amo*

* *ĉio devas iĝi amo*

* *ĉio devas ĉiam esti amo!*

Ĉar Dio estas amo kaj la Sanktega Triunuo estas mistero de amo.

Ĉar Kristo Jesuo estas la plej perfekta manifestiĝo de la amo.

Ĉar Maria estas la sanktega kesto, kiu gardas la amon.

Ĉar ĉiu geedziĝo ekzistas por esti interligo de amo.

Ĉar ĉiu familio estas - laŭ la plano de Dio - komunaĵo de amo.

Indekso

UNUA PARTO

BILDO KAJ SIMILO.....	6
1. - En la komenco estis amo.....	10
Amo: Ambigua Vorto.....	10
Kristana Amo.....	10
La Amo en Dio.....	11
Amo kaj Fekundeco.....	12
Bildo kaj Similo.....	13
Korpo, Templo de la Amo.....	16
La Beno de Dio sur la Familio.....	18
2. - Geedziĝo kaj familio: interligo.....	22
Historio de Interligo.....	22
Nova interligo, bazita sur la fideleco de Dio.....	25
Geedza interligo: inter Kristo kaj la Eklezio.....	30
3. - Kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.....	33
la interligo de amo, leĝo universala.....	33
la unua leĝo: ne ekzistas «mia» kaj «via» sed ĉio «via» estas «mia» kaj ĉio «mia» estas «via».....	34
la dua leĝo: mi ekzistas «por vi», mi realiĝas «en vi».....	35
la tria leĝo: ni ĉiuj estas egalaj. ne ekzistas unua kaj dua, ne ekzistas pli-uloj kaj malpli-uloj.....	36
la kvara leĝo: ni ĉiuj estas unu. unu en ĉiuj kaj ĉiuj en unu.....	37
la kvina leĝo: ĉion, kion mi ricevas mi donacas.....	38
la sesa leĝo: ĉio estas senkosta.....	39
la filoj estas parto de la geedziĝa alianco. La beno de Dio al la homaro transkomunikiĝas pere de la filoj.....	40
4. - Interligo de libereco.....	42
Geedziĝo kiel elekto de libereco. La vera signifo de la libereco de la homo.....	42
La libereco de la kristano celas al la libereco de Dio.....	45
Libereco: konsistiganto de la geedza interligo la geedzoj estas «konsekritaj je libereco».....	49
Eduki la filojn al libero kaj en libero konsekritaj je la libero en la amo.....	52

5. - La dia beno de la familio al la mondo.....	57
La familio: lernejo de universalismo.....	57
La beno de Dio al la familio	
estas samtempe voko, vokiĝo por la familio mem kaj por ĉiu el ties membroj.....	60
La familio estas ĉiam marŝanta,	
ĉar patrujo estas la regno de Dio.	
Simbolismo de la pilgrimado.....	64
DUA PARTO	
LA BEATECO.....	67
Beateco kaj Beatecoj.....	67
1. - Aŭskultado.....	71
Amo iĝas aŭskultado.....	71
Asketeco de la aŭskultado.....	72
Dio parolas al ni en sennombraj manieroj.....	73
2. - Kredo.....	74
La familio, vartejo de la kredo.....	76
3. - Malriĉeco.....	78
La evangelia malriĉeco naskiĝas el la amo.....	78
La konsumismaj tentoj de la familio.....	79
Familio, lernejo de laŭ-evangelia malriĉeco.....	79
4. - Afliktiĝo.....	81
Kiam malsano vizitos la familion.....	83
5. - Mildeco kaj ne-perforto.....	86
6. - Servado humila.....	89
La karakterizaĵo de la etaj enfamiliaj servoj.....	92
7. - La pureco de la koro.....	94
Ankaŭ la geedza seksemo estas konsekriĝo.....	95
Eduki do al la amo.....	96
Seksa silento kaj naskiĝ-regulado.....	96
Sed la vera amo resendadas al la kredo.....	97
8. - Malsato je dio.....	98
La terapio de la preĝo.....	100
9. - La kompatemo.....	102
Familio, lernejo de kompatemo.....	104
La sakramento de la kompatemo.....	105
10. - Ekaktivigi la pacon.....	107
La familio malfermiĝas je la donaco de la paco.....	108
Re-enmetado de la paco en la familion.....	109
11. - Nekomprenado kaj persekuto.....	110
"Mi venis por disigi patron kontraŭ patrino".....	113
12. - Feliĉa fratino morto.....	115
Sin prepari kaj prepari al la morto.....	116
Konkludo:	
Beata tiu, kiu kredis.....	118
Maria, en la itinero de fido de la popolo de dio.....	119